
PACO



OFICIALA ORGANO DE LA MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO (MEM)

ELDONO DE LA GERMANA DEMOKRATIA RESPUBLIKO (GDR)



4

1971

Prof. d-ro Joachim Peck

La neceso de eŭropa sekureckonferenco

La konferenco de la ministroj pri eksterlandaj aferoj de la ŝtatoj de Varsovia Kontrakto okazinta la 21an kaj 22an de junio 1970 en Budapeŝto rezultigis eĥon mondvastan. Okulfrape estas, ke la proponoj de la Budapeŝta Konferenco ankaŭ en registaraj rondoj de okcident- kaj nordeŭropaj ŝtatoj trovis pozitivan rezonadon. Tiu ĉi rezonado de la konferenco de la ministroj pri eksterlandaj aferoj en Budapeŝto denove montras, ke – kiel diras la finkomunikaĵo – nuntempe estas favoraj kondiĉoj por transiri al praktika preparo de tuteŭropa sekureckonferenco.
Prave one povis konstati en la memorando de la Budapeŝta Konferenco, ke la starpunktoj de la interesiĝantaj ŝtatoj pri vico da gravaj problemoj, kiuj interligiĝas al la sekureckonferenco, alproksimiĝis dum la fluo de duflankaj kaj multflankaj konsultoj kaj de opiniosanĝo. Ĝuste la faritaj en la fluo de la lastaj monatoj konsultoj inter socialismaj kaj kapitalismaj ŝtatoj de Eŭropo montris, ke la problemoj de la eŭropa sekureco en ĉiuj ŝtatoj de Eŭropo estas rigardataj kiaj de plej alta urĝeco. Ankoraŭ pli: la konferencpunktoj proponitaj de la Praga Interkonsiliĝo de la ministroj pri eksterlandaj aferoj de la Varsovia Konvencio en oktobro 1969 pri eŭropa sekureckonferenco estas nemalpliigite aktualaj; kaj estas kriterio por la tuteŭropa responsokonscio de la ŝtatoj de la Varsovia Kontrakto, ke ili nun en Budapeŝto laŭekzemple konstruktive konsideris la imagojn kaj instigojn de aliaj eŭropaj landoj ka integris en siajn pripensadojn. Ne laste pro tio en Budapeŝto la tagordo de iu unua eŭropa sekurecekonferenco estis plivastigita. Ĝi nun ampleksu tri punktojn:

1. Garantiado de la eŭropa sekureco kaj rezigno je perfortado aŭ minaco de perforto en la reciprokaj rilatoj inter la eŭropaj ŝtatoj;
2. Plivastigo de samrajtaj rilatoj en la sektoro de la komerco de la ekonomio, de la scienco, tekniko kaj kulturo kun la celo de la disvolvo de la politika kunlaboro inter la eŭropaj ŝtatoj;
3. Kreo de organo pri problemoj de la sekureco kaj kunlaboro en Eŭropo ĉe la tuteŭropa konferenco.

En la centro de la proponoj de la socialismaj ŝtatoj pri problemoj de malstreĉiĝo, sekureco kaj paca kunlaboro en Eŭropo ĉiam staras la tuteŭropa rezigno je perforto sur la bazo kaj por certigo de la Status quo kiel la nuntempe decida problemo, por kiu iu europa sekureckonferenco trovu ian internacijuran reguligon. La en la memorando fiksitaj kontinueco, elasteco kaj realeco de socialisma ekstera politiko donos al la batalo de la pacamaj fortoj en ĉiuj eŭropaj ŝtatoj fortan supreniĝon. Ĝi al la kontraŭuloj de tuteŭropa sekureckonferenco pli kaj pli malhelpos ke tiuj povas ŝirmi siajn kontraŭmalstreĉiĝajn poziciojn per diafanaj argumentoj kaj demagogiaj manovroj.
Kernproblemo por malstreĉiĝo kaj sekureco en Eŭropo estas kaj restas la alpreno kaj praktikado de normalaj diplomatiaj rilatoj inter GDR kaj FRG. Pro tio ankaŭ estas logika konkludo, kiam en la memorando de la Budapeŝta Konferenco estas postulata la partopreno de ĉiuj eŭropaj ŝtatoj inkluzive de GDR kaj FRG sub samaj kondiĉoj kaj sur sama bazo. Prave la memorando montras, ke la kunvoko de eŭropa sekureckonferenco ne povas esti dependigita de iaj antaŭkondiĉoj, kiuj ĝuste flanke de Okcidentgermanio lastatempe estas pli forte postulataj.
La lastaj monatoj en la internacia vivo de la GDR pruvis, ke ĉiam pli da ŝtatoj liberigas sin el la aroga enmiksiĝo de la Bonn-a registaro en la eksterajn rilatojn de ĉi tiuj landoj. Ĉiam pli da ŝtatoj kaj aliaj registaroj ekkonas, ke la problemo de malstreĉiĝo, de sekureco kaj de paca kunlaboro en Eŭropo ne plu povas esti solvata preter aŭ eĉ kontraŭ la GDR. La GDR reprezentas en siaj rilatoj kontraŭ la ŝtatoj de nord- kaj okcidenteŭropo politikon de paca kunvivado. Sole sur tiu ĉi bazo la danĝero de iu milita konflikto povas esti forturnita de Eŭropo kaj paco kaj sekureco por ĉiuj eŭropaj popoloj kaj ŝtatoj esti konservataj: sole tiel Eŭropo povas kaj povos plenumi veran kontribuon por la kreado de stabila pacordo en la mondo. Jen la senco de la memorando de la Budapeŝta Konferenco de la ministroj por eksteraj aferoj de la ŝtatoj-partoprenantoj de la Varsovia Kontrakto.

(El „Panorama DDR" Trad.: Rothe)

La Monda Packonsilantaro

Dek rekomendoj por la eŭropa sekureco

1. Ĉiuj eŭropaj ŝtatoj agnosku la netuŝeblecon de la ekzistantaj nun en Eŭropo limoj.
2. Ĉiuj eŭropaj ŝtatoj sin devigu rezigni minacon aŭ aplikon de perforto en siaj reciprokaj interrilatoj.
3. Ĉiuj eŭropaj ŝtatoj starigu unu kun la alia diplomatiajn interrilatojn.
4. Ĉiuj eŭropaj ŝtatoj aktive subtenu la baldaŭan kunvokon de tuteŭropa sekureckonferenco kaj la estigon de konstanta organo por demandoj de sekureco kaj kunlaborado en Eŭropo.
5. Ĉiuj eŭropaj ŝtatoj havu pretendon je egalrajta partopreno en regionaj kaj ĝeneralaj organizaĵoj, en konferencoj kaj konvencioj de regiona aŭ ĝenerala karaktero.
6. Ĉiuj eŭropaj ŝtatoj sur la bazo de reciproka utilo subtenu egalrajtajn ekonomiajn interrilatojn kaj kulturu la interŝanĝon de scienc-teknikaj spertoj por prospero de la paco kaj bonstato de ĉiuj popoloj.
7. Ĉiuj eŭropaj ŝtatoj sin devigu agadi por la ĉesigo de la vetarmado kaj por la ĝenerala kaj radikala malarmado en la tuta mondo kaj pledi por la ampleksa malpermeso de amasekstermaj armiloj.
8. Ĉiuj eŭropaj ŝtatoj pledu por la malpliigo de eksterlandaj militaj fortoj, staciitaj sur la teritorio de ĉi tiu kontinento.
9. Ĉiuj eŭropaj ŝtatoj persekutu laŭleĝe rasan diskriminacion, religian netoleremon, pormilitan propagandon kaj inciton kontraŭ popoloj.
10. Ĉiuj eŭropaj ŝtatoj deklaru, ke la ŝirmado de medio, kiel ekzemple pura aero, pura akvo apartenu al komuna klopodado sur la bazo de egalrajta kunlaboro por la bono de ĉiuj homoj.

(Trad.: W. Zimmermann) – CR –



Romesh Chandra, ĝenerala sekretario de la Monda Packonsilantaro
Foto: Zentralbild

Pri „interngermanaj rilatoj" kaj la Eŭropa Sekureco

La rilatoj inter GDR kaj FRG estas depost pli ol 21 jaroj pli ol imageble malbonaj. Ĉis hodiaŭ ne eblas ligi normalajn rilatojn, kiel ili konvenas al ĝeneralaj principoj, validaj en la internacia areno.
Oni devus opinii, ke la registaro de FRG, post kiam ĝi en la konvencio kun USSR de la 12-a de aŭgusto 1970 aprobis la status quo en Eŭropo kaj la netuŝeblecon de ĉiuj limoj sur tiu ĉi kontinento – inkluzive de la limo inter FRG kaj GDR – nun pretus, reguli la rilatojn al sia najbara ŝtato GDR surbaze de la popoljuro. Tio despli, ĉar la registaro de GDR proponis per konkreta skriba projekto al la Federacia Prezidento de FRG, d-ro Heinemann, jam antaŭ pli ol unu jaro tian konvencion. Sendube rilatoj inter GDR kaj FRG surbaze de la popoljuro tre esence subtenus la lasttempe videblajn tendencojn de malstreĉiĝo en Eŭropo. Ĉis nun la registaro en Bonn ankoraŭ malhelpis la subskribon de kontrakto pri la estigo de samrajtaj rilatoj konforme al la normoj de la popoljuro kun la registaro de GDR.
Kial do? Kiujn argumentojn la registaro en Bonn kontraŭ ĝi surtabligas kaj kio kaŝiĝas malantaŭ ili?
La ĉefa argumento de Bonn estas: Inter FRG kaj GDR ne povas esti starigitaj samaj rilatoj kiel inter aliaj ŝtatoj. En la intereso de „unueco de la nacio" tiuj rilatoj devas esti „specialaj"; ne povus temi pri popoljuraj, sed nur pri „interngermanaj" rilatoj.
Tio estas politika misprezento, ĉar ili baziĝas sur neakceptebla fundamento. „Unueco de la germana nacio" ne plu ekzistas. La burĝa germana nacio, kiu evoluis en la transira periodo de feŭdalismo al kapitalismo kaj kiu ekzistis en la kadro de unueca ŝtato inter la jaroj 1871 kaj 1945, ne plu estas.
Inter la du germanaj ŝtatoj kun absolute neakordeblaj, kontraŭaj sociordoj ne povas esti kunfandiĝo aŭ iu alispeca intermiksiĝo, sed nur rilatoj, kiuj senrezerve koincidas kun la popoljuro. La formulo de Bonn pri la „interngermanaj rilatoj" al GDR klare esprimas, ke la registaro de la okcidentgermana Federacia Respubliko neas la popoljuran subjektivecon de la socialisma germana ŝtato, ke ĝi ne traktas GDR kiel suverenan ŝtaton kun la samaj rajtoj je gardo de ĝia sekureco kiel aliaj ŝtatoj. Per tio la registaro en Bonn konfliktas kun la devoj, kiujn ĝi promesis plenumi per subskribo de la Moskva Konvencio. Kiam la registaro en Bonn kontestas la suverenecon de la socialisma germana ŝtato kaj ne volas agnoski la popoljuran subjektivecon de GDR, tiam ĝi intence vokas danĝeran situacion por la Eŭropa Sekureco kaj malhelpas la starigon de firma paca ordo en Eŭropo. El ĉio sekvas, ke popoloj kaj registaroj de la nesocialismaj eŭropaj ŝtatoj agas por siaj plej propraj interesoj, kiam ili subtenas la postulon de GDR pri akcepto de normalaj popoljuraj rilatoj, malhavaj de ĉiuj ajn diskriminacioj, inter GDR kaj FRG. Kaj ili sukcese servas al la afero de sekureco kaj samrajtigita kunlaboro de ĉiuj ŝtatoj en Eŭropo, kiam ili siaflanke normaligas la rilatojn al la Germana Demokratia Respubliko surbaze de la popoljuro.

(El „Panorama DDR" trad. d-ro Eichhorn)

La koalicio de ĉiuj pacamaj fortoj povas malhelpi militon

La Potsdam-a konvencio ne ekzistas por esti uzata laŭ persona gusto, ĝi ekzistas por uzado en sia propra senco, do por la prospero de Eŭropo, por la estonteco de Eŭropo kaj por tutmonda paco.
Pro tio ni prenis sur nin la penon renkontiĝi ĉi tie ĉe la kolokvio en Potsdam. Kaj pro tio, mi kredas, ni renkontiĝos ne tro malproksimtempe en granda kunveno de la popoloj de Eŭropo.
Kio okazos post tiu ĉi kolokvio?
Ĉu ne ekestos eĥoj en la diversaj landoj? Ĉu ne ekestos eblecoj por pluaj kolokvioj, estantaj eĥoj de tiu ĉi kolokvio, antaŭenportantaj la spiriton de tiu ĉi kolokvio kaj respondantaj la demandon pri la venonta agado por ĉiuj, kiuj nuntempe ĝojas pri la nova situacio, ekzistanta en Eŭropo? Mi firme kredas je tio. Mi kredas, ke estas ebleco de starigo de – eble internaciaj – grupoj en diversaj landoj, studontaj la diversajn problemojn, helpontaj al ni surpaŝi la vojon, kiun ni intencas iri.
Kaj se ni diras, ke ni kunvenis en la spirito de la Potsdam-a konvencio, ni do opinias esence en la spirito de la batalo kontraŭ milito, de la batalo kontraŭ faŝismo, de la batalo por sendependeco de la popoloj, de la batalo por la unuigo de ĉiuj diversaj fortoj, laborantaj nuntempe kontraŭ koloniismo kaj imperiismo por starigi la koalicion de la pacamaj fortoj en Eŭropo kaj la tuta mondo, kiu povas certigi la pacon, kiu garantias, ke neniam denove eksplodos milito.

(El „Berliner Brief" 11/70 Trad.: D. Dungert)

Gyula Juhász:

EL „PROLOGO"

Infanoj, ho, la viv' je estas kanto,
Beleco, flor' – ni voli devas nur!
Kaj vin, popolon gajan de l'estonto,
Poeta beno superarkas nun,
Kiel ĉielon ĉielark' post ŝtormo –
Kaj sonu per muzik' de fulmotondro:
Nur belon, bonon ŝatu en la mondo,
Porpacaj batalantoj de l'estonto!

Trad.: Ernesto Farkas, Szeged
– CR –

Pacesplorado kaj pacbatalo

D-ro Frank Rupprecht

Preskaŭ neniu dubos pri tio, ke estas grava tasko de nia tempo, serĉi rimedojn kaj vojojn por la sekurigo de la paco. Konsiderante la spertojn el du teruraj mondmilitoj en nia jarcento, instigitaj de la germana imperiismo, konsiderante la egan detrupotencon de la ABC-armiloj, evoluigitaj en la lastaj jardekoj, aŭdiĝas pli ol iam la neignorebla deziro de la popoloj en Eŭropo kaj en la tuta mondo, ke oni ekzakte esploru kaj malkovru la movofortojn kaj mekanismojn de imperiismaj militoj kaj de ilia preparado, la eblecojn kaj vojojn al malebligo de eksplodo de novaj konkermilitoj kiel ankaŭ la kondiĉojn por paco kaj sekureco nun kaj estonte.

Surbaze de la ŝanĝita fortoproporcio ekzistas nun, kvaronjarcenton post la finigo de la dua mondmilito kaj de la Potsdama Konferenco, signifa por la estigo de daŭra paco, favoraj kondiĉoj, organizi tuteŭropan konferencon pri sekureco. La interkonsentoj kaj iniciativoj, kiujn oni fiksus dum tia konferenco en kaj ekster la kadro de Eŭropo, povus esence kontribui al plifortigo de la paco. La kontraktoj inter FRG kaj USSR kiel ankaŭ Pollando kaŭzis koncernan plibonigon de la politika klimato.

Pri signifa kontribuo al la pliprofundigo kaj fortigo de la klopodoj pri sekureco sur la eŭropa kontinento interkonsiliĝis la reprezentantoj de la Mondpackonsilantaro dum sia prezidantara kunveno en New Dely en oktobro 1970. Surbaze de iliaj proponoj la sekretariaro de la Mondpackonsilantaro transdonis al la publiko rekomendojn, rigardendajn kiel elementojn de eŭropa sekurecsistemo.

Konsiderante, ke ankaŭ por la Proksima Oriento kaj Hindoĉinio estas pretaj ampleksaj proponoj pri la politika reguligo de gravaj disputproblemoj, fakte montriĝas novaj perspektivoj por paco, sekureco, malstreĝiĝo kaj kunlaboro, malgraŭ la multflanka, senbrida rezisto fare de la ekstremuloj, kiuj ĉie en la mondo vigligas konfliktcentrojn.

Tiu aspekto de la aferoj estas eksterordinare grava por la pacesplorado. En la nocio de pacesplorado esprimiĝas grava simptomo de nia tempo, nome la pli strikta interrilato inter scienco kaj politiko. Pacesplorado staras en la centro de la disputoj de nia nuntempo. Ĝi akiras ĉiam pli grandan gravecon en la scienca kaj ideologia disputoj.

Kio estas pli proksima por la pacesplorado ol orientiĝi je aktualaj taskoj pri sekurigo de la paco kaj starigi al si tiurilate konkretajn celojn? Malgraŭ tio restas nedisputeble, ke krom tiu „praktika" kaj „mallongdaŭra" taskoplanado la pacesplorado devas majstri ankaŭ ampleksajn „mez- kaj longdaŭrajn" esplortaskojn. Kiel alie ĝi povus kontribui al perspektivdona pacsekurigo? La plej bona kontribuo al la sekurigo de paca estonteco estas kaj restas la daŭra, amplekse motivigita solvo de la aktualaj taskoj. Tial ĉiam konkrete validas jena eldiro: Hic Rhodos, hic salta! Tiu ĉi esplorado devas vojmontre kaj pozitive indiki sian starpunkton pri eŭropa sekureckonferenco kaj ĝiaj taskoj samkiel pri politika solvo de ĉiuj aliaj konfliktoj en la mondo.

Pacesplorado estas ofte nomata konfliktesplorado aŭ ĝia pluevoluo. Sed ne temas pri iaj individuaj konfliktoj kaj pri ekster la sociaj interesoj agantaj fortoj, kiuj ĉiam denove senteble minacas la pacon kaj la sekurecon. Kontraŭe temas unualoke pri imperiismaj potencgrupiĝoj, kiuj por atingo de siaj potencinteresoj rigardas la agreson kiel legitiman rimedon de la batalo kontraŭ la popoloj, luktantaj por sia liberigo el la koloniismo, novkoloniismo, el subpremado kaj prirabado. Tion pruvas la agresmilitoj de Usono en Hindoĉinio kaj de ĝiaj satelitoj en la Proksima Oriento. Memkompreneble staras en la rangordo de la konfliktoj, kies kaŭzoj devas esti limigotaj kaj finfine forigotaj, je la unua loko la imperiismaj agresoj. Alie la homaro ne povos vivi en sekureco.

La pacesplorado devas tial antaŭ ĉio esplori, malkovri kaj likvidi la kaŭzojn de imperiismaj agresoj kaj agresintencoj. Por okcidenta Germanujo signifas tio antaŭ ĉio malkovri la agreseman pacrompantan rolon de la dekstra kartelo, kies plua koncentriĝo montriĝis dum la balotoj en Bavarujo kaj kiu per la operacio „Rezistagado" malkaŝis sian pacendanĝerigan rolon.

Oni demandas sin, kiel la pacesplorado en la Federacia Respubliko povas esti praktikata kaj povas plenumi siajn verajn taskojn, se ĝiaj gvidantoj ne kapablas liberigi sin de la kontraŭkomunismo? Peter Menke-Glückert, unu el la iniciatoroj de la oficiala agnosko de la pacesplorado en la Federacia Respubliko, asertas ekzemple, „ke en la postmilita tempo la temo de paco ricevis en la okcidento pro la vasta, de komunismo kaŝtrapenetrita ‚mondpaca movado' negative-ideologian akcenton ... Multaj pensas ankoraŭ hodiaŭ, kiam oni parolas pri paco, pri la ‚Germana Pacunio' aŭ la ‚Packonsilantaro de GDR'. Iom post iom tio ŝanĝiĝas. La nocio de paco regajniĝos kaj liberiĝos el tia ideologia enkroĉiĝo".


Tiaj opinioj misprezentas historiajn faktojn, kalumnias kaj disorientas. Tion atentu ĉiuj rondoj, interesataj je pacesplorado, pacbatalo kaj je ilia unueco kaj reciproka fekundigo.

Unue: La scienca socialismo estas la plej ampleksa pacesplorado, ĉar ĝi malkovris la evoluleĝojn de la moderna socio, la kaŭzojn de la imperiismaj militoj en nia epoko kaj la kondiĉojn de daŭra pacordo.

Due: Efikplena pacmovado sen aŭ eĉ kontraŭ la komunistoj estas neimagebla. La kontraŭkomunismo misprezentas la mondvastajn movadojn por paco, nacia sendependeco kaj por pli bona vivo kaj

Dum multaj subteraj atombomeksplodoj en la usona dezerto Nevada ofte la aeron atingas radioaktivaj polvoj, kiuj povas iĝi aktuala danĝero por multaj homvivoj. La radioaktiva polvo povas efiki kanceriga.

Foto: Zentralbild



limigas ilian efektivecon. La kontraŭkomunistoj aldonis al la vorto „paco" negative-ideologian akcenton en la publika manipulado de opinioj!
Menke-Glückert vidus plej volonte ĉiujn pacfortojn kaj pacorganizaĵojn eliminitaj. Al tiu senespera politika intenco konformas akademia, elita kaj kontraŭdemokratia koncepto de la pacesplorado. Menke-Glückert opinias tial, ke la unua kaj plej grava celo de la pacesplorado estas la planado de la paco kiel politikan staton en la estonteco. Pluaj taskoj estas klarigado kaj informado, la malkovro de antaŭjuĝoj, kliŝoj ktp., la eduko al pacpensado. Kaj temas laŭ li pri scienctеoriaj, organizaj kaj instruiĝaj taskoj, pri kreado de institutoj kaj katedroj, pri la instruiĝo de fakuloj, de tiel nomataj „pacplanistoj" ktp. La demandon pri mondo sen milito, pri mondo en feliĉo kaj paco oni povas hodiaŭ pozitive respondi, dank' al la materia kaj morala forto de la socialisma ŝtataro, al la laborista movado en la kapitalismaj ŝtatoj kaj al la naciaj liberigaj movadoj, dank' al la mondvasta pacmovado.
La decida tasko de la pacesplorado hodiaŭ kaj en la proksima tempo estas tial, senvualigi la ekonomiajn bazojn kaj movofortojn de la milito kaj la politike-ideologian mekanismon de ĝia preparado, por kontribui per science motivigitaj konkludoj al aktivigo kaj unuiĝo de ĉiuj pacfortoj. Pacesplorado misuzas tiun ideon, se ĝi ne rigardas sin kiel nedisigeblan parton de la reala kontraŭimperiisma pacbatalo de la laborulaj amasoj, de ĉiuj homoj de bona volo kaj se ĝi ne partoprenas tiun batalon analoge per siaj teoriaj eblecoj. Ĉi ne rajtas deturni de la konkretaj bataltaskoj, kiel evidente estas la destino de la antaŭe prezentita programo; ĝi devas alkonduki al ili kaj veki la komprenon por ili.
La plejmulto el la scienculoj, kiuj ĉe okcidentgermanaj institutoj establiĝas en la „pacesplorado", prisilentas nuntempe la longjaran pacesploradon, kiu ligiĝas al la mondpacmovado, kaj ĝiajn rezultojn. Nomojn kiel Frédéric Joliot-Curie, John D. Bernal, iliajn verkojn pri la kontraŭmilit- kaj pacesplorado oni bedaŭrinde ne trovas en la plej multaj bibliografioj. Tiaj eminentaj sciencaj libroj kaj batalskribaĵoj kiel „Falsistoj" kaj „Tiel oni faras militojn" de Prof. Albert Norden, membro de la prezidantaro de la Mondpackonsilantero, restas tute neatentataj fare de la oficiala pacesplorado en okcidenta Germanujo. Tiu ĉi scienco, kiu estas antaŭdestinita realigi unu el la plej altaj humanismaj deziroj de la homaro, finfine izolas sin mem per tio. Kontraŭe povas kaj povos esti videblaj sukcesoj ĉiam pli tie, kie pacesplorado, pacmovado kaj pacbatalo estas forte kunligitaj sur vasta fundamento.

(El „Berliner Brief" 1/71
Trad.: Dieter kaj Renate Berndt)

Tro rapida plimultiĝo de l'homaro?

Usona eksperta komisiono prezentis al publiko raporton pri la tielnomita eksplode okazanta plimultiĝo de la homaro. Ne hazarde tuj post la apero de la broŝuro McNamara (nuntempe prezidanto de la kapitalisma „Mondo-Banko") en du prelegoj kaj Nixon antaŭ UN apelaciis al ĉiuj en UN unuiĝintaj ŝtatoj kaj al la „konscienco de ĉiuj homoj", serioze okupiĝi pri tiu ĉi problemo. La ekspertojn malantaŭ si, UN antaŭ si, en siaj trankvilaj anguloj ĝenitajn usonajn civitanojn ĉe radioaparatoj kaj multajn timigitajn homojn ankaŭ en aliaj landoj – aŭskultantoj: La superuloj de Usono aranĝis sian spektaklon per altara preĝo en misiista fervoro.
Tiu ĉi distanciga konstato necesas, kvankam ne volante kontesti la urĝecon de la afero mem. La laŭda eĥo, kiun Nixon kaj McNamara certe atendis, ne estas unueca. Speciale civitanoj de socialismaj ŝtatoj, ne supertaksas vortojn, kiuj kontraŭstaras la praktikon de la propra lando. Napalmo sur vjetnamiajn rizkampojn, taktiko de „bruligita tero" kontraŭ popolo, kiu intencis ekpaŝe forigi la malsaton por ĉiam, neniigo de nutraĵoj en Usono mem: Kiel tio povas koincidi kun apelacio por batalo kontraŭ la malsato?
La raporto pri la „fulmrapida hommultiĝo" tute ne estas neserioza. Ĉi tamen por diskutado aŭ eĉ por la solvo de problemoj ne taŭgas, ĉar ĝi forŝovis laŭ stranga maniero la problemaron, ĝin samtempe malvastigante. Elirpunkto – kiel ĉiam en tiaj studaĵoj – estas la tendenco de la homara kresko, en certaj teritorioj de la mondo pli rapide multiĝi ol la produktado de nutraĵoj. Tio laŭ opinio de la aŭtoroj, se ne estos aplikataj rigoraj rimedoj, kondukos al katastrofo de malsato, respektive al eksplodo alispeca, nome al ribelo de malsatantoj. La verkintoj atantigas pri la ĉiam pli dekliveca diagrama linio por la plimultiĝo de la homaro: de la homara ekesto ĝis la jaro 1830 unu miliardo, 100 jarojn pli poste la dua miliardo, 30 jarojn poste (en la jaro 1960) la tria miliardo, en la jaro 1975 la kvara miliardo pleniĝos kaj en la jaro 2000 7,5 (minimume 7) miliardoj da homoj vivos sur la terglobo.
La aŭtoroj de la usona raporto komplete koncentrigas sian apelacion al kontrolado kaj limigo de naskiĝnombroj en la tielnomitaj subevoluintaj landoj. Ili direktas siajn postulojn al Unuiĝintaj Nacioj, pretendas „komisiiton pri loĝantaraj demandoj" en la kadro de porevolua programo; li devus respondeci pri adekvataj rimedoj el la loĝantara kuratorfonduso (kiu pligrandiĝu de 1,5 al 100 milionoj da doloroj) kaj kiujn li, ekipita per koncernaj plenrajtigiloj, utiligu ĉefe cele al „esploro de plibonaj metodoj por la kontrolado de naskiĝoj" kaj aliaj al tio ligitaj problemoj.
Tamen – tiel klaraj kaj altruismaj, kiel la proponoj aspektas, ili ne estas. Certe la malsatado nur povas esti venkita per naskiĝkontrolo paralele kun aliaj rimedoj, – do nur en konekso kun aliaj faroj. En tio plej efikaj metodoj por naskiĝkontrolado ne estas la plej komplika demando, ĉar eblas ekzameni tiajn metodojn en ĉiu almenaŭ iom evoluita medicina sistemo sur nacia nivelo. Sed: kiel statas la afero kun la malarmigo? Ĉu ne aliaj usonaj ekspertoj kalkulis, ke ĉiu nova amerika projekto por raketoj kostas inter 25 kaj 50 miliardojn da dolaroj? Kaj kio pri ĉesigo de la milito en Vjetnamio, kies kostoj laŭ la okcidentgermana Georg Picht sufiĉus por liberigi tutan Azion de malsato dum 15 jaroj? Kio do pri ĉesigo de armilproduktado kaj pri maksimuma altigo de agroproduktado, produktado de agrikulturistaj maŝinoj, de produktado ĝenerale, kiam nura kresko de unu procento pojare jam tiom pezus? Kio pri klerigo, kiu ne nur celas instrui specialistojn, sed ankaŭ politike saĝajn kapojn?
La aŭtoroj de la raporto aŭ silentas pri tiuj aferoj aŭ ilin nur tuŝas, ekzemple la demandon pri klerigo. Ili do sekvas linion, kiu rekte celas redukti ekstrempolitikajn kaj kompleksajn problemojn al pure scienca kazo. Kaj pri tiuj etigo kaj malpolitikigo de mondoproblemo oni ne povas konsenti.
Kiam krome legeblas, ke la „loĝantarkrizo" same gravas kiel la paco(kial la problemojn disigi?), ke la sekvoj por „bonfarto de la homaro kaj ties vivostilo" estas timigaj (kiun vivostilon oni opinias?), oni ne devus allasi, ke la loĝantaro kreskas en la jaro 2000 al 7 miliardoj da homoj k.t.p., tiam oni demandas sin, ĉu la nomita studaĵo pli verkiĝis dank'al la timo por la bonvivo de certa tavolo de usonaj civitanoj ol pro la zorgo pri la homaro.
Sed la objektoj havas sian rangvicon. Malarmigo, Eŭropa Sekureco, intenca kaj malegoisma helpo por la junaj naciaj ŝtatoj kaj konsilado pri la naskokontrolado – tio estas konstrua kaj sukcespromesa programo.

(El „Sonntag" 45/69 trad. Dr. Eichhorn) – CR –

ILUSTRITA MANIPULADO

serve al la senpolitikigo de la homo

La sekva teksto, kiu aperis en okcidentgermana gazeto, eldonita de liberalaj intelektuloj, represiĝas ĉi tie pro sia malkaŝiga karaktero. Ne ĉion diritan ni tamen konsentas. Tio speciale koncernas la difinon kaj klarigon de sociaj fenomenoj per psikoanalizaj kaj pure psikologiaj metodoj, kio laŭ nia opinio mistrafas la esencon de la sociaj procedoj kaj vualigas la klasokarakteron de la socio – la. red. kom. el GDR.

Estus malĝuste prezenti la manipuladon de opinioj en tiu ĉi lando (FRG – la red.) kiel komploton. Ne estas nur manpleno de kapitalistoj – Springer, Bauer, Bertelsmann, Gruner kaj Jahr – kiuj furiozdecide, per kolera rigardoĵeto volas doni al la preslibereco la neniigan baton. Plidecide estas la ekonomia kaj socia sistemo de la Federacia Respubliko, kiu neeviteble naskas la adekvatan gazetaron. Manipulado okazas preskaŭ ne sekve de konscia stirado fare de unuopuloj: La tuta sfero de publiko, tiu kampo, en kiu renkontiĝas opinioj kaj kontraŭopinioj, en kiu formiĝas juĝoj, antaŭjuĝoj kaj ideologioj, kunpremiĝis al densmaŝa reto-kaptilo de la manipulado: labirinto, kiu nur povis estiĝi per kunfandiĝo de multaj faktoroj.

Ke estas malfacile retiriĝi de objektivaj ekonomiaj – sociaj kondiĉoj, montriĝas por ĉiu, kiu deziras hodiaŭ fondi superregionan aŭ eĉ ilustritan gazeton. Hodiaŭ regas rigora leĝo de profito. Gazetaraj konzernoj senkompromise kiel uzinaj kombinatoj aŭ marmeladofabrikoj estas adaptitaj al reguloj de la merkato. Kiujn dimensiojn hodiaŭ publicaĵo devas atingi por sukcese transvivi konkurencon, montras ekzemple la novfondita katolika semajngazeto „Publik". „Publik" en aprilo 1970 jam havis venditan eldonkvanton de 70 000 ekzempleroj. Tamen tiu ĉi gazeto bezonas ĝis ekonomia memstareco ankoraŭ startohelpon de 28 milionoj da markoj.

Novfonditaj ilustritaj gazetoj, pri kiuj ni hodiaŭ volas paroli, ankoraŭ pli multe devas esti investiciitaj, kiam ili celas adaptiĝi al la plej moderna nivelo. La tre kosthava ĵurnalismo de produktaĵo kiel „Jasmin" aŭ „M" (la nova – intertempe mortinta – porvira revuo el la Burda – eldonejo) nur povas esti kovrita per intima kunludado kun la propagandanta industrio. Tamen kiam la gazeto sukcesas prezenti legantaron, kiu ampleksas centmilojn, se eble milionojn, tiu kunlaboro floras kaj gajnigas la eldoniston.

Tiel la manipulado rezultiĝas spontanee. Kiu ne volas rezigni je leganto, tiu devas skribi, kion „ĉio ajn" volas legi. Kaj pro la fakto, ke tiu „ĉiu ajn" plej volonte aŭdas konfirmojn de siaj antaŭjuĝoj, plej bone vendiĝas fikutimaj ideologioj.

Sed tiu „ĉiu ajn" devas esti pli precize priskribita – tiu homo, al kiu la poramasaj medioj – unuavice la ilustritaj gazetoj sin turnas.

Li estas homo, kiu ĉiutage laboras ok horojn; laboro, kiu ne kontentigas lin, ĉar li ne laboras por si mem, sed por iu alia. Li estas homo, kiu loĝas izole en sociala kvartalo periferie de la urbo kaj kiu al kundecido pri aferoj de la komuna vivo absolute ne aŭ nur tiam vokiĝas, kiam la principaj demandoj jam decidiĝis. Homo do, kiu difektiĝis kaj rilate la sanan „Mi"-konscion kaj la kapablecon socie kontaktadi, pri kooperado. Al tiu homo, kiu serĉas distriĝon kaj ŝajnkontentiĝon, la amasaj medioj adaptiĝas. Plej antaŭe la ilustritaj gazetoj ĉiuspecaj. Kaj rektvoje nun atingiĝas tiu efiko, kiu nomiĝas manipulado: profitcelaj interesoj kaj la manio pri ŝajnkontentiĝo kompletiĝas. Fine la harmonio de ambaŭ servas al konservado de ekzistanta ekonomia kaj politika sistemo.

Revita mondo kaj iluziigo

„Oni stiras sian aŭtomobilon preter verdaj herbejoj al duetaĝa somera domo ĉe la parkfino"... Oni eniras la vilaon. „Tie estas pompaj objektoj – antikvaj grekaj kaj romaj kaj persaj vazoj kaj urnoj; tie estas mebloj el la metiejo de Bernini kaj ties samepokulo Brustalon; tie estas belegaj pentraĵoj, tie brilegas veneziaj, siciliaj, francaj speguloj." Kaj ne laste Gina Lollobrigida, fabela feino en ĝismaleola festvestaĵo, senproblema lukso-estaĵo, kiu montras al ni per belegaj koloraj fotoj, kiel oni povas vivi – se oni povas...

Gina transformis sian vilaon al muzeo kaj elspezis tiucele milionojn. Iru kaj faru la saman!

Sed tiu, kiu estas invitita konstrui revokastelojn kaj sekvi dumtagajn sonĝojn, tiu gajnas ordinare maksimume 750.-markojn monate. „Das Neue Blatt" (6/69 – eld. 1,4 milionojn), en kiu aperis la Gina – raporto, nome sin turnas al la plej malsupraj kaj malsupra – mezotavoloj, kies interesiĝo pri la mondo de la „superaj dekmiloj" precipe facile vekiĝas. Por konsumanto de la tielnomita ĉielarko – aŭ Soraya – gazetaro (interalie: „Neue Post" – eld. 1,7 milionojn; „Neue Welt" – eld. 1 milionon; „7 Tage" – eld. 556 000) inter idealmondo kaj realo estas abismo: unuflanke Fabiola, Beatrix kaj Claus, Jackie Onassis, Nelson Rockefeller – aliflanke la pavimisto Manfred Szmania, kiu murdis dekdujaran knabinon kaj kiu nur pro ekzotika nomo kaj sia krimo superas la tristan mondon de la malsupraj tavoloj („Neue Post" – 9/69). El la sfero de la legantoj nur malmulte raportindas. Ĉefe pri danĝeraj malsanoj kaj bestecaj krimagoj tie paroliĝas, miksita per guto da sentimentaleco („Ŝafista hundo savas infanon"). Krimuloj, malsanuloj je kancero kaj malesperintoj ĉiam devenas el la propra tavolo de la legantoj – kontraŭe sanuloj, feliĉuloj, bonuloj kaj beluloj ĉiam troviĝas super la ses-cifera enspezolimo.

Kial tiu ĉi establo de revo – kaj ŝajnomondo akceptiĝas senproteste kaj kial ĝi stereotipe ripetiĝas en la plejmulto de ilustritaj gazetoj? La psikologo d-ro Haŭ juĝas jene: „Sociala iluziigo nur tiam eblas... (kiam) esencaj flankoj kaj bezonoj de personeco subpremiĝas kaj teniĝas en „neplenaĝeco"; per tio infektebla por iluziiga kontentiĝo kaj ne tuŝebla por aŭtonoma maturiĝo. Neelvivanta vivo postulas pri iluzioj cele al ŝajnkontentiĝo ĝismanie, ja ĝis memdetruo."

La disvastiĝintan „Mi"-malforton kaj la infekteblecon por neŭrozaj reagoj en la hodiaŭa medio amuzindustrio kaj poramasaj medioj eluzas. Kie ili sukcesas, tie ili ekspluatas la misojn de tiu ĉi burĝa socio. Ili vivas, nutriĝante per forĵetaĵoj el la socia procedo: Per distriĝemo, sensaciemo, per malaltvaloraj sentoj, senreviĝoj, timo, agresemo. Ili vivas per tio kaj ili prezentas iliaspecan terapion – sed terapion, kiu ne sanigas la pacienton, sed transformas ties malsanon al utiliga malaltvaloro de misformita socio.

Socia sistemo, en kiu unuopulo estas malhelpita memstare agi, ne nur devas starigi iluziigan mondon. Por ke ne okazu ekkompreno de la propra situacio, devas okazi deflankigo for de la realeco en la klasosocio. Tio nur povas sukcesi, kiam la nesaturita „drameca bezono" (Mitscherlich) de moderna homo estas direktita al surogataj aferoj. Rigardi kaj revi ne sufiĉas, ie la emo al aktiveco devas praktikiĝi. Kaj kiam la kapitalisme organizita socio unuflanke la dependantojn de salajroj ekskluzivas de vera kundecido kaj kunresponso, tiam ĝi aliflanke tro volonte malfermas al ili la pordegojn por la sfero de konsumado.



Ĉiam pli da homoj konsciiĝas pri tio, ke la manipulita gazetaro, notinde tiu de Springer, estas unu el la plej gravaj malamikoj de la spirita libereco. Protestdemonstracio kontraŭ la gazetarkonzerno Springer (Okcid. Berlino)

Foto: Verlag Zeit im Bild

Politiko kiel kuireja klaĉaĵo

En mondo de iluzioj kaj ŝajnkontentiĝoj politika konscio apenaŭ disponas pri spaco. Fakte la malmulto, kiu aperas pri politikaj temoj en ilustritaj gazetoj, estas tre stranga. Titoloj tion aludas: „Nun Willy denove rakontas spritaĵojn". („Willy Brandt refreŝiĝis en Nigra Arbaro de sia pleŭrito" – „Neue Revue" 7/69) „Infana festaĵo ĉe Kennedy-oj" („Bunte", 24/69) „Kiel Patricia Nixon influis sian edzon" („Jasmin" – 23/68) „Ĉu vi ŝatus esti sinjorino Strauß?" („Jasmin" – 22/68). Tiaj titoloj ordinaras. Kiam ilustritaj revuoj okupiĝas pri politiko, tiam preskaŭ ĉiam naskiĝas klaĉaĵo. „Quick lin vizitas hejme" (Ehmke): „La ministro ne sin ĝenas surstrate ludi kun siaj infanoj Sabine, Cornelia kaj Peter futbalon" (17/69). „Sub la suda suno Franz Josef Strauß pasigas siajn lastajn feriojn antaŭ la balotoj" ... „Post la unua naĝado ĉirkaŭ la naŭa bulkoj kun mielo". La tuta familio Strauß „trinkas kafon" („Neue Revue" – 33/69). Oni povas esti feliĉa, kiam krom tiaj tre signifaj informoj el „politikaj" kontribuoj fontas ankoraŭ aliaj aferoj. Ekzemple el raporto de „Quick" (17/69 – eld. 1,8 milionojn): „La plej granda skandalo en la loĝeja konstruado". La titolo multon promesas kaj atendigas ke ĝi escepte ne temas pri mastruma kaj kuireja klaĉaĵoj. Sed ĝuste tiu kontribuaĵo estas ekzemplo por ĵurnalismo, kies profitemo estas giganta, sed kies respondeco kaj nivelo egalas al nulo. „Skandalo en loĝeja konstruado" estas nenio alia ol la misago de du krimuloj, de la miliontrompisto Alfons Hofbauer kaj Hans-Joachim Maier. Ili aĉetis malnovajn domojn kaj elĵetis la luintojn. Poste ili fivendis la domaĉojn kontraŭ senlime altaj prezoj kiel proprietajloĝejojn kaj ne nur iom transiris la kutimon marĉandi: ili pertrompis per falsigitaj certifikatoj en konsiderinda alteco hipotekojn. Nun ili estas enkarcerigitaj: por la legantoj de „Quick" la porpekaj kaproj de la loĝeja mizero. Neniu linio ĉi tie eluziĝas por heligi la fonon de tiu ĉi skandalo. Neniu vorto pri la ĉie reganta uzuro, neniu vorto pri la suspektema „libereco" de la loĝeja merkato, la mizero de la „blankaj" kaj „grizaj" cirkloj: Kontraŭe du fiaj buboj, du timigiloj, al kiuj oni povas fingromontri. La fone staranta problemo, la socia situacio, el kiu fine devenis la trompo de Hofbauer kaj Maier, prefere ne tuŝiĝas.

Traktante politikajn aŭ sociajn temojn, ĉie en ilustritaj gazetoj montriĝas sama sistemo: faktoj estas elprenitaj kaj izolitaj el sia kunteksto. Apudaĵoj pleje akcentiĝas dum esencaĵoj apenaŭ rimarkiĝas inter la linioj.

Por malnecesigi la pensadon oni individuigas problemojn, strukturojn kaj abstraktaĵojn. Nur kio povas esti adaptita al denominatoro de individua biografio, rajtas aperi en ilustrita gazeto. Estas klare, ke tial vico da esencaj temoj neniam traktiĝas, temoj kiuj ne taŭgas por individuigo. Sendube tiaspeca individuiga kaj privatiga formo de politikaj temoj respondas al bezono, kiu koincidas kun la anonima karaktero de nia (tio estas la burĝa – la red.) socio. Personaj potencrilatoj ŝanĝiĝis al instituciaj rilatoj kaj socia potencpraktikado transformiĝis al nur malfacile transvidebla arkitekturo de institucioj, malantaŭ kiuj kaŝiĝas la aŭtoritateco de oligarkioj.

Sed ĝuste tial devus en la moderna industrisocio kontinue esti instruata kapableco pensi politike kaj ne nur private – punktforme, sisteme kaj komplekse kaj ne nur izole. Sed tiucele oni devas transdoni ĉiam denove „basic facts and figures", bazajn faktorojn de la historio kaj ekonomio. Ke tio ne okazas en ilustritaj gazetoj pruvas, ke tiu ĉi gazetaro absolute ne interesiĝas pri klerigado kaj helpo al orientiĝo.

(El „bulletin des Fränkischen Kreises", Okt. 1970, trad. Dr. Eichhorn)

Pacdefendantoj – estu gardemaj!

Apenaŭ la pafoj kontraŭ soveta soldato en Okcidenta Berlino estas pasintaj, apenaŭ ankaŭ la kriaĉado de neofaŝistoj en Würzburg (Vircburg) kaj la masivaj minacoj fare de la t.n. Aktivaga Rezistorganizaĵo (t.e. unuiĝo de porkapitalismaj ŝovinistoj kaj laŭdire patriotaj revenĝistoj), – jam denove militinstigantaj krimuloj en Germana Federacia Respubliko faris atencon kontraŭ interpopola kompreniĝo:

Memoriga tabulo sur dommuro en Munkeno, honore al W. I. Lenin, inaŭgurita antaŭ du jaroj fare de ambasadoro Zarapkin, ambasadoro de Sovetunio por GFR, estas detruita per eksplodaĵo.

La kontraŭuloj de la Traktatoj inter GFR kun Sovetunio kaj Pollando per sinsekva plialtigo de siaj krimaj metodoj provas detrui la ĝermojn de kunekzistado kaj kunoperaciado inter GFR kun ties orientaj najbarlandoj.

Ĉiu porpaca esperantisto germanfederacia (kaj kiu esperantisto ne estus porpaca?) kaj emfaze protestu kaj urĝe avertu kontraŭ le eterne hieraŭaj samtempuloj. Ni nek rajtas nek volas silenti. La plimulto el la loĝantaro de nia lando, t.e. la laborantaj, ne permesos novan teruran militon por kapitalismaj interesoj. Ĉiu el ni tutcerte kaj volontege donos obolon por restaŭrigo de la malkuraĝe dum nokto detruita Memoriga Tabulo.

Cetere: Kvazaŭ simbole restis nedetruita la reliefo de Lenin, supre de la Memoriga Tabulo. Efektive Lenin vivadas en la koroj de milionoj da homoj, – nedetruebla pacpioniro.

Albrecht Metzkes, peranto de MEM, GFR Decembro 1970 – CR –

TIEL ESTIS!

Al mi ŝajnis, ke ili ludis . . .

Mi certe iom malfruis sendi mian respondon al la enketoalvoko, presita en „Paco" 187/188 (junio–julio 1969 – eldono de GDR), tamen ne sendi tiun respondon tute mi opinias neebla.

Mi bone scias kiom da malfeliĉoj kaŭzis al la mondo Germanio. Ĝi lanĉis la unuan mondmiliton, kies rezulto estis pereo kaj kripligo de multaj milionoj da homoj. Ĝi komencis la duan mondmiliton, la plej kruelan en la historio de la homaro, rezulte de kiu estis ekstermitaj dekoj da milionoj de homvivoj, bruligitaj miloj da vilaĝoj, detruitaj centoj da urboj, orfigita sennombra kvanto da familioj.
Pri la unua mondmilito mi scias el lernolibroj pri historio.
Pri la dua mi havas personajn impresojn . . .
Por mi ĝi komenciĝis, kiam la hitlerista Germanio surprize atakis mian Patrolandon – la pacaman Union de Sovetaj Socialismaj Respublikoj.
Mi estis tiam sesjara knabo.
Ĉar ni loĝis tiam proksime de la limo oni evakuis nin al pli malproksimaj de la fronto regionoj. En la vagonaro estis nur nelaborkapablaj membroj de familioj kaj infanoj el infanĝardenoj.
Ni veturis longajn tagojn kaj noktojn. Ni estis jam malproksime de la limo, kiam germanaj aviadiloj ekvidis nian trajnon kaj atakis ĝin. Unu el bomboj trafis la trajnon, ĝi ekbrulis kaj haltis. El la vagonoj komencis elsalti etaj 5–6 jaraj geknaboj el infanĝardenoj, ne pli grandaj ol mi. Kaj tiuj, kiuj sidis en la metalaj rabobirdoj, eksemis kuglojn kontraŭ tiujn infanojn.
Mi vidis kiel faladis la etuloj, senbrue, kiel serpe tranĉitaj kreskaĵoj.
Mi estis tiam tre juna. Al mi ŝajnis ke ili ludis.
Mi vidis, kiel falis teren juna virino, sur kies brakoj sin trovis suĉinfano. La suĉinfano kun ploro ekrampis sur la patrina brusto, kvazaŭ serĉante ion, – kaj la patrino silentis.
Mi estis ankoraŭ tro juna. Por mi tio ŝajnis ludo.
Nia trajno forbrulis. Survoje restis nur kripligitaj reloj kaj feraj vagonkadroj.
Mia lama maljuna avino kaj mi restis inter tiuj, kiuj eskapis la pereon. Kaj ŝi eklamis, trenante min, laŭ longaj polvaj vojoj, de vilaĝo al vilaĝo, de urbo al urbo, petante almozon ĉe homoj, kiuj jam fordonis ĉion por la fronto, por la venko.
Multon mi vidis dum tiuj senfinaj vagadoj: kaj bruligitajn vilaĝojn, kaj dispecigitajn homojn, kaj ĝisoste magriĝintajn pro malsato homsimilajn estaĵojn, kaj homojn ŝvelintajn pro la sama senkompata malsato, kiuj mortadis starante. Kaj tiuj mortantaj pro malsatego homoj regalis nin, almozulojn sendomajn, per tio kion ili mem havis ĉemane, – per lasta hunda aŭ kata skeleto, aŭ per hazarde kaptita rato, aŭ per elfositaj ie nemanĝeblaj kreskaĵradikoj.
Kaj dum tiuj vagadoj mi bone komprenis, ke ĉio ĉi ne estis ludo. Mi komprenis, ĉar estinte sesjara knabo mi ne plu estis infano.
Bonaj homoj helpis al ni, donis azilon, flegis nin, kaj elŝiris el la kaptemaj ungoj de la morto.
Post la milito ni trovis mian patrinon, la filinon de mia avino. Ni eksciis, ke dum la milito pereis mia patro kaj du onkloj.
Kaj nia urbo estis preskaŭ tute detruita kiel multaj aliaj urboj.
Kaj ĉion tion kaŭzis Germanio.
Post la liberigo de nia urbo mi vidis germanojn-militkaptitojn. Ili estis restarigantaj la detruitajn de ili mem domojn.
Oni ne murdaĉis ilin en koncentrejoj kiel sovaĝajn bestojn. Ili havis manĝaĵon, kiun ne havis ni. Ili havis netruitan veston, kian ne havis ni. Ili ne dormis sub la ĉielo, dum ne ĉiuj el ni havis taŭgan ŝirmilon super niaj kapoj. Poste ili ĉiuj revenis al siaj hejmoj.
Tia estis nia pago por ĉiuj krimoj, faritaj de tiuj germanoj.
Post tiu tempo pasis kvaronjarcento.
Antaŭ dudek jaroj naskiĝis nova Germanio – Germana Demokratia Respubliko. Ĝia politiko baziĝas sur tute alia fundamento. Ĝi baziĝas sur humanaj, porpacaj ideoj. Nova Germanio staras en la vico de la plej fidelaj amikoj de nia lando, ĝi konstruas novan vivon, liberan de la sangavida pesto – faŝismo. Ĝia celo estas feliĉo de sia popolo, frateco kun ĉiuj pacamaj landoj, amikeco kun ĉiuj popoloj. Ĝia celo estas eterna Paco sur nia multe suferinta planedo. Kaj ĝi faras ĉion eblan por ke neniam plu ripetiĝu io simila.
Ekzistas ankaŭ alia Germanio, kiu fieras pri sia militema „famo" – Germana Federacia Respubliko, kiu pretendas esti la sola reprezentanto de la germana popolo. Ĝi ne povas toleri la ekziston de la Germana Demokratia Respubliko kaj ne agnoskas ĝin. Ne agnoskas, ĉar GDR faras ĉion eblan por ekstermi militojn, hombuĉadon, perforton. Ili preferas Germanion brunan.
Tamen malgraŭ ĉiuj iliaj preferoj la nova Germanio ekzistas, ĝi staras en la unuaj vicoj de la batalantoj kontraŭ faŝismo, imperiismo, agreso, kaj milito, ĉar ĝi ne povas toleri, kiam iuj transoceanaj murdistoj buĉas homojn en Vjetnamio, kiam iuj sovaĝaj ŝovinistojsionistoj verŝas sangon de arabaj popoloj en la forrabitaj arabaj teritorioj, kiam sangavidaj faŝistaj kaj rasistaj reĝistaroj suĉas sangon el propraj popoloj. Kaj samtempe ĝi konstruas novan vivon bazitan je paco kaj kunlaborado kun ĉiuj progresemaj landoj.
Mi tutkore gratulas miajn germanajn amikojn kaj deziras al ilia lando – Germana Demokratia Respubliko – pluan ekonomian kaj kulturan evoluon, plurajn sukcesojn en la konstruado de la nova socia vivo, plenan venkon en la batalo por Paco en la tuta mondo.

Vladimir Samodaj, Moskvo



Inspiroj al atenco

En la nokto de la 7-a novembro 1970 plenumis la okcidentberlinano Ekkehard Weil teroran atencon kontraŭ la soveta honora monumento sur la tereno de Tiergarten kaj paffaligis sovetan postensoldaton. En la juĝkunsidoj montriĝis kun granda klareco, ke Weil havis inspirintojn kaj estis implikita en tuta reto de ekstremdekstraj organizaĵoj. Li mem konfesis esti ne la sola atencinto. Li ne estis „freneza unuopulo", kiel malgravigante prezentis tion la reganta urbestro de Okcidentberlino, Schütz. La adopta patro de Weil, Günter Horn, kaj

TIEL DENOVE ESTAS!

lia frato, Wilhelm Weil, akorde, kiel atestantoj, esprimis, ke Ekkehard Weil jam depost jaroj gloras ekstremdekstran idearon. Kiel tio povis okazi? Weil apartenis al la novnazia terora organizaĵo „Germana Junulara Ligo", plenumanta depost la fondiĝo, okazinta la 1-an de majo 1969, regule militajn ekzercojn. Aktivante en tiu ĉi organizaĵo, li trovis kontakton kun la „Juna Unio" de la okcidentberlina CDU. Kaj finfine kune kun kompaniulo li estis surprizita en arbaro Grunewald dum pafekzercoj. Sed la polico entreprenis nenion kontraŭ li. Pro „mankoj de indicoj" oni ĉesigis la proceduron.
Tiel okazis, ke Weil kaj liaj kompaniuloj povis daŭrigi sian agadon sen iuj ajn malhelpo, ke ili neniel estis malhelpataj en siaj preparoj por siaj atencaj planoj.

Same kiel dum la „Tria Regno"! „pendigu la perfidulojn" (oni celas la realisme pensantajn fortojn en la Federacia Resp. de Germanio). La agado „W" (Widerstand = rezisto) estas elformiĝanta potenca dekstra kartelo kun forte faŝimaj kaj ŝovinismaj trajtoj. La registaro nenion entreprenas . . .

Foto: Zentralbild

La „Germana Junulara Ligo" protektis kaj subtenis ilin. Sed tiu ĉi junulara ligo ne estas la sola revenĝista kaj militarista organizaĵo en Okcidentberlino. Pli ol 100 da ili ekzistas. El publicaĵoj evidentiĝas, ke al la plej grandaj organizajoj en Okcidentberlino apartenas la regionaj ligoj de la tiel nomataj samregionaroj. Ili estas unuigitaj en la regiona ligo de la forpelitoj. Kaj la okcidentgermana gazetmonopolisto Springer, preskaŭ plene reganta la okcidentberlinan gazetmerkaton, sentas sin ligata kaj devontigata al tiuj ĉi revenĝistoj. La 5-an de septembro 1970, antaŭ la forumo de gvidantaj reprezentantoj el la centra revenĝista ligo „Ligo de la Forpelitoj", Springer laŭdis en Okcidentberlino la agojn de la Bonna Dekstrokartelo kontraŭ la malstreĉo en Europo kaj fortege atakis la postmilitajn limojn en Eŭropo. Laŭparole li diris pri la soveta okcidentgermana kontrakto: „Mi ne povas kompreni, kial tiu ĉi paperaĵo certigas pli da sekureco". Kaj – laŭ la paroloj de la frato Wilhelm – Ekkehard Weil decidis „entrepreni ion" post la ratifo de la kontrakto. Sed la dekstra ekstremismo ne nur estas trovebla en la revenĝistaj organizaĵoj. Depost marto 1969 la novnazia NDP (Nacia Demokrata Partio) aktivigas sian penadon enpenetri en la senatan oficaparaton, en la magistratajn domojn, en la justicon kaj la policon. Interne de la okcidentberlina polico estas fonditaj NDP-ĉeloj. Ekzistas intensa kunlaboro kun la libervola polica rezervo, civitanmilita trupo de la senatoro por internaj aferoj, Neubauer. En somero 1970 estis fondita „Nacia Centro" fare de novnaziaj organizajoj kaj personoj. Laŭ propra deklaro ĝi estas malfermata „por ĉiuj, kiuj sentas sin apartenantaj al la nova dekstrularo" kaj „kiuj estas sufiĉe agresivaj por havi sukcesojn". Ĉiuskolaj militaristoj unuiĝas en Okcidentberlino en pli ol 74 soldataj kaj tradicaj ligoj, plejparte organizataj surbaze de novnaziismo. Menciindaj estas la „Ŝtalkasko-Ligo de la frontsoldatoj", la „Kyffhäuserligo" (par. Kifhojserligo) datoj de la armita SS, aganta sur bazo de kaj la HIAG, la tielnomata" helpa ligo por soldatoj de la armita SS, aganta sur bazo de reciproka utilo". Tio estas la unuiĝo, en kiu kolektiĝas la plej krimaj individuoj: SS-murdistoj, gestapoekzekutistoj kaj koncentrejaj kontrolistoj.
Sed tio ne sufiĉas. En ĉiuj okcidentberlinaj distriktoj jam kelkajn jarojn ekzistas lokaj grupoj de la „Ligo de germanaj soldatoj". Ĝi konsistas el la „Ligo de iamaj germanaj paraŝutistoj", la „Unio de la ordenportantoj de la kavalira kruco de fera kruco" kaj el similaj asocioj, kies nomo jam evidentigas, kia spirito regas iliajn membrojn.

Potsdama deklaracio

Politikaj principoj por la traktado de Germanio

„. . . Ĉiuj naziaj leĝoj, liverintaj la fundamenton por la Hitlera reĝimo aŭ kaŭzinta kompromiton pro la raso, religio aŭ politika konvinko, devas esti nuligotaj. Neniu tia diskriminacio, nek jura nek administra aŭ iumaniera estos tolerata . . .
La eduka sistemo en Germanio tiamaniere devas esti kontrolota, ke la naziaj kaj militaristaj doktrinoj radikale estas eliminotaj kaj ebliĝos sukcesplena evoluado de la demokrataj ideoj . . ."

Artikolo 6, paragrafo 5 el la konstitucio de G.D.R.:

„Militarista kaj revenĝista propagando en ĉiu formo, militagitado kaj esprimo de religia, rasa kaj fremdpopola malamo estas punataj kiel krimoj."

Cetere estas tre informive, ke en Okcidentberlino du tagojn post la krima atenco kontraŭ la honora posteno ĉe la honora soveta monumento en la distrikto Tiergarten diversaj revenĝistaj junularaj organizaĵoj povis unuiĝi sub la nomo de „Naci-Revolucia Junularo". Al ili ankaŭ apartenas la „Ligo de junularo fidela al gepatraj regionoj" kaj la novnazia organizaĵo „Junaj Naciaj Demokratoj". Tio okazas publike antaŭ la okuloj de la okcidentberlina senato. Ĝis la hodiaŭa tago ĝi nenion entreprenis kontraŭ la revenĝistaj organizaĵoj, kontraŭ la militaristaj kaj tradiciaj ligoj, kontraŭ la novnazioj.
Ĝis la hodiaŭa tago ĝi ne eliminigis el la vicoj de la subordigita polico tiujn, kiuj pruveble estas membroj de tiaj organizaĵoj, kaj kiuj ankaŭ ebligis la skandalan rifuĝoprovon de la atencinto Weil.
Tia sinteno pli kaj pli provokas la proteston de ĉiuj demokrataj fortoj en Okcidentberlino kaj en la tutmonda publiko, kiuj postulas la tujan malpermeson de NDP kaj ĉiuj organizaĵoj, spirite proksimaj al ĝi. Nur per tio eblas malhelpi efike al tiaj faŝistaj provokatoroj realigi siajn krimajn planojn.

(El „Panorama DDR" Trad. Harry Dost)

Lammerding

(fino kaj sekvo)

„La enterigo de l'*generalo SS Lammerding* estis transformita de la malnovaj SS-oj en antifrancan manifestacion", skribis en Germana Federacia Respubliko „die Tat", revuo de la Asocio de l'germanaj viktimoj de naziismo. Ho ve ĝi estas preskaŭ sola por bedaŭri tion, en GFR . . .

Post la morto de Lammerding restas ankoraŭ 600 militkrimuloj en Federacia Respubliko el kiuj 10 estis normale kondamnitaj je morto per francaj tribunaloj, kiuj tute ne faris decidon en la febro de la Liberigo, sed 9 aŭ 10 jarojn poste, post bona pripensado. Se vi konigas tiun-ĉi novaĵon el Germanio, ne forgesu aldiri: federacia. Nazia militkrimulo, hitlera mortigisto, bruligisto de Judoj, povas trankvile vivi nur en unu Germanio.

. . . Iuj kalumniantoj de socialismo ekprovu „klarigi" kial ĝuste la kapitalista Germanio protektas la murdistojn hereditajn el la antaŭa reĝimo!

Molinari, per kies ordonoj estis masakritaj 106 makisanoj de la Ardenoj, postvivas ekde 20 jaroj sian mortkondamnon. *Rudolf Muehler, komandanto SS,* kiu severis en Marsejlo estas trinkaĵnegocisto en Mannheim. *La ĉefo de la Gestapo en Metz* (Mes), *komandanto SS Johann Schmidt,* povas kartludi en Munkeno kun *Anton Danckers, generalo SS.* En Oldenburg ripozas *Georg Hempen* kaj en Bad Homburg ripozas *Johann Hirschbiegel,* kiu mortpafigis francajn fervojistojn – kaj ekde 17 jaroj la *gestapisto* de Tuluzo, *Karl Mueller,* sufokiĝas pro rido kiam oni rememorigas lin, ke en Bordozo li estis kondamnita je morto.

Ĉu tiu ĝeneraligita senpuneco en unu germana ŝtato kaj ne en la alia havas nenian signifon?

Tamen mi volus speciale altiri le atenton de *iuj* el miaj kontraŭdirantoj al du el tiuj mortkondamnitoj: la *subkolonelo SS Kurt Lischka,* prokuristo en Kolonjo, la *komandanto Herbert Hagen,* loĝanta en Dinslaken, Vestfalio. Ambaŭ estis la kunlaborantoj de Eichman, la ĉefekzekutisto de l'Judoj, liaj helpantoj, en Parizo.

Kiaj krioj de indigno leviĝus el la israela registaro . . . se tiuj krimuloj vivus en Leningrado *kaj se tie oni ne procesus ilin!*

A. Wurmser, L'Humanité (Parizo) 22/1/1971. Mallongigita traduko de W. G.



Furora libro en FRG: „Adolf Hitler kaj lia movado" kaj similaj titoloj amase aperas pri la brunpesta regno. Ilin eldonas tute libere diversaj eldonejoj, inter ili la iama SS-ĉefsturmgvidanto Waldemar Schütz, hodiaŭ membro de la prezidio de neofaŝima NPD.

Foto: Zentralbild

P.S. – La aŭtoro kompreneble ankaŭ sin turnas al la franca registaro, kiu povus esti iom pli . . . postulema!

La kontribuo de Germana Demokratia Respubliko (DDR) al la denunco de la militkrimuloj estas substrekinda kaj envere ĉe la antipodo de la okcidentgermana sinteno. Aparte legindaj estas libroj kiel „Assassins en robe de juge" (Murdistoj en juĝa talaro) kaj „Livre brun" (Bruna libro). Ĵus aperis nova, kompletigita eldono de tiu lasta libro. Mi citas la franclingvajn eldonojn, sed certe ekzistas aliaj. Interesatoj sin turnu al nia sekcio, „centra laborrondo" en Berlino (Adreso trovebla sur ĉiu N° de PACO).

– C. R. –

Potsdama deklaracio

politikaj principoj pri Germanio

. . . La nacisocialista partio kun ĝiaj aliĝintaj societoj kaj suborganizoj estu ekstermotaj; ĉiuj nacisocialistaj oficejoj estu likvidotaj. Sekurecoj devas esti kreataj por malebligado de ilia reapero en iu ajn formo; ĉiu naciista kaj militarista agado kaj propagando devas esti malebligataj.

Ĉiuj membroj de nacisocialista partio, partoprenintaj pli ol nominale ĝian agadon, kaj ĉiuj aliaj personoj, malamike rilatantaj al la aliancaj celoj, estu forigotaj el la publikaj kaj duonpublikaj oficoj kaj de respondecaj pozicioj en gravaj privataj entreprenoj. Tiuj personoj devas esti anstataŭataj per personoj, ŝajnante kapablaj laŭ iliaj politikaj kaj moralaj ecoj, kunagi ĉe evoluado de efektive demokrataj institucioj . . ."

Ekonomiaj principoj pri Germanio

„Plej eble rapide la germana ekonomia vivo estu decentralizota alcelante la ekstermon de la ekzistanta troa koncentrado de ekonomia forto, prezentataj precipe per karteloj, sindikatoj, trustoj kaj aliaj monopolasocioj."

Artikolo 6, paragrafo 1 el la konstitucio de G.D.R.

„La Germana Demokrata Respubliko lojale al la interesoj de la germana popolo kaj la internacia promesdevigo de ĉiuj germanoj ekstermis sur ĝia teritorio la germanan militarismon kaj naziismon. Gi praktikas eksteran politikon, servante la pacon kaj socialismon, la popolinterkompreniĝon kaj la sekurecon."

Internacia Juro

La internacia juro
estas sistem'de sekuro,
kies valido tuj ĉesas,
kiam apliko necesas.

Paul Thorsen

LA REVO KAJ LA INKUBO

En tiu pariza avenuo apud la Radio-Domego, porelektraj gravaj laboroj fundoplugas la trotuarojn. Flaveta koto, delikata pluveto, preskaŭ ĉiuj viroj, kiuj servutas sur la fundo de la tranĉeoj estas elmigrintaj laboruloj. La enorma plimulto estas Nord-Afrikanoj.

Tute apude, en la montrofenestro de la librovendisto, reklamaj afiŝetoj de l'diversaj gazetoj. Tiele mi vidas ilin ĉiujn per la sama rigardo: La Alĝerianon, kiu manipulas sian ŝovelilon en la malvarmega nebulpluveto de Januaro. Kaj la mallogan titolon de „MINUTE" (1), el kiu ŝvitas malamo kaj malestimo: „For la Alĝerianoj!"

Tio, kion mi sentis je tiu legado, estas tiu sama kolero miksita kun abomeno, kiun mi sentis sub la nazia okupado, antaŭ la afiŝoj de la ekspozicioj antijudaj.

La sama furiozo antaŭ la samaj malnoblaĵoj. La sama volo detrui la saman rasismon. Antaŭ la monumenta hontindaĵo, la stultegeco de rasismo.

Faŝistoj preskaŭ senpentaj, nostalgiuloj de „franca" Alĝerio, „barudistoj" (2) de estinto por ĉiam elpasinta, ĉiujn pretekstojn ili uzas por provi traŭmi la publikan opinion. Hodiaŭ, la nafto (3). Morgaŭ, kio ajn.


La francaj laboristoj bone scias kiom utila estas la peniga laboro de la Alĝerianoj por la ekonomio de nia lando. Jam la sindikato CGT protestis kontraŭ la kampanjo orkestrata de „MINUTE". Protesto kiu neniam leviĝos sufiĉe alten.

Ĉar estas la pogromoj kaj la „ratonadoj" (4), la infera ciklo de rasismo, kiun volus revivigi la faŝistoj de „MINUTE". Iliaj revoj estas niaj inkuboj.

Martine MONOD
H-D. (Parizo) 24/1/1971. Trad. W. G.

(1) – Faŝista gazeto, kiu tute libere aperas en Francio.
(2) – Partoprenantoj en koloniaj militekspedicioj.
(3) – Kompreneble, la rasismo de „Minute" estas bazita sur la interesoj de la nafto-kompanioj en Alĝerio, i.a. . . . okaze de la traktadoj kun Alĝerio.
(4) – „Raton": Insulta kromnomo por Alĝerianoj. „Ratonado": militekspedicio, rastoperacio kontraŭ „ratonoj".

– CR –



La koncentreja insulo Jaros Foto: Zentralbild

La rolo de la greka kliko en la agresa plano de la usona imperiismo

„. . . La ricevitaj informoj montras, ke la usonaj imperiistoj volas maksimume ekspluati la sklaveman volon de la greka kliko. Lastatempe, superaj oficiroj de Usono ofte vizitis Greklandon. Antaŭ kelkaj tagoj, la komandanto de la suda regiono de NATO, admiralo Rivero, kaj la asistanto de la usona ŝtatsekretario pri defendo, Warren Nutter, vizitis Greklandon (Ateno).

Tuj post la vizito de Nutter, la usona registaro decidis rekomenci la liveradon de pezaj armiloj al la Atena reĝimo. La usona ŝtatsekretario pri eksterlandaj aferoj pravigis la liveradon de peza armilaro per la neceso plifortigi la grekajn armefortojn, por ke ili povu plenumi siajn devontigojn en la suda regiono de NATO.

Greklando – diris la deklaro de la usona ministro de eksterlandaj aferoj – cedis privilegiajn rajtojn al Atlantika Alianco kaj al Usono, kio estas tre grava por okcidento. La 6-a Floto utiligas la grekajn havenojn sen ia ajn malhelpo, kaj oni ofte renkontas usonajn maristojn sur la stratoj de la greka ĉefurbo.

Laŭ la atena gazetaro, fine de Oktobro eniros la rodon de Faleron 23 usonaj militŝipoj. Sed Pentagono ne kontentiĝas per tio-ĉi. Ĝi volas libere uzi la grekajn bazojn kaj aerodromojn, sen ia ajn limigo, kaj eventuale transformi ilin en loĝistikan bazon por la transportoj en Mediteraneo aŭ Mezoriento.

La vizito de la usona ministro pri defendo konsistigas novan ĉeneron por la ĉeno de preparadoj de Usono en orienta Mediteraneo kaj en araba oriento."

El „Courrier de la Paix", No 4 (30/II/70), eldonajo de Monda Packonsilantaro.
Trad. W. G. – C. R. –



Grafiko: Zentralbild

NEDERLANDO 1940
KAMBOĜO 1970

De Prof. Dr. Dr. h. c. Alfred Lemnitz

La sciigoj pri la krima atako je la neŭtrala lando Kamboĝo kaj pri la teruraj detruaĵoj, kiujn kaŭzis la usona fisoldataro en ĝiaj urboj kaj vilaĝoj, vekis en mi amarajn memorojn.
10-a de majo 1940 en Amsterdam. Brilante blua printempa tago. Obtuzaj eksplodoj ektimigis nin en la frumatenaj horoj. Ni vidis aviadilojn. Schiphol, la aerodromo de Amsterdam, estis bombita. La faŝisma Germanio estis atakinta la neŭtralan Nederlandon. La plej forta imperiisma militistaro superrulis la malgrandan landon. La nederlandaj taĉmentoj sin defendis heroe, sed ĉiu rezisto estis disbatita per la kruda potenco de plej modernaj armiloj. Rotterdam, facilatakebla urbo, konstruita sur fostoj, sen keloj, sen kontraŭbombaj ŝirmejoj, estis detruita sen kompato.
Kamboĝo 1970. En tiu neŭtrala lando la usonaj imperiistoj per tankoj kaj bomboj ripetas, kopias la saman krimon. Iliaj viktimoj estas kiel en Nederlando sendefendaj viroj, virinoj kaj infanoj. La sama krimo, la samaj respondeculoj kiel 1939 en Pollando, 1940 en Norvegio, Danlando, Nederlando kaj Francio: la plenumita je mondregema avido kapitalista imperiismo, la strebo al ekspansio kaj despoteco de la grandindustriestroj, grandbankestroj kaj militaristoj kiel en la siatempa Germanio tiel en la hodiaŭa Usono.

La imperiismo en siaj motivoj, celoj kaj metodoj estas ĉie la sama. La germana faŝismo, la germana grandkapitalistaro, junkroj kaj militaristoj strebis al la mondpotenco kaj malestimis ĉiujn ŝtatajn kaj homajn rajtojn por atingi sian celon, ekkomencis ekstermi tutajn popolojn. La usona imperiismo, la supermonopolaj kapitalistoj de Wallstreet, Detroit, Texas kaj siaj militaristoj volas konservi sian mondregadon, per kiu la popoloj de la duona mondo estas sklavigitaj.
Sed kion instruas la historio? La rajto de la popolo, la humaneco, la solidaro, la batalo por libero, sendependo kaj homeco estas pli fortaj ol la faŝisma, imperiisma barbareco. Ni estis tiam, antaŭ tridek jaroj, nur malgranda grupo da batalpretaj antifaŝismaj elmigrintoj, persekutitaj ankaŭ de la reakcia nederlanda registaro, sed subtenitaj per la solidaro de larĝaj tavoloj de la nederlanda loĝantaro el ĉiuspecaj sociaj rondoj. Pro la faŝisma subpremo niaj fortoj unuiĝis en la rezista batalo. La nederlanda laboristaro jam en februaro 1941 leviĝis al granda striko kontraŭ la elpeligo de la judoj.
Post la atako de la faŝismaj germanaj imperiistoj kontraŭ Sovetunio en ĉiuj landoj de la mondo ŝvelis la torento de la antifaŝista rezistada batalo kaj devigis la registarojn ankaŭ de la grandkapitalismaj landoj al batalo kontraŭ la siatempa tutmonda malamiko de la homaro, kontraŭ la germana faŝismo. Kaj ĝi estis disbatita.
Kiam ni, antaŭ tridek jaroj en Amsterdam, iris de domo al domo por kolekti subskribojn por la arestitoj de la faŝismaj ekzekutistoj, Ernst Thälmann, Rudolf Breitscheid, Lilo Hermann kaj la multaj aliaj kaj kolektis monon por la rezista batalo oni ofte demandis nin: ĉu tiuj subskriboj, ĉu tiu rezisto kontraŭ la superpotenca faŝismo estas efikaj, ĉu ili havas sencon? Certe, la subskriboj kaj la rezistado estis nesufiĉaj por savi Ernst Thälmann, Rudolf Breitscheid, Lilo Hermann kontraŭ iliaj murdistoj. Sed la apelacio al la solidaro, la antifaŝisma rezista batalo kaŭzis, ke el centoj da rezistbatalantoj fariĝis centmiloj kaj milionoj. La pacienca, ofer- kaj perdoriĉa peniga laboro por veki la konsciencon, ke la forto de la malfortuloj unuiĝinte kapablas venki la potenculojn, havis sian historian, revolucian efikon.
Kaj tio validas ankaŭ hodiaŭ. La usona imperiismo kaj siaj aliancanoj, al kiuj apartenas ankaŭ la okcidentgermanaj imperiistoj, la okcidentgermana grandkapitalistaro kun F. J. Strauß ĉekape, estos venkitaj per la solidaro kaj la antiimperiisma rezistado de la popoloj. Vjetnamio, Kamboĝo, Laoso posedas la subtenon de ĉiuj humanisme kaj porpace pensantaj kaj agantaj homoj ankaŭ en la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Nordameriko. Tiu konstante kreskanta potenco devigos ankaŭ la usonajn imperiistojn ĉesigi sian sangan verkon kaj malaperi kovrita per malhonoro.

(Trad.: L. Knöschke el „Berliner Brief" 10/70)



Grafiko: Zentralbild

De usonaj aviadiloj detruita kambodĝa urbo Suond.
Foto: Zentralbild



Pri la vjetnama romano „Hon Dat"

El letero de s-rino Hella Sauerbrey, Berlin

„Nur nevolonte mi komencis la legadon de tiu ĉi libro, ĉar ekde la dua mondmilito, kiam mia frato pafmortiĝis kaj mi travivis bombatakojn, mi ne povis toleri paroladojn aŭ priskribajojn de milito. Ili tro multe timigis kaj malkvietigis min. Sed manke de alia esperantlingva libro mi komencis legi kaj mi ne bedaŭras la decidon.

Tiu sudvjetnama romano de Anh Duk estas tiel altira kaj emociiga, ke mi ne povas ĉesi la legadon. En tute klara modesta maniero estas priskribitaj la homoj, la cirkonstancoj, la okazintajoj, naturo kaj pejzaĝo.

Oni devas estimi kaj ami la homojn, oni devas kompreni la cirkonstancojn kaj okazintajojn, oni povas imagi sin naturon kaj pejzaĝon. Sen fanfaroni estas rakontitaj la heroaj agoj de la Vjetkonganoj, do de viroj kaj virinoj, de infanoj kaj maljunuloj. Oni konatiĝas kun la vilaĝanoj de Hon Dat, precipe unu familio, sed ili staras por ĉiuj. Multaj incidentoj formas kiel mozaikŝtonoj la viglemovan bildon de vjetnama vivo.

Mi citas nur kelkajn:

Kuraĝa rezistado en profunda kaverno.
La voĉo de granda Patro kaj respektata Gvidanto „Onklo Ho". Junulo perdas brakon.
Patrina amo.
Nokta apudmara pejzaĝo.
Rememoroj al infaneco kaj geedza fideleco. Kruelaj atakoj – kuraĝaj rebatoj.
Danĝera entrepreno por ĉerpi akvon.
Fruktedona tero – pitoreskaj ĝardenoj . . . ktp.

Nun mi rigardas la tutan vjetnaman problemon en tuta alia formo kun t.n. aliaj okuloj. Kaj nun mi estas ankaŭ konvinkita, ke la ekstrema severa kaj heroa lukto de Sud-Vjetnamoj iutage finos sukcese.

Oni devas estimi ilin,
oni devas admiri ilin!
Ili meritas kompaton kaj solidarecon!

– CR –

CON SON –

Kaŭzo por ekscito

Con Son ekscitas la tutmondan publikon. 10 000 sudvjetnamaj viroj, virinoj kaj infanoj tie estas batataj kaj turmentataj de brutuloj en uniformoj de la US-armeo, kiuj ilin ŝtopegis en kraditajn cementkavojn, nomitajn cinike „tigrokaĝoj". Malhomaj gardistoj uzas ilin kiel klozeton kaj torturas la kaptitojn ĝismorte. Ili devas malsatadi, ĉar ili ricevas nur rizon miksitan kun gravelo. La koncentrejo-insulo estas la infero.

Kaj ĉi tio – kiel nun konatiĝis – al USA indas la elspezon de 442 000 dolaroj pojare. Tiun ĉi sumon pagas la Nixon-registaro al la Saigon-a kliko sole por la konstruado kaj konservado de koncentrejoj kaj prizonoj laŭ faŝistaj modeloj.

Con Son ne estas unusola ekzemplo. Ĉie en la mondo, kie la internacia monopolkapitalo konsideras siajn interesojn lezitaj, ĝi enscenigas terorigon. La spuro de la krimoj kondukas de USA, kie estas pafmortigataj la batalantoj pri civitanrajto, trans la teror-agoj de britaj trupoj kontraŭ la katolika minoritato en Belfast kaj trans la barbaraj invadoj en Laoso kaj Kambodĝo ĝis la eventoj en Con Son. Evidentiĝas, ke la SS de Hitler pluvivas. Ĝi vivas same en la gardistoj de Con Son kiel en la torturistoj de Rio kaj en la US-policistoj-studentmurdistoj.

Se oni en GDR pridemandas brigadestron aŭ ministron, laboristinon aŭ kuracistinon, oni aŭdas indignajn kaj klarajn vortojn de l'abomeno kontraŭ tiaj krimoj kaj ilia sistemo. La teruraj sciigoj el Con Son ankaŭ „La Mondo" en Hamburg ekscitis, sed ĝi ekscitiĝis aliel. Dum ĉiu ajn nedifekta konscienco rigardas Con Son kiel hontegon, la Springer-gazeto riproĉas la Saigon-reĝimon sole pro ne celkonforma uzo de USA-monoj. Tiu gazeto konsideras la usonan „prestiĝon" nur tuŝita pro la malkovro de tiuj ĉi tortur-truoj, sed ne pro la fakto, ke tie homoj estas bate kripligataj kaj ĝismorte turmentataj.

(El „Panorama DDR" Trad.: Wilfried Hofmann)

Siajn stelojn Hispani' etendas

Siajn stelojn Hispani' etendas
super la tranĉejo en la ter'
Sed l'aŭrono brilon jam eksendas,
baldaŭ vokos nin batalinfer'.
Patri' estus for,
sed ni per favor'
akiros liberon por vi – pacon!

Al faŝistoj cedos ni neniam
eĉ se kuglojn hajlas la fripon'.
Senkomparaj kamaradoj ĉiam
nur antaŭen celas sen pardon!

Refreno:

Jam tamburu! Bajonetatako!
Ek! Antaŭen, venko logas nun.
Por katenojn per la ruĝa flago,
al batal', la Thälmann-batalion!
Refreno:

Trad.: Ludwig Schödl
– CR –




Torturejo Con Son, Suda Vjetnamio, „tigra kaĝo" (1,5 × 2,7 metroj), kie la patriotoj estas plurope (tri aŭ kvar) kunpremitaj, nek medicine prizorgataj nek sufiĉe nutrataj. Kandidatoj de malrapida morto.

Foto: Zentralbild

Angela Davis

Ne pasas tago sen ke, antaŭ la okuloj de la tuta mondo, evidentiĝas la bonaj kaj la malbonaj agoj. Sur publika scenejo manifestiĝas kiu agas favore al la homo kaj kiu kontraŭ li misuzadas la ricevitan povon.
Pasinta estas la tempo kiam oni povis malbonagi sen esti observata, ĉu en Grekio ĉu en karcero de frankista Hispanio, ĉu en prizona ĉelo de San Raffael ĉu en Vjetnamio, en Suda Afriko aŭ kie ajn.
En la libro de la vivanta historio estas legeblaj la bonagoj faritaj por la homaro kaj por la rajto de la fortoj luktantaj por la socia progreso kaj la paco. Sed ankaŭ la malbonaj agoj estas neestingeble enskribitaj en ĝi. Estas notite kiu estas komplico de krimo kaj kiu estas ties malamiko, notite, kiu subtenis bonagon aŭ kiu obstaklas ĝin.
Ni nin adresas hodiaŭ al *Angela Davis* kaj al ŝiaj amikoj kaj kunuloj dirante: En tiu tago kiam ni ricevis la informon pri via aresto ni konsciis pri la danĝero kiu minacas vin. Ni ne dubis eĉ momenton pri la malamo, venĝemo kaj arogo kiu regas tiujn kiuj misuzos sian povon kontraŭ vi kaj via vivo.
Ekzistas jam tro da ekzemploj de arbitro kaj murdo de la klasa justeco de la posedantoj, de la partieca justeco de la imperiismo. Vi, Angela, konis la senrajtecon de viaj nigrahaŭtaj gefratoj, konis la geton kaj ĝian mizeron.
Via kuraĝo, juna, nigra virino, via konscio pri la marŝo de la historio faris el vi komunistinon kaj batalantinon por la civitanaj rajtoj.
Vi volis ke hela tago venu ankaŭ por la simplaj homoj en la riĉa Ameriko, por ke la homoj de via haŭta koloro ne restu la plej malriĉaj kaj la plej senrajtaj. Vi marŝis en la batalon por libero kaj demokratio, en batalon kontraŭ la usona imperiismo. Tio estas via ago eterne vivanta.
Ekde tiu tago kiam oni stigmatizis vin krimulino, ekde aŭdiĝis la unuaj protestkrioj kontraŭ la maljusteco uzata kontraŭ vi, ankaŭ en la Germana Demokratia Respubliko la voĉoj multobliĝis kiuj postulas vian savon, vian liberon. Lernantoj kaj profesoroj, laboristoj kaj politikistoj, filmartistoj, literaturistoj kaj ĵurnalistoj, kamparanoj kaj metiistoj transferis sur vin la solidarecon kiun ili sentas por la luktanta Vjetnamio, por ĉiuj enmizeriĝintoj. Ĉiu subskribo postulanta vian liberigon estis farita kun la arda deziro grandigi la pezon de la internaciaj protestoj. Ni sentas nin solidaraj kun la artistoj kaj sciencistoj de la Soveta Unio, kun la aŭtomobillaboristoj de Detroit, kun la scienculoj, kaj ankaŭ kun la infanoj, kiuj, edukitaj en nia lando por interpopola amikeco kaj amo por ĉiuj honestaj homoj, interrompis sian ludon por kolekti kun fervoro subskribojn en via favoro.
Ni adoptis vin kaj viajn amikojn en la varmo de niaj koroj. Vi estas kaj estos dorlotata per la sento de solidareco kaj amo de nia socialista komuneco kiu ignoras la rasan devenon kaj la haŭtan koloron. Sed kie oni atentas pri la sinteno kaj la strebo, kie oni nur demandas ĉu ago taŭgas aŭ ne por la popolo kaj por la paco de la popoloj.
Ni ne ĉesos postuli justecon por la batalantoj kiuj levas sian voĉon kontraŭ arbitro, rasa diskriminacio, subpremo kaj milito.



Dr. Angela Davis, usona negra docentino, batalantino por la samrajteco de la negroj en USONO, per falsigita konstruo akuzita pri murdo. La tuta mondo scias ŝin senkulpa kaj protestas.

Foto: Zentralbild



Rasismo

Minacas al blankaj sinjoroj insido kaj gluto en flamoj el faŭko, ĝis ili komprenas, ke homa kvalito ne havas rilaton al haŭto.

Paul Thorsen

Jen la vizaĝaĉo de la usona imperiismo: subpremado internen, agresado eksteren.


Fotomuntaĵo: Zentralbild

GDR - amiko kaj aliancano en la antiimperialista liberigbatalo

La rezulto de la jaro 1970 havas specialan signifon, rigardate de multaj vidpunktoj, por la liberiga batalo de la popoloj de Azio, Afriko kaj Sudameriko.
Unuflanke finiĝas jardeko, je ties komenco la afrikaj popoloj starigis la ege gravan postulon, definitive kaj senkondiĉe liberigi la kontinenton – ankoraŭ dum la vivepoko de ĉi tiu generacio.
Aliflanke la politikaj okazoj de ĉi-tiuj tagoj substrekas la aktualecon de tiu postulo. La daŭrigo de la imperialista agresema politiko en Vjetnamio, Laoso kaj Kamboĝo en la Proksima Oriento kaj fine ankaŭ en Afriko donas pro tio alarmigajn pruvojn. Vidante la imperialistajn provokojn, la batalantoj por libereco kaj sendependeco, scipovas tre klare estimi amikojn kaj kunbatalantojn.
GDR apartenas al la ŝtatoj, kiuj aliĝis senkondiĉe, senlime al la antiimperialista sendependiga batalo. Ĉi tiu politiko ne baziĝas sur tempolimigataj, taktikaj pripensoj, sed ĝi apartenas al la ĉefaj principoj de la socialista germana ŝtato kaj de ĉiuj landoj de la socialista ŝtatkomunumo. La registaro kaj la popolo de GDR akiris proprajn spertojn kaj sentis dum tio la solidarecon de aliaj popoloj batalantaj ankaŭ kontraŭ la imperialismo.
Aktuala pruvo de solidara interligo de GDR kun la afrikaj popoloj videbliĝis en Novembro 1970, kiam la de imperialistoj dungitaj fisoldatoj, sendataj per la portugalaj kolonialistoj kaj per la subteno de ĉiuj imperialistaj NATO-potencoj, malice surprizatakis la respublikon Guineo. En diversaj deklaracioj kaj klarigoj la registaro de GDR, kondamnis la imperialistan agreseman politikon kontraŭ la guinea popolo kaj taksis ĝin komplotatenco al ĉiuj nedependaj afrikaj ŝtatoj. Samtempe GDR, donis multajn varojn, por helpi al la viktimoj de la fiagreso.
La komuna batalo kontraŭ imperialismo, kolonialismo, kaj rasismo fortigas samtempe la reciprokan ligon kaj donas bonan bazon por la profundigo kaj la plivastigo de la rilatoj inter GDR kaj la sendependaj afrikaj ŝtatoj. Multaj landoj jam normaligis siajn interrilatojn al GDR.
Evidentiĝis, ke tiu demando intertempe fariĝis grava parto de la antiimperialista batalado kaj de la klopadado por malstreĝiĝo kaj internacia sekureco. Same kiel la imperialistoj ĉiam ree kaj ree provas malglori kaj kalumnii la reprezentantojn de la junaj naciaj ŝtatoj en la internacia areno, tiel ili ankaŭ celas al tio, degradi antiimperialistajn ŝtatojn, kiel ekzemple GDR per neegalrajtigaj rilatoj.
La alternativo al tio nur eblas esti amikeca antiimperialista ligo inter la nacie liberigitaj ŝtatoj kaj GDR al tio ankaŭ apartenas normalaj interŝtataj rilatoj surbaze de reciproka agnosko kaj egalrajta kunlaborado.

(El „Panorama DDR" Trad.: Ernst Diedrich)

Oleo-ŝarkoj flaras predon



Ĉu vi nun komprenas, kial USONO volas Sudazion „liberigi"?
Grafiko: Zentralbild

Mondeho – agnosko de GDR

Italio: 15 000 enloĝantoj de Firenco certigis per longdaŭra aplaŭdo, ĉe granddemonstracio, la neceson de popolrajta agnosko de GDR. Okaze de la gazetarfesto de la „Unita" en Firenco oni kolektis pli ol 14 000 subskribojn. Ankaŭ en Milano enlistigis sin 11 000 enloĝantoj, por la agnosko de GDR. Similaj agadoj okazis en Livorno, Genovo, Enna sur Sicilio kaj en Grosseto.
Norvegio: 200 norvegaj civitanoj skribe postulis, de ilia registaro, la diplomatian agnoskon de GDR.
Finlando: En la eŭropa junularkonferenco en Helsinki, ĉe kiu partoprenis 200 delegitoj de 100 diversaj organizoj, subtenis la plej multaj el la diskutparolantoj la postulon por diplomatia agnosko de GDR.
Danlando: En la kadro de la batalsemajno por la eksigo de Danlando el NATO, efektivigita de 15 partioj kaj organizoj, postulis la partoprenantoj de manifestacio en Kopenhago la agnoskon de GDR.
Belgio: La Mondasocio de la Liberala Junularo postulis ĉe la fermo de sia internacia kongreso en Belgio la agnoskon de GDR per ĉiuj ŝtatoj de la mondo. Analoga rezolucio estis prezentita de la junularaj organizoj de Skandinavio, Belgio kaj Finlando.
Kanado: La kanada sindikato Mine Hill postulis de la registaro de Kanado, la diplomatian agnoskon de GDR.

La proksimorienta problemo-historie

de Rudi Graetz

La artikoloj, kiujn mi skribis dum lastaj jaroj pri tiu ĉi temo, ne restis sen respondo. Inter la leteroj, kiujn mi ricevis, ankaŭ estis kelkaj, kiuj kontraŭis mian opinion. Ankaŭ en la publika MEM-kunveno dum la UK en Vieno 1970 montriĝis emociaj pasioj. Tie speciale israelaj esperantistoj montris starpunkton ne konforma al MEM. Do bedaŭrinde ankoraŭ ekzistas vico da miskomprenoj.

Tial mi nun ĉi tie deziras konstati kelkajn historiajn faktojn pri la problemo.

Ni GDR-esperantistoj tre bedaŭras la hitler-faŝismajn persekutojn de judoj kun siaj multegaj viktimoj kaj de patriotoj en ĉiuj de la germana imperiismo dum la dua mondmilito okupitaj landoj. Multaj el ni esperantistoj siatempe aktive rezistis la fiajojn de la germana faŝismo kaj inter la viktimoj de tiu ĉi rezista batalo ankaŭ estis konataj esperantistoj.

Studinte la historiajn faktojn, klare videblas, ke la problemo de Proksima Oriento ne estas rasa demando, sed klasa problemo. La cionismaj konceptoj de komenco enhavas agresemajn celojn, kiuj ne povas esti en la intereso nek de la juda nek de la araba laborularo en Israelio. Ili kondukis finfine al la nuna streĉita situacio en Proksima Oriento. Sed nur la konsento al politika solvo povos sekurigi konstantan pacon kaj certigatajn limojn kaj rajtojn por ĉiuj landoj tie.

Ni ekzemple scias, ke Palestinio estas historia teritorio en Antaŭa Azio. Ĝi hodiaŭ parte apartenas al Israelio, parte al Jordanio kaj etparte al Surio kaj UAR. Sed pluajn historiajn faktojn ni memorigu!

Depost la lastaj jardekoj de la 19a jarcento de la cionismo estis organizita la enmigrado de judaj kolonianoj el Orient- kaj Sudorienteŭropo al Palestinio en la intereso kaj per subvencio de judaj grandkapitalistaj rondoj (Rothschild), por pretekste fondi „nacian" hejmlandon por la juda popolo; la araba loĝantaro estis forpelita el Palestinio.

Depost marto 1918 Palestinio estis sub brita militista administrado, kaj depost la 25. 4. 1920 sub brita kolonia administrado en formo de mandato. Kontraŭ la pli fortigita juda enmigrado post 1920 okazis en la jaroj 1920/21 araba ribelo, kiu estis subpremita de la britaj militistoj.

En septembro 1922 de Palestinio estis departigita la parto, kiu ne devus aparteni al la juda ŝtato kaj kiel Transjordanio fariĝis memstara brita mandata teritorio. La malakcepto de la araba postulo, malpermesi la cionisman enmigradon, kondukis 1930/31 al la dua araba ribelo.

Kiam la Hitler-registaro komencis sian faŝisman regadon en Germanio, denove kreskis la juda enmigrado al Palestinio. 1936 la juda parto de la loĝantaro estis 31 %. La tria araba ribelo kontraŭ la brita imperiismo kaj la cionisma burĝaro okazis 1936. Kontraŭ ĝi fondiĝis cionisma teror-organizaĵoj, kiel Irgun Zwai Leumi kaj la Sterngrupo. (Stelgrupo) 1937 en brita plano „Peel Report" estis antaŭvidita la partigo de Palestinio inter judoj kaj araboj. Grandbritio partoprenis la nehomajn persekutojn de judoj, malhelpante dum la unuaj jaroj de la dua mondmilito la pluan judan enmigradon al Palestinio per barigaj decidoj. Ŝipoj kun judaj elmigrantoj, konataj kiel naĝintaj ĉerkoj, ne rajtis albordiĝi Palestinion.

En majo 1942 la cionisma konferenco en Nov-Yorko, regata de la usona-imperiismo, postulis la starigon de pure juda ŝtato Palestinio, la starigon de juda armeo kaj la senliman enmigradon de judoj. La kontrolo de la enmigrado okazu per la Jewish Agency. Depost 1943 pligrandiĝis la armita cionisma teroro kontraŭ la araba loĝantaro de Palestinio. La brita imperiismo incitis la latentan militsituacion inter ambaŭ gentoj. En novembro 1947 la plenkunsido de UN decidis la partigon de Palestinio en juda kaj araba ŝtatoj, kun Jerusalem kiel internacia enklavo. Je la 15. 5. 1948 finiĝis la brita mandato, la britaj trupoj retiriĝis kaj la ŝtato Israelio proklamiĝis.

Se ni nun paŝas en la lastan historion, ni scias:

La respubliko Israelio en la jaro 1959 havis grandecon de 20 244 kvadratkilometrojn kun 2 088 690 loĝantoj t.e. 103 po kvadratkilometro. 89 % el ili estis judoj, kiuj plejparte enmigris el ĉiuj partoj de la mondo. Depost 1948 okazis rapida kresko per tia enmigrado. Apud ili ekzistis 144 500 araboj, kies rajtoj forte estas tranĉitaj. La sekvo estis formigrado al najbaraj arabaj ŝtatoj.

Israelio estas agrokultura lando kun evoluita industrio por konsumproduktoj kaj plantejoj. La ekonomio vastskale estas direktata de eksterlanda, speciale usona kapitalo. En la industrio ĉefe regas monopoloj, krome kapitalismaj kooperativoj. La grundo, kiel grandposedo plej parte estas propraĵo de britaj kaj usonaj trustoj, kiuj farmigas ĝin al kapitalismaj agrokulturaj kooperativoj kaj unuopaj farmistoj.

Tiom bone. Sed ĉu ni ĉiam konscias, ke la Israela teritorio origine ampleksis nur 14 000 kvadrat-kilometrojn? Kiel okazis tiv ampleksiĝo?

La proklamiĝo de la ŝtato okazis fare de la cionisma burĝaro per subteno de la usona kaj brita imperiismo, antaŭ ĉio por formigi agreseman forton kontraŭ la araba liberiga movado kaj por la defendo de la imperiismaj oleo-interesoj en la Proksima Oriento. La rilatoj al la palestinaj araboj kaj al la ŝtatoj de la Araba Ligo, kiuj malakceptis la partigan

Jen „samrajta kunvivado". La araboj devas forlasi la agrese okupitajn teritoriojn kaj loĝas en provizoraj tendoj.

Foto: Zentralbild



decidon de la UN, pliakriĝis. Tial eksplodis la 15. 5. 1948 inter Israelio kaj la Ŝtatoj de la Araba Ligo (i.a. Egiptio, Irako) milito.
Tiu okazo estis utiligata de la cionisma burĝaro por kontraŭbatali la demokratan movadon, gviditan de la komunisma partio de Israelio (fondita 1948), por terorigi la arabajn loĝantojn kaj forpeli ilin el siaj loĝlokoj. Ĉirkaŭ 900 000 araboj devis forlasi sian patrion. La 17an de septembro estis murdita la UN-peranto por la Palestina-problemo, grafo Bernadotte. La unuaj elektoj al la konstituinta kunveno okazis la 25. 1. 1949. Per demagogaj rimedoj kaj financa subteno de Usono la burĝajcionismaj partioj gajnis la elektojn. Chaim Weizmann fariĝis la unua prezidanto de Israelio. Je la 11. 5. 1949 Israelio membriĝis al UN kiel 59a ŝtato.
Per perado de UN de marto ĝis julio 1949 estis interkonsentita batalhalto inter Israelio kaj la Ŝtatoj de la Araba Ligo. Rezulte de la milito Israelio fariĝis influsfero por la usona imperiismo. La reakcia feŭda reĝimo en Transjordanio sub reĝo Abdullah per konsento de Grandbritio kaj Usono formale anektis la teritorion okcidente de la rivero Jordano. *Per tio la fondiĝo de propra memstara araba ŝtato en Palestinio finfine estis malhelpata.* Per la rezulto de la palestina milito akrigis sin la rilatoj inter Israelio kaj la Arabaj Ŝtatoj, ĉar Israelio aneksis pluan teritorion de 6 700 kv.km. Jen la unua agreso.
1956 okazis la Suez-kanal-agreso. Israelio atakis je la 29. 10. 1956 Egiption. Jen la dua agreso. La sekvan tagon Francio kaj Grandbritio per siaj kontraŭ-voĉoj lamigis la UN-Sekurec-Konsilantaron. Post kelktaga bombado britaj kaj francaj militŝipoj albordiĝis ĉe Port Said. Komenco de novembro 1956 la UN-Plenkunsido postulis antaŭ ĉio la finigon de la bataloj kaj proponis UN-trupojn.
La decidema kondamno de la agreso per la mondopinio inter alie ankaŭ Hindio kaj Soveta Unio devigis retiriĝon de la britaj kaj francaj trupoj (22. 12. 56) kaj de la israelaj trupoj (7. 3. 1957) el Egiptio. La Suez-kanalo ree malfermiĝis je la 29. 3. 1957. La provo de la brita kaj franca imperiismo kaj de la cionisma burĝaro militakiri la Suez-kanalon per armila forteco, malsukcesis pro la decida sinteno de la egipta popolo kaj la mondpaca tendaro kun Soveta Unio ĉepinte.
Pri la atako de Israelio kontraŭ la Arabaj Ŝtatoj en la jaro 1967, (jen la tria agreso!) kiu daŭras ĝis hodiaŭ, ni ĉiuj scias. Unu el la celoj estis kaj estas la forigo de la progresemaj reĝimoj en UAR kaj en la Suria Araba Respubliko. Do ne rasa demando sed klasa celo de la israela cionisma burĝaro kaj ankaŭ de certaj regantaj fortoj en imperiismaj landoj ĉi-tie ludas la ĉefrolon. Ne havas sencon tion kaŝi kaj rakonti al la mondo fabelojn.
Se ankaŭ israela kaj usona imperiisma propagando provas nebuligi la verajn kaŭzojn de la situacio en Proksima Oriento, tio ne povas ŝanĝi la faktojn, ke vere okazis agreso flanke de Israelio. Tiun ĉi fakton ankaŭ konstatis UN- postulante la retiron de la israelaj trupoj el ĉiuj okupitaj arabaj teritorioj. Kvankam la UN-Sekurec-Konsilantaro tion jam postulas depost la jaro 1967 la nuntempe en Israelio regantaj fortoj kun subteno de Usono ĝis nun rifuzis tion kaj eĉ minacas pluan atakon per plej modernaj armiloj. Tio objektive ne estas en la intereso de la israela popolo kaj ne en la intereso de la paco en Mediteraneo.
Kio koncernas la Unuiĝintan Araban Respublikon, ĝi metis sur la tablon de la UN-Sekurec-Konsilantaro kompletan programon por la paco en Proksima Oriento.

La ses punktoj entenas:

Retiro de la israelaj armeoj el la okupitaj areoj;

Finigo de la israela ekspansia politiko;

Justeca solvo de la problemo de la palestinaj rifuĝintoj sur la fundamento de la UN-decidoj;

Finigo de la militsituacio kaj libereco por la ŝipveturado;

Honori la suverenecon, integriĝecon kaj sendependecon de ĉiu ŝtato interne de sekuraj kaj agnoskataj limoj;

Garantioj por la paco, la teritoria netuŝebleco kaj la politika sendependeco de ĉiu ŝtato en Proksima Oriento;

La Sekureca Konsilantaro povus transpreni la garantiojn.

Tio estas grandanima kaj konkreta programo, akceptebla ankaŭ por Israelio, se ĝi estas pacvolema.
Similan favoran kaj konstruktivan proponon faris UAR rilate al rapida remalfermiĝo de la Suez-kanalo post parta retiriĝo de la israelaj trupoj, sed ĝis nun la israela registaro ĉion rifuzis. Tamen ni pacamikoj esperu, ke la UN-misio de d-ro Jarring kondukos finfine al racio en Israelio kaj per tio al akcepteblaj rezultoj, devigante la agresinton al retiro. Konsiderante la juran situacion, la rajto kuŝas nedisputeble sur la flanko de la Arabaj Ŝtatoj, kiel pruvas la UN-decidoj kaj tial estas nekomprenebla, ke Israelio malakceptas realigi decidojn de UN.
Esperantistoj, de tiu ĉi reala vidpunkto, bonvolu pripensi ankoraŭfoje la situacion en Proksima Oriento, por eviti netaŭgajn emociajn agojn, kiuj ne helpos solvi la problemon, sekurigi veran kaj daŭran Pacon en Proksima Oriento en la intereso de la tuta homaro.

– CR –

Erich Kästner

La nokto de rompitaj vitroj

Veturinte la 10an de novembro 1938, matene je la 3a en taksio laŭlonge la Tauentzien-strato en Berlin, mi aŭdis ambaŭflanke de la strato tindadi vitron. Sonis, ol se estus renversataj dekduoj da vagonoj plenaj da vitro. Rigardante el la taksio, mi vidis, kiel dekstre kaj maldekstre, preskaŭ antaŭ ĉiu kvina domo, staris viro, detruanta per fortaj batoj per longa ferstango la montrofenestrojn. Farinte tion, li paŝis senĝene ĝis la venonta montrofenestro dediĉinta sin tie same per kvieta forto al la detruado de l'fenestroj.
Krom tiuj viroj, vestitaj per rajdistaj pantalonoj kaj civilaj jakoj, neniu videblis. La taksio enveturis la straton Kurfürstendamm. Ankaŭ ĉi tie en certaj distancoj staris viroj enbatantaj per longaj stangoj „judajn" montrofenestrojn. Ŝajnis, ke estis ilia tasko, trakti tiel kvin ĝis dek domojn. Kaskadoj da vitro faladis sur la straton. Sonis, ol se la urbo konsistus el tintanta vitro. Estis kvazaŭ veturo tra sonĝo de frenezulo.
Inter la Uhland- kaj Knesebeckstratoj mi ordonnis ordinaran krimon. La polico Apenaŭ mia dekstra piedo estis tuŝinta la teron, kiam ekaperis viro de malantaŭ la plej proksima arbo, dirante al mi mallaŭte, sed energie: *„Ne elaŭtiĝu, tuj daŭrigu la veturon!"* – Estis viro kun ĉapelo kaj mantelo. *„Permesu"*, mi diris: *„Ĉu ne estas permesate . . ."* – *„Ne"*, li interrompis min admone: *„Eliri estas malpermesite! For de ĉi tie!"* Li repuŝis min en la veturilon, signis al la ŝoforo, fermis krake la pordon kaj la ŝoforo obeis. Pluen ni veturis tra la nokto de la rompitaj vitroj. Proksime la Wilmersdorfer strato mi denove petis halton. Kaj ree civile vestita viro alproksimiĝis. *„Polico! Daŭrigu! Sed tuj!"*
Posttagmeze la gazetaro estis publikiginta, ke la bolanta popolanimo spontane mem agis, ne tolerante la paciencon, kiujn havis la ŝtatoj oficejoj kun la judaj vendejoj. Kio okazis? La registaro ordnonis ordinaran krimon. La polico gardis la komisiitajn krimulojn dum la fiagoj. Ili estus arestintaj ĉiun bonkoran urbanon, kiu estus havinta la volon, malhelpi la krimulojn. Kaj la venontan tagon la registaro mensogis, la krimo estis „surpriza agado de la popolo".
La aŭdita „ŝanĝo de ĉio" estis realigita. Ĉiokaze kaj milfoje. Kaj la ŝanĝo de la valoroj estis ekzercita laŭ la planita ŝanĝo de la homa kaj ŝtatana konscienco. Ŝtato vidis sian taskon en tio, forigi interne de la ŝtataj limoj al la homoj la alnaskitan senton por konscienco kaj justeco. Kiu estis malbonulo aŭ volis fariĝi tia, povis sukcesi. Kiu respektis sian konsciencon, estis akuzota kaj kondamnota kiel „ŝtatmalamiko". Murdistoj regis. Ŝtelkasistoj fariĝis policistoj. Friponoj juĝis. Kaj la konscienco estis akuzata.
Bona kaj malbona, neŝanĝeblaj normoj de homa koro, estis anstataŭataj per leĝoj kaj ordonoj. La laktovendisto, doninta lakton al malsata „fremdrasa" infano, estis enkarcerigita. La denuncinta virino ricevis medalon. Murdinto de senkulpulo estis akcelita. Kiu esprimis sian humanan aŭ kristanisman opinion, estis senkapigita aŭ pendigita. Viro, antaŭ la jaro 1933 policoficiro, estis severe esplorata pro agoj de homo, kiu antaŭ jaro sidis antaŭ li kiel krimulo. Tio okazis en la sama ĉambro. Nun nur la alia sidis malantaŭ la skribotablo.
Aktoroj, ne salutintaj denuncantinon sur la strato, estis ordonitaj al ŝtatkonsilanto Hinkel, kiu promesis akran punon, se ili daŭrigus malestimi tiun sinjorinon. Kiu kaŝis senkulpan persekutaton, devis timi pro la vivo sia kaj de la familianoj. Kiam mi estis arestita en bankeja filio, la librotenistoj kaj kasistoj sin klinis super libroj kaj monbiletaroj, por ke oni ne vidu iliajn timemajn vizaĝojn. Kiu restis mia amiko, mem estis en danĝero. Kiu forlasis min, povis sukceci. La instruisto, konscie mensoganta kontraŭ siaj gelernantoj, restis en sia ofico kaj sukcesis. Kiu ne mensogis antaŭ la infanoj, estis senoficigita.
Jen, super konscienco kaj karaktero, kuŝis la plej terura, la plej timiga malbeno de tiuj dekdu jaroj. La potencaj viroj kaj ilia partio celis sisteme la plej absolutan kaj diablan ruinigon de la animo de ĉiuj epokoj. La konscienco de multaj, kiuj ne estis pli bonaj aŭ pli malbonaj ol de aliaj homoj en la mondo, fariĝis konfuza. Kio estas kulpo? – Kio estas senkulpo? Kio estas justa, kio maljusta? La homa horo, la ĉiam la ĝustan direkton montranta kompaso, estis eraŭrigita kaj ĉiun tagon pli per magneto, faligita al la inferno, kiu efikis pli kaj pli. Oni ĉiam pli kaj pli malmulte vivis harmonie kun sia konscienco. Multaj fariĝis malcertaj kaj malfortaj. Multaj rapidis, por forkuri la infernon en sia brusto, esprimantaj la malnovajn verajojn, ili kuris en la pereon sub la pendigilon . . .

(Trad.: R. Zimmermann, Dresden) – CR –



Bojkotado kaj priŝmirado de la judaj vendejoj. Tiel komencis. Foto: Zentralbild



Foto: Zentralbild

UN KAJ GDR

De Joachim Fremberg

Konsidere al la 25a datreveno de la fondiĝo de la Organizo de Unuiĝintaj Nacioj la 24an de oktobro 1970 la efektivigo de la principo de universaleco de UN ŝoviĝis ĉiam pli en la centron de intereso de la internacia publiko.

Tio signifas: la akcepton de ĉiuj ŝtatoj en la mondorganizon, kiuj proponas sian membrecon kaj estas pretaj estimi la Ĉarton de la Unuiĝintaj Nacioj. Al tiuj ŝtatoj apartenas ankaŭ la Germana Demokratia Respubliko: La 28an de februaro 1966 la prezidanto de la Ŝtata Konsilantaro Walter Ulbricht metis la proponon je membreco de GDR en la Organizo de Unuiĝintaj Nacioj. Konekse kun tio li certigis, ke GDR estas volema surpreni kaj konscience plenumi la devojn rezultantajn el la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj. La prezidanto de la Ŝtata Konsilantaro Walter Ulbricht akcentis, ke la samrajta membreco de GDR en UNO respondus al la senco de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj, plenumus servon al UNO mem kaj plialtigus ĝian gravecon ĉe la malimpliko de komplikitaj internaciaj problemoj.

La rajton je membreco en UNO konkludas GDR el sia politiko, respondanta al la principoj kaj celoj de la Unuiĝintaj Nacioj:

- La politiko de GDR celas al malarmado kaj sekureco.
- GDR plenumas la decidojn de UNO kontraŭ naziismo, neonaziismo kaj rasismo kaj la aliajn decidojn de UNO por efektivigo de la homrajtoj.
- GDR subtenas la batalon kontraŭ koloniismo, neokoloniismo kaj Apartheid-politiko.
- GDR akcelas la samrajtan internacian kunlaboron en la UNO-sistemo.

Konforme al sia politiko GDR aktive kontribuis al la laboro de UNO kaj donis ankaŭ deklarojn al ĉiuj gravaj internaciaj problemoj, kiuj grandparte per la bonaj servoj de amikaj ŝtatoj estis cirkuligitaj kiel oficialaj UN-dokumentoj, kiel ekz-e al la „Konvencio pri la malpermeso je evoluigo, produktado kaj deponado de kemiaj kaj bakteriologiaj (biologiaj) armiloj kaj pri ties neniigo, al la „Referato de la ekonomia kaj sociala konsilistaro", al „Rimedoj ekuzendaj kontraŭ naziismo kaj rasa maltolero" kaj al la „Deklaracio pri universala partopreno je Viena Konvencio pri la juro de kontraktoj".

Valoran laboron plenumis GDR sur multaj taskoterenoj de multnombraj organoj kaj specialaj organizoj de UNO, ekzemple de Eŭropa, Ekonomia Komisiono (ECE), de Organizo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo (UNESCO), de Mondorganizo por Meteorologio (WMO) kaj de Monda Sanitara Organizo (WHO). La kontribuo de GDR por la UNESCO-laboro estas farita je granda parto per ĝia membreco en pli ol 250 sciencaj kaj kulturaj internaciaj organizoj. Ĉiaj reprezentantoj partoprenas je gravaj internaciaj kongresoj. En la pasinta jaro GDR per „Germana Ligo por la Unuiĝintaj Nacioj" unuan fojon samrajte partoprenis la 22an plenkunsidon de la Monda Federacio de UN-Asocioj (WFUNA) en Nikosia kaj antaŭ nelonge junulara delegacio de la respubliko restadis por partopreno je la mondjunulara kunveno de UNO en New York. Ĉe la sidejo de Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo GDR havas konstantan observanton.

Neniu alia pli signifa ol U Thant mem plurfoje deklaris, ke de Unuiĝintaj Nacioj kiel eble plej baldaŭ progreso rilate al universaleco de la membraro devus esti atingita. Li klopodis por tio, ke oni permesu al tiaj landoj kiel GDR „la membrecon kaj ebligu al ili partopreni je laboro de la organizo kaj plenumi kontribuon por la solvo de ekzistantaj problemoj".

(El „Panorama DDR" Trad.: Dr. Schüler)

Anekdotoj el la esperantista vivo

Antoni Grabowski tre ŝatis deklami, li povis tion kun kortuŝo kaj tre bele. Iun vesperon en familio la dommastrino diris al li: „Antoni, bonvolu deklami ion en via fama Esperanto, vi ĉiam parolis pri ĝi, sed neniam per ĝi." Antoni deklamis . . .

Kiam li finis, ĉiuj diris: „Sed ĝi ja estas neimageble malbelsona, via lingvaĉo. Kompreneble, estas tia miksaĵo!" – „Nu, kiu povis esperi ion alian?" – „Mi petas pardonon – diris Grabowski –, Esperanto ne estas kulpa. Mi deklamis al vi itale verkon de Petrarko . . ." – kaj li eltiris la verkon el sia poŝo kaj montris ĝin al la konsternita ĉeestantaro. Alifoje multaj verkistoj kunvenis en kafejo kaj atakis lin pri Esperanto. Oni ree petis, ke li deklamu ion. Ĉiuj aŭskultis, ŝerce kapsignante unu al alia. Kiam li finis, la kritikoj estis malbonaj: Stultaĵo, frenezaĵo, verko de malsana cerbo. „Indulgu, sinjoroj – diris Grabowski –, Esperanto estas senkulpa. Mi deklamis fragmenton de Mirejo, de Mistral, en provenca lingvo . . ." Iu petis daŭrigi . . . alia diris, ke li ne aŭskultis bone. Do Grabowski daŭrigas, ĉiuj atente aŭskultas. Poste diris tiu, kiu petis lin: „Tio estas karakterhava lingvo, oni tuj sentas pralingvon. La sonoreco de la latinidaj lingvoj estas senkompara!" „Mi devas ree peti pardonon! Ĝi estas la sekvo de la unua parto, sed ĉifoje ĝi estas la Esperanta traduko!"

– CR –

HEINRICH MANN

1871–1971
100-a jubileo de lia naskiĝo



La okazigoj de jubileoj estas montriloj pri tio, kiel sin rilatigas ŝtato al la historio kaj la kulturaj tradicioj de l'propra popolo kaj de la mondo. Evidentiĝas la tradicioj. Kun kiuj tradicioj interrilatas la 100-a datreveno de l'naskiĝo de la fama germana romanverkisto Heinrich Mann, kiun GDR omaĝis la 27-an de marto ĉijare? Ĉu kun la spekulacia regnofondo en la spegula salono de Versailles antaŭ 100 jaroj? Certe ne!

Heinrich Mann ja estis la plej akra kritikanto de tiu imperiestra militarista Germanio, kies fondo en 1871 estis ĉijare festata kun granda bruo en la alia germana ŝtato.

Heinrich Mann naskiĝis la 27-an de marto 1871 kaj sendube estas la plej granda germana romanverkisto. Neniu germana verkisto tiel observis kaj antaŭsentis la evoluon de l'regato germana, dresita de la prusa militarismo, al la faŝista subulo.

En siaj romanoj, rolantaj en la imperiestra Germanio kaj la Weimara Respubliko (1918–1933) li senkompate montris la defektojn de la burĝa sociordo, senmaskigis la reakcian burĝaron forŝirante la hipokritan maskon de sur ties vizaĝoj.

Liaj verkoj hodiaŭ estas firma trezoro de la monda literaturo. Speciale per la romanoj „La regato" („Der Untertan"), „Profesoro Unrat" kaj la aliaj kontraŭvilhelmaj verkoj (regis ĝis 1918 la imperiestro. Wilhelm la II-a) Heinrich Mann kreis klasikajn ekzemplojn por tio, kiel verkisto efike kritikas kun akra satiro la malkaŝajn malbonojn de la epoko, tiel iĝante granda avertanto de sia popolo.

La romano „Profesoro Unrat" skurĝas kun densigita satiro la vilhelman klerigan sistemon kaj la satan germanan etburĝaron de la jarcenta ŝanĝo. Lia majstroverko certe estas „La regato". Ĝis la nuntempo ĝi estas grava armilo en la batalo kontraŭ restaĵoj de la prusa-militarisma kaj nazia ideologio en partoj de la germana popolo.

Kun brile uzitaj rimedoj kiel ironia satiro, karikaturo kaj grotesko Heinrich Mann priskribas la vivovojon de tipa vilhelmtempa regato (Dro Diederich Heßling) en ties persono skurĝante la tutan malspiritan naciisman kaj arogan burĝaron kun sia danĝera fanatikeco. En sia fama eseo „Zola" li kritikegas la germanan militarismon kaj profetas ties pereon.

Inter la verkoj, bruligitaj de la faŝistoj la 10-an de majo 1933, kompreneble, ankaŭ troviĝis tiuj de Heinrich Mann. Kaj hodiaŭ liaj verkoj denove ne estas tro favoritaj en la Federacia Respubliko.

„Estas necese, ke humanistoj batalemu kaj ekluktu, se malamikaj potencoj volas bremsi la destinon de la homo" li dirigas sian romanheroon Henrikan la IV-a („la junaĝo kaj plenumiĝo de l'reĝo Henriko la IV-a", romano). Laŭ tiu maksimo agis Heinrich Mann. Li partoprenis en la batalo kontraŭfaŝisma, iĝis 1934 prezidanto de la PEN-centro de elmigrintaj germanaj verkistoj, partoprenis la Internacian Verkistokongreson por la Defendo de la Kulturo, 1935 en Parizo, kaj iĝis 1936 prezidanto de l'aktivularo por preparo de germana popola fronto en Parizo.

Trans Francio, Hispanio kaj Portugalio li elmigris 1940 al USONO. Tuj post la disbato de la germana faŝismo la verko de Heinrich Mann ludis gravan rolon ĉe la spirita demokratiigo de Germanio.

Ĝis hodiaŭ „La regato" estas legata kaj pritrakata en ĉiu lernejo de GDR.

En 1950 Heinrich Mann akceptis la enoficigon kiel unua prezidanto de la Germana Akademio de Artoj en Berlin, sed ne plu povis realigi la transsetliĝon de Los Angeles al Berlin. Li mortis la 12-an de marto 1950.

Inaoguro de monumento El „La Regato"

Diederich Heßling sendube estas speciale fidela al la imperiestro, sia moŝto Wilhelm la II-a. Kompreneble li estas bona germano, nacifidela, kun meritoj por la patrio, tutcerte . . . Kiel posedanto de papera fabriko kaj deputito de la urba parlamento li estas grava persono, kun barbeto kiel la imperiestro, jes, same. La simile brilantaj okuloj, la tranĉakra voĉo, vere, dua Wilhelmo. Li ja iniciatis kaj fine sukcesigis la konstruon de monumento por la ĉie amata imperiestro. Kaj bone li prepariĝis por glora festparolado. Kaj ordenon Wilhelman li ankaŭ ricevos hodiaŭ. Bela tago, ĉirkaŭ la ankoraŭ vualita monumento ariĝis en tendoj, sur podioj, la gravuloj de la urboj, soldatoj, loĝantoj de Netzig. Jen la kulmina tago en la vivo de Diederich, la fidela regato de sia moŝto. Kaj li parolas, paroladas, parolegas, fulmokulas, gloras la patrion, kondamnas la heredan malamikon . . .


La naturfortoj ŝajne ne kun ĉio konsentas . . .

La suno jam malaperis, kaj la vento blovis pli malvarme; kaj kvazaŭ inspirite per la malsereniĝinta ĉielo, Diederich transiris al demando de profunda seriozeco.

„Kiu nun baris lian vojon, antaŭ lia alta celo? Kiu estis la malamiko de la granda imperiestro kaj de lia fidela popolo? Napoleono, de li feliĉe frakasita, havis sian kronon ne de Dio, sed de la popolo, pro tio! Ĝuste tio donas eternan, grandiozan sencon al la juĝo de la historio!" Tie ĉi Diederich entreprenis pentri, kiel aspektis la regno, demokratie infektita, pro tio forlasita de Dio, de Napoleono la Tria. La nuda materialismo, kaŝita en malplena religieco, kreskigis la plej senskrupulan negocemon, malestimo al la spirito faris sian naturan aliancon kun malnobla avido al ĝuo. La nervo de la publika vivo estis reklamemo, kaj ĉiun momenton tiu ŝanĝiĝis en persekutemon. Baziĝante eksternen nur sur prestiĝo, interne nur sur polico, ne havante alian kredon ol la potenco, oni aspiris al nenio alia ol al teatra efekto, praktikis fanfaronan pompon kun la pasinta heroa epoko, kaj la ununura supro efektive atingita estis

tiu de ŝovinismo ... „Pri ĉio ĉi ni nenion scias!" Diederich kriis kaj etendis la manon kontraŭ la atestanto tie supre. „Tial ni neniel kaj neniam spertos la teruran finon, kiu estis rezervita al la imperio de nia tradicia malamiko!"
En tiu ĉi momento fulmis; inter la militista kordono kaj la senfenestra muro, en la regiono, kie oni povis supozi la popolon, eliĝis akra brilo el nigra nubo, kaj sekvis tondrobato, kiu envere estis troa. La sinjoroj en la oficiala tendo ekhavis malaprobantajn mienojn, kaj la Supera Prezidanto ekmoviĝetis. Sur la oficirtribuno la sinteno memkomprenebIe tute ne ŝanĝiĝis, ĉe la civiluloj, tamen, kelka malltrankvilo estis rimarkebla. Diederich silentigis la kriaĉadon, ĉar, same tondrante, li kriis: „Nia malnova aliancito ĝin atestas! Ni estas seriozaj, fidelaj kaj veraj! Kiu el ni iam farus el ideala konvinko negocon? Kie do estas la korupteblaj oficistoj? Honesteco de la viro unuiĝas ĉi tie kun virina pureco, ĉar la ina nin suprentiras, ĝi tute ne estas por ni ilo de malnobla plezuro. Sed la brila bildo de vere germana naturo leviĝas sur la grundo de kristanismo, kaj tio estas la nure ĝusta grundo, ĉar ĉiu pagana kulturo, kia ajn bela kaj brila ĝi estu, spertos malvenkon ĉe la unua katastrofo; kaj la animo de la germana naturo estas la respektado de la potenco, de la tradicia potenco, kontraŭ kiu oni nenion kapablas. Pro tio nun kiel antaŭe ni rigardu la defendon de la patrio nia plej supera devo, la uniformon de la reĝo la plej alta honoro kaj la militmetion la plej supera laboro!"
La tondro grumblis, kvankam ŝajne timigite per la pli kaj pli forta voĉo de Diederich; sed falis pluveroj, kiujn oni aŭdis unuopaj, tiom ili estis pezaj.
„El la lando de la tradicia malamiko", kriis Diederich, „ree kaj ree alruliĝas la ŝlima ondo de demokratio, kaj nur germana vireco kaj germana idealismo estas la digo kontraŭstariganta sin al ĝi. Sed la senpatriaj malamikoj de la dia mondordo, kiuj estas subfosontaj nian ŝtatan ordon, ili estas ekstermendaj ĝis la lasta stumpo, por ke, vokite iam al la ĉiela apelo, ĉiu kun bona konscienco povu paŝi antaŭ sian Dion kaj sian maljunan imperiestron kaj, demandite ĉu li tutkore kunlaboris por la bono de la regno, li rajtu bati sian bruston kaj malkaŝe diri: ‚Jes!'"
Ĉe tio Diederich donis al si tian baton sur la bruston, ke la spiro haltis al li. La neeviteblan paŭzon, kiun li faris, la civilula tribuno uzis por manifesti per maltrankvilo, ke ĝi rigardas lian paroladon finita; ĉar la fulmotondro nun staris ekzakte super la kapoj de la festkunvenintaro, kaj en la sulfurflava lumo, unuope, malrapide kaj kvazaŭ avertante, pli kaj pli frapis tiuj ovograndaj pluveroj ... Diederich ree havis spiron.
„Kiam nun falas la kovraĵo", li komencis kun nova elano, „kiam salutante la standartoj kliniĝas, la spadoj malleviĝas kaj bajonetoj brilas en parada ekpreno" – jen tiom terure krakis en la ĉielo, ke Diederich kaŭriĝis, kaj, antaŭ ol li atendis, troviĝis sub sia pupitro. Feliĉe li ree eliĝis, sen ke lia malapero estis rimarkita, ĉar ĉiuj spertis similaĵon. Preskaŭ neniu ankoraŭ aŭskultis, kiel Diederich petis la ekscelencan moŝton, sinjoron Superan Prezidanton, ke li bonvolu ordon, li estis pli flava ol estis lia naturo, Prezidanto eliris antaŭ la oficialan tendon, li estis pli flava ol estis lia naturo, la brilo de lia stelo jam estingiĝis, kaj malforte li diris: „La kovraĵu falu!" – post kio ĝi falis. Ankaŭ eksonis la melodio pri la gardo ĉe l'Rejno. Kaj la rigardo de Wilhelm la Granda, rajdanta tra la aero en la pozo de familia patro, sed ĉirkaŭita de ĉiuj teruraĵoj de la potenco, refoje fortigis la regatojn kontraŭ la minacoj de supre, la „Vivu la imperiestro" – krio de la Supera Prezidanto trovis viglan eĥon. Nu, la sonoj de la melodio „Feliĉon al vi kun la venkokrono" donis al la ekscelenca moŝto la signon, ke li nun devis iri al la piedo de la monumento, inspekti ĝin kaj honori la kreinton, jam atendantan, per alparolado. Ĉiu komprenis, ke la alta sinjoro direktis duban rigardon ĉielen, sed, kiel oni povis atendi kun certeco, lia devosento venkis, kaj venkis des pli brile, ĉar li estis la unuura sinjoro en frako inter tiom da bravaj militistoj. Li aŭdace kuraĝis iri eksteren, marŝante sub la grandaj, malrapidaj pluveroj, kaj kun li ulanoj, kirasuloj kaj trajnanoj ... Jam oni legis la enskribon „Wilhelm la Granda", la kreinto, honorita per alparolado, ricevis sian ordenon, kaj oni estis prezentonta kaj ornamonta ankaŭ la spiritan kreinton Heßling, sed jen la ĉielo krevis. Ĝi krevis tute kaj per unu bato, kun forteco simila al eksplodo longtempe retenita. Antaŭ ol la sinjoroj sin turnis, ili staris en akvo ĝis la maleoloj, akvo fluis el la manikoj kaj pantalonoj de la ekscelenca moŝto. La tribunoj malaperis sub torentoj da akvo, kvazaŭ sur fore ondanta maro oni ekkonis, ke sub la forto de la pluvego jam malleviĝis la tegmentoj de la tendoj, en kies ĉirkaŭvolviĝoj malsekaj dekstre kaj maldekstre ruliĝis kriantaj amasoj. La sinjoroj oficiroj uzis la nudan armilon kontraŭ la elementoj, havigante al si eliron per tranĉoj en la tendotolon. La civiluloj malsuprenvenis nur kiel griza serpento volviĝanta, kiu sin banis kun sovaĝaj ekmovoj en la inundita tereno. Ĉe tiaj cirkonstancoj la Supera Prezidanto komprenis, ke estis oportune rezigni pri la plua plenumo de la festprogramo. Ĉirkaŭflamite de fulmoj kaj ŝprucante akvon kvazaŭ fontano, li komencis rapidan retiriĝon, kaj post li la adjutanto de l'suvereno, la du diviziaj generaloj, dragonoj, husaroj, ulanoj kaj trajnanoj. Survoje la ekscelenca moŝto memoris pri la ordeno ankoraŭ pendanta je lia fingro kaj destinita por la spirita kreinto, kaj devokonscia ĝis ekstremo, sed strebante eviti ĉiun restadon. Li, kurante kaj ŝprucante akvon, enmanigis ĝin al la prezidanto von Wulckow. Siavice Wulckow renkontis policiston ankoraŭ spitanta la eventojn, kaj komisiis al li la transdonon de la plej supera dekoracio, post kio la policisto vagadis tra ventego kaj hororo, serĉante Diederich. Finfine li trovis lin kaŭranta sub la oratora pupitro. „Jen por vi Vilĉjo-ordeno", diris la policisto kaj rapidis for, ĉar ĝuste en tiu momento fulmo trafis tiel proksime, kvazaŭ ĝi devus malhelpi la transdonon de la ordeno. Diederich jam nur ĝemis.

(Trad.: Dr. K. Schulze, Berlin) – CR –



La regato Diederich Heßling, foto el GDR-filmo
Foto: Zentralbild

Heinrich Mann:

„Ĉiu progresema aŭtoro skribas kiel vi agas: por la estonteco. La estonteco estas ekkonebla en la bataloj de la nuntempo, kaj ankaŭ en ĝiaj trafaj vortoj. La sukceso dekomence estas je flanko de sincera agado kaj lojala pensado. Vin pravigas la vivo mem. Mi konfesas ĝis morto al la vivo, kaj ĝojas, konsenti vian opinion."

(El letero, skribita de Heinrich Mann al Wilhelm Pieck, la unua prezidanto de GDR)

Ekspozicio omaĝe al Albrecht Dürer

Krom la multenombraj memorejoj de la klasika literaturo en Weimar la Artkolektoj apartenas al la ĉefaj atrakcioj por la ĉirkaŭ 1 miliono da vizitantoj, kiuj ĉiujare vojaĝas de proksime kaj malproksime en la Goethe-urbon. Same kiel la ampleksaj konstante rigardeblaj stokoj – ĉirkaŭ 2 000 pentraĵoj, 10 000 desegnaĵoj, 40 000 grafikaĵoj, 200 plastikoj, 600 mebloj, 3 000 artmetiaj objektoj, 14 000 moneroj kaj medaloj – ankaŭ la ŝanĝaj ekspozicioj kun siaj variaj temoj ĉiam denovo altiras interesulojn.
Plej ampleksa tasko de la artkolektoj nun estas la organizado de 12 ekspozicioj omaĝe al Albrecht Dürer, okaze de la 500-a datreveno de lia naskiĝtago. Ili atestas pri la konscienca kaj estimema flegado de la kultura heredaĵo en la unua germana ŝtato de laboristoj kaj kamparanoj. Sub la titolo „Albrecht Dürer – lia mondbildo, lia arto" la ekspozicioj konigas la grandan reprezentanton de la renesanco al multaj homoj. Laŭ plej modernaj vidpunktoj estas dokumentata lia verkaro konekse kun la socia evoluo de lia tempo.
Ĉiu ekspozicio konsistas el 70 tabuloj kun reproduktaĵoj de la plej eminentaj verkoj de l'artisto. La diversspecaj temoj estas kunigitaj al kompleksoj kiel: studoj pri nature kaj anatomio, prezentado de l'homo, partopreno por la subpremitaj kamparanoj, okupado per sciencaj problemoj, k.s. Pri tio opinias direktoro Pomeranz-Liedke:
„Estas nia strebado, havigi al la vizitantoj de la ekspozicioj integran impreson pri la tuta verkaro de Albrecht Dürer kaj lia konfeso al la humanismaj idealoj de lia tempo. Per uzado de multe da bonegaj reproduktaĵoj ni tion atingas pli bone ol per prezentado de malmulte da originaloj. Ni volas montri pli ol nur la plej konatajn el liaj verkoj; per la rimedoj de eltranĉo kaj muntado ni volas atentigi celdirekte al la esenco. Tiel



300 jaroj Albrecht Dürer (1471–1528), germana pentristo. Memportreto.

vekante kaj profundigante la intereson kaj komprenon de vastaj rondoj por la verkaro de la majstro, ni plej pli bone povas omaĝi lin en la jaro de l'500-a datreveno de lia naskiĝtago."
La reproduktaĵoj por la Dürer-ekspozicio estas kopioj de originaloj kaj faksimiloj troviĝantaj en la Artkolektoj kaj aliaj muzeoj kaj bibliotekoj. La klarigaj tekstoj estas verkitaj en 12 lingvoj. Riĉe ilustritaj informkajeroj estas je dispono de la vizitantoj.
Ĝis nun estas kontraktita la aranĝo de tiu ekspozicio en Sovetunio, Pollando, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Bulgario, Rumanio, Kubo, Ĉilio, Kolombio, Vjetnama Demokratia Respubliko, Maroko, Alĝerio, Hindio kaj Japanio. Pliaj kontraktoj estas preparataj.
Tiu ĉi kaj pliaj entreprenoj konfirmas la internacian efikecon de la Artkolektoj en Weimar.

(El „Panorama GDR" tradukis: R. Rabenalt)

Ludwig van Beethoven

Kion signifas al ni hodiaŭ la verko de Beethoven, kion ĝi vekas, kion ĝi fortigas en ni?
En sia humanismo ĝi fortigas en ni la kredon al la homoj, al la estonteco de la homaro kaj al la venko de la progresivaj fortoj en la granda disputo de niaj tagoj. La kreajon de Beethoven komprene akcepti, signifas la profundigado de niaj vivekkonoj, aktivigo de nia scio pri la homo, ĝia faro, ĝia homa grandeco.
La lingvo de Beethoven estas la lingvo de revoluciulo, kiu estas komprenata de ĉiu revolucia epoko, precipe de la nia. Li estas al ni modelo en sia kuraĝo al la nova, revolucia en la societo kaj en la arto, sed ankaŭ en sia kuraĝo al nova simpleco kaj beleco – turnita kontraŭ la cinikismo de la hieraŭuloj de hodiaŭ, ilia malestimado de la homo, sentmalvarmo, senhumanigo de la arto kaj de la vivo . . .

Ernst Hermann Meyer




Foto: Zentralbild

Jeŭgin Fomin*) (1910–1942)

La maro

Ĝi estas verde – blue – tona,
Nebule – griza en ondar',
kaj nubo peza, simil-ŝtona,
Minace pendas super mar'.
Jen sunobrila, jen ĝi sombra,
kaj mevoj alte en abund' . . .

Ho kiom ĝi ekstere tondra –
Kaj plenkvieta en profund'!

Trankvile falos mi estonte en batal'
Pro ĝojo, pro popol', pro suna patrolando.
Kaj rememor' pri mia frua fatofal'
En koroj dèl amikoj sonos, kiel kanto.

Sed volus, volus mi, ke ĝis nebulalven'
Naturo en reson' al mia lasta peto
Malfermu plene antaŭ mi belecon en
Plej varma adiaŭa ĝojrideto.

1938

*) Jeŭgin Pavlovic Fomin – talenta ukraina poeto, murdita en novembro 1942 en torturejo de Gestapo (Kievo).
– CR –

Batalo kontraŭ kancero

de Jochen Mämecke

GDR estas inter la plej progresintaj landoj, kiuj helpe de amasesploroj de la loĝantaro klopodas frue ekkoni kanceron. Ĉiu celado al frua ekkono baziĝas sur tio, ke kancero estas likvidebla, kiam oni ĝustatempe trovas kaj kuracas ĝin. Tio estas des pli necesa, ĉar hodiaŭ ĉiu kvina aŭ sesa mortas pro kancero.

Kompleksa sistemo de frua trovo, frua terapio kaj rehabilitado faciligas al la scienculoj kaj kuracistoj la batalon kontraŭ tiu skurĝo de la homaro.

Por kontraŭbatali tuberkulozon oni enkondukis post 1945 laŭdevajn vicajn esplorojn de la popolo. Tiuj rimedoj pli kaj pli ricevadas signifon ankaŭ por la fruekkono de pulma kancero – kiu estas inter la plej oftaj tumormalsanoj; ĉar ĉirkaŭ duono de ĉiuj pulmokanceroj kreskas en la pulmo tiamaniere, ke ili estas jam bone videblaj sur la x-radia bildo, antaŭ ol ili kaŭzas subjektivajn simptomojn. Konforme al la frua trovo la terapirezultoj en tiuj kazoj estas distingeble pli bonaj, la pocenteco de la sanigitoj en GDR pro tio nuntempe duobliĝis. Nun multe pli ol 50 pocentoj de ĉiuj kancermalsanuloj povas esti resanigataj per operacio aŭ radiado.

En GDR ĉiu virino havas la eblecon de senkosta ginekologia esploro. Virinojn post la 30a vivjaro speciale minacas uterokola karcinomo. Dum tri jaroj du milionoj da virinoj estis profilakse esplorataj pro kancero. Pro tio estis eble, frue kuraci grandan parton de la nove trovitaj tumormalsanuloj. Ĉirkaŭ 200 dispensariejoj kontrolas la esploradon kaj kuracadon de la pacientoj kaj surprenas prizorgon kaj metafilakson. Poste zorgaj kuracadoj okazas en specialaj hejmoj por resaniĝantoj.


Progresoj en esploro kaj praktiko

La kuracado de tumormalsanuloj en GDR dum la lastaj jaroj decidige pliboniĝis dank'al la pli ampleksaj eblecoj kaj metodoj, precipe pro la fizike-teknika progreso en la moderna radioterapio per kobaltkanonoj, elektronĵetiloj, aparatoj por moviĝanta radiado kaj per apliko de radio-izotopoj. Berlinaj sciencistoj nuntempe studas novajn testojn por ekkoni kanceron kaj eltrovi la plej taŭgan kuracmetodon. Inter tiuj estas radioterapiaj, hormonaj, ĥemoterapiaj kaj operaciaj kuracmetodoj. La ĉefa armilo kontraŭ tumoroj ankoraŭ estas ĥirurgiaj procedoj. Nur antaŭ du jaroj antaŭ la pordoj de la GDR-ĉefurbo oni inaŭguris unu el la plej modernaj operacikonstruaĵoj de la mondo, en kiu povas esti operaciataj pojare ĉirkaŭ 2 000 pacientoj. Alte specialigita garda stacio kun elektronaj instalaĵoj por tage kaj nokte kontroli la malsanulojn plialtigas la vivodaŭron de la pacientoj.


La plurpaŝa kancerterapio evoluigita de profesoro Manfred von Ardenne en Dresdeno estas kroma vojo multepromesa, laŭ kiu oni estonte povos kuraci kanceron.

(El „Panorama DDR" Trad.: Dr. P. W. Ruff)

Instituto por kancer-esplorado de la Germana Akademio de Sciencoj. Profesoro Graffi kaj dr-o Bierwolf. Foto: Zentralbild



Germana Demokratia Respubliko



Jen la 260 paĝa luksa libro pri Germana Demokratia Respubliko. Ĝi ankoraŭ haveblas senpage ĉe Centra Laborrondo Esperanto de GDR, DDR - 108 Berlin, Charlottenstrasse 60

Novaj Esperantaj eldonaĵoj el Sovetaj Respublikoj

HORIZONTO DE SOVETA LITOVIO, unua kajero 1970, eldono de Esperanto-sekcio de Litova Societo de amikeco kaj kulturaj rilatoj kun eksterlandoj kaj de Vilnjusa Esperanto Klubo. Tiu-ĉi subtitolo per si-mem montras interesan ekzemplon de kunlaboro inter neesperantista, potenca organizo, kaj Esperanto-klubo.

La revuo estas nur stencilita, sed teknike tre bona kaj sub plaĉa kovrilo. La enhavo estas varia, kun granda spaco por esperantistaj aferoj. Havebla ĉe Societo de Amikeco, Esperanto-Sekcio VILNIUS, Kostiuŝkos 36, Litova SSR, Soveta Unio.

SOVETA UZBEKISTANO, unua kajero 1970, eldono de Komisiono pri internaciaj ligoj de esperantistoj de soveta Uzbekistano. Ankaŭ stencilita sed en pli malgranda formato ol la ĉi-supra, kun varia kaj interesa enhavo pri la Respubliko Uzbekistano. Demando: ĉu ne estus preferinde diri: Uzbekio, Uzbeka, Uzbekiano?

Ĝin petu ĉe Esperanto-Komisiono ĉe la Uzbeka Amikeca Asocio, Taŝkent, strato Aĥunbabajeva 1, Soveta Unio.

SOVETA ESTONIO, 44-paĝa broŝuro, formato 18 × 12,5 cm, presita, kun multaj kolorfotoj, eldonejo „Eesti Raamat", Tallinn 1970. Konciza, facile legebla, studo pri tiu soveta respubliko. Sendube sufiĉas mencii la diversajn ĉapitrojn: 1 – Geografia karakterizo, pasinto, 2 – Industrio, ekonomiaj rilatoj, transporto, fiŝkaptado, 3 – Agrikulturo, 4 – Klero, scienco, 5 – Literaturo, 6 – Muziko, teatro, filmo, arto, 7 – La prizorgo de la loĝantaro.

W. G. – C. R. –

Bruno Apitz, la romanaŭtoro, kaj la „koncentreja infano", Stefan-Jerzy Zweig (dekstre) en la iama koncentrejo Buchenwald.

Foto: Zentralbild



Bruno Apitz kaj lia romano

„NUDA INTER LUPOJ"

Kiu ne jam aŭdis pri la fama romano de Bruno Apitz (* 1900), kiu aperis en multaj lingvoj. Temas pri la lastaj semajnoj en la koncentrejo Buchenwald, antaŭ la liberigo.

Proksimiĝas la fino de la Tria Regno. La multaj arestuloj de la koncentrejo esperas kaj timas. Ili esperas je liberiĝo kaj timas ĉiutage morton aŭ kruelajn traktadojn de SS. Kaŝa internacia liberiga komitato efike preparas sin je la decida batalo. Ĉeftasko estas sekurigi tiom da homvivoj kiom eblas. Plej severajn regulojn de la konspira laboro necesas atenti. Ĉiutage alvenas novaj transportoj el aliaj koncentrejoj. En ĉi tiu streĉita kaj por la arestuloj ekstreme danĝera situacio oni trovas en kofro malgrandan knabon. Kion fari? Prizorgi kaj gardi lin antaŭ la teroro de SS? Se oni lin trovus, tiu signifos tujan morton. Gardi, nutri kaj prizorgi lin signifas grave endanĝerigi la sekurecon de multaj arestuloj. Sed lasi tiun estajeton, tiun signon kaj simbolon de homeco enmeze de sistema malhomeco, al la murdontoj, ĉu oni povas?

La romano priskribas en spirhaltiga maniero la lukton de la arestuloj por ambaŭ principojn realigi: gardi kiom eble la vivon de la endanĝerintoj, kaŝe preparante la liberigon kaj samtempe protekti la etan homan estajon. Spite al ĉio.

La romano priskribas la martiron, heroan kaj fine venkan batalon de la antifaŝistoj, kunpelitaj en la koncentrejon Buchenwald, senmaskigas la bestan malhumecon de la faŝistoj en tipaj, vivaj personoj. Malgraŭ la terureco montrita, la preskaŭ dokumente vera, poete densigita prezento karakteriziĝas de optimismo kaj vivjesigo, ĉar venkos la humaneco.

La infano povis esti savita. Li hodiaŭ vivas. Lia nomo: Stephan-Jerzy Zweig.

La majstra romano estas tradukita de Dro Karl Schulze, Berlin, kaj baldaŭ aperos en Esperanto. Jen ni publikigas partojn el la traduko.

La arboj sur la supro de la Etters-monto gutegis pro malseko kaj senmove altiĝis en la silento envolvanta la monton kaj apartiganta ĝin de la pejzaĝo ĉirkaŭe. Foliaro, elsuĉita kaj detruita de la vintro, humidbrile putris sur la tero.

Nur hezite la printempo suprenvenis ĉi tie.

Tabuloj, starigitaj inter la arboj, ŝajnis averti ĝin.

„Komandanta regiono de la koncentrejo Buchenwald. Atentu, mortminaco! Al pluirantoj oni sen alvoko celpafos!" Sub tio vidiĝis skeletkapo kaj du kruciĝantaj ostoj kiel signo.

La senĉesa pluvo nebula ankaŭ algluiĝis al la manteloj de la kvindek SS-anoj, kiuj staris je ĉi tiu malfrua posttagmezo de marto 1945 sur la betona platformo ŝirmita kontraŭ la pluvo per tegmento. Tiu ĉi platformo, nomita stacidomo Buchenwald, estis la fino de la fervoja trako kondukanta de Weimar al la supro de la monto. En la proksimeco troviĝis la koncentrejo.

Sur ties kontrolplaco, vaste etendiĝanta kaj deklivanta norden, la arestuloj jam viciĝis por la vespera kontrolo. Bloko apud bloko, germanoj, rusoj, poloj, francoj, judoj, holandanoj, aŭstroj, ĉeĥoj, bibliesploruloj, krimuloj . . . , netravidebla amaso, kunkomandita al ekzakte rektigita kvadrato giganta.

Hodiaŭ inter la viciĝintaj arestuloj estis kaŝita flustrado. Iu estis enportinta en la barakaron la sciigon, ke la usonanoj jam transpasis la Rejnon apud Remagen . . .

. . . Post kiam la SS formis el la aro marŝkolonon, tiu – eskortata de la sovaĝa hordo – ŝancele-vertiĝe ekmoviĝis direkte al la barakaro.

Jankowski sukcesis glitrapidi en la mezon de la marŝvico, kaj tiemaniere li evitis la batojn de la draŝanta SS. Neniu en la kolono zorgis pri sia apudulo. Ĉiu estis plena de sia propra zorgo pro la necerto atendanta ilin. La malsanuloj kaj elĉerpitoj estis kuntrenataj el la kutimo de bestiĝinta konservinstinkto. Tiel la kolono ŝanceliĝis laŭ la alirstrato kaj tra la pordego en la barakaron.

La mano de Jankowski, sensentigita per la bato, pendis de la artiko kvazaŭ io fremda kaj malamika, ĝi doloris terure. Sed pro la atento, kiun li devis turni al sia kofro, Jankowski apenaŭ sentis la doloron. La tasko estis, ĉiuokaze porti la kofron sendanĝere tra la pordego de la nova barakaro.

Per viglaj okuloj Jankowski esploris ĉirkaŭ si. En la interpremiĝo li igis sin ŝovi tra la mallarĝa pordego. Lia sperto helpis al li kaŝi sin tiel lerte, ke kune kun la aro li neĝenate kirliĝis en la barakaron, ne tirante sur sin la atenton de la SS.

Estis miraklo, ke li fakte sukcesis alporti kofron ĝis ĉi tie. Jankowski tremante rifuzis ĉiujn pensojn por ne fortimigi la miraklon. Nur unu aferon li arde kredis. La kompatema Dio certe ne permesus, ke la kofro falos en la manojn de la SS. . . .

. . . „Kiu vi estas?" demandis Höfel. „Nomo, nomo."

Tion la polo ŝajnis kompreni.

„Jankowski, Zacharias, Varsovio."

„Ĉiu tio estas via kofro?"

„Tak, tak."

„Kion vi havas en ĝi?"

Jankowski parolis, gestis kaj ŝirmante tenis la manojn super la kofron.

La rotestro kuregis el la banejo kaj kun malbenoj pelis la homojn antaŭ si. Por ne frapi lian atenton, Höfel ŝovis la polon en la vicon de la nuduloj. Jankowski ĝuste falis en la manojn de la rotestro.

Tiu prenis lin je la brako kaj ĵetis lin en la banejon.
Do Jankowski devis eniĝi en la kuvon kaj poste estis premata de la timeme interpremiĝantoj en la banĉambron.
La humida varmo bone efikis sur lian trafrostitan koron, kaj sub la duŝilo Jankowski fariĝis agrable senvola. Streĉiteco kaj timo foriĝis, kaj la haŭto avide ensuĉis la varmon. . . .
. . . Pippig scivole kaŭriĝis malsupren kaj malfermis la kofron. Sed tuj li klakfermis la koverilon kaj konsternite rigardis supren al Höfel.
Pippig denove malfermis la kofron, sed nur tiom, por ebligi enrigardon al Höfel, kiu jam klinis sin.
„Homo, malfermu!" ĉi tiu siblis, rapidege rektigis sin el la klinita pozicio kaj timeme ĉirkaŭrigardis al la rotestro. Tiu estis en la banejo.
„Se tiuj malkovras tion . . ." flustris Pippig.
Höfel nepacience mangestis.
„Forprenu! Kaŝu! Rapide!"
Kvazaŭ ŝtelisto Pippig strabis al la banejo, kaj kiam li estis certa, ke oni lin ne observis, li haste kuris kun la kofro al la ŝtonkonstruaĵo kaj malaperis. . . .
. . . Kvazaŭ knabo feliĉa pro donaco, Pippig suprenrapidis kun la kofro la ŝtuparon al la privataĵdeponejo.
Je la malfrua posttagmeza horo neniu arestulo de la taĉmento plu restadis en la longe etendiĝanta vestejo, en kiu pendis miloj da sakoj kun civilvestaĵoj. Nur la jam nejuna Aŭgust Rose staris ĉe la longa transversa tablo kaj traserĉis iujn paperojn.
Li mirigite rigardis al la enŝteliĝanta Pippig.
„Kion vi do alportas?"
Per rapida mangesto Pippig flankenŝovis la demandon.
„Kie estas Zweiling?"
Per la dikfingro Rose montris al la ĉambro de la ĉefrotestro.
„Atentu", Pippig haste diris kaj rapide glitiris malantaŭen en la duonluman vestejon. Rose postrigardis lin kaj poste observis la ĉefrotestron videblan tra la granda vitra fenestro en la ĉambro.
Zweiling sidis ĉe la skribotablo antaŭ la malfermita gazeto, apogante la kapon sur la manoj. Li aspektis, kvazaŭ li dormus. Sed la sengrasa, longkrura homo ne dormis, sed cerbumis. La lastaj raportoj de la fronto maltrankviligis lin.
Pippig revenis antaŭen, faris trankviligan geston en la direkto al Rose, brue malfermis la pordon al la skriboficejo situanta apud la ĉambro de Zweiling, kaj laŭtege kriis:
„Marian, venu kun mi malsupren por interpreti!"
Zweiling timigite ekatentis. Li vidis la polon vokitan eksteren foriri kun Pippig.
Tiu donis al Kropinski rapidan signon, kaj ambaŭ ŝteliris malantaŭen. En la plej ekstrema angulo de la vestejo ili malaperis post aktaj staploj de vestosakoj kaj vestaĵoj de mortintaj arestuloj. Tie ĉi staris la kofro. –
Pippig, hidrargece kondutanta kaj ekscitita, kun longe etendita kolo ankoraŭfoje suspekte flaris ĉirkaŭ la staploj, frotis siajn manojn kaj rikanis al Kropinski, esprimante: Nun atentu, kion mi kunportis . . . Tiam li malfermante klakigis la serurojn kaj levis la kovrilon de la kofro. Larĝkrure li ŝovis la manojn en la poŝojn kaj ĝuis la sukcesintan surprizon. –
En la kofro kuŝis infano, kurbiĝinta en si, premanta la manetojn antaŭ la vizaĝo, volvita en ĉifonojn, knabo, havanta ne pli ol tri jarojn.
Kropinski kaŭriĝis kaj fikse rigardis la infanon. Tiu kuŝis senmova. Pippig karese glitigis la manon super la malgranda korpo. „Kateĉjo. – Alkuris al ni."
Li volis turni la infanon je la ŝultro, sed tiu ŝajnis kontraŭstari. Fine Kropinski trovis vorton! „Mizera vermo", li diris pole, „de kie vi venis?" Aŭdante la polajn sonojn, la infano antaŭenŝovis sian kapeton kvazaŭ insekto entirinta la palpilojn. Malforta, unua manifestiĝo de vivo, tiel ege ekcitanta por la du, ke ili fascinite gapis en la okulojn de la infano. La mallarĝa vizaĝo jam havis la seriozecon de scianta homo, kaj sur la okuloj kuŝis brilo tute ne plu infana. La infano rigardis la virojn en muta atendo. Ili apenaŭ kuraĝis spiri. –
Rose ne plu povis rezisti kontraŭ sia scivolemo. Mallaŭte li ŝteliris en la angulon kaj subite staris antaŭ la du.
„Kion do tio signifas?"
En ega ektimo Pippig sin turnis abrupte kaj siblis al la miranta Rose:
„Ĉu vi estas freneza? Veni ĉi tien! Tuj reiru antaŭen! Ĉu vi volas, ke Zweiling nin surprizu?" Rose trankvilige mansignis. „Li ja revas antaŭ si." . . .
. . . La infano sidis rekte en la kofro, kaj Kropinski, genuanta antaŭ ĝi, provis paroligi ĝin.
„Kiel vi nomata? Vi diri al mi. Kie estas paĉjo? Kie estas panjo?" Höfel alpaŝis.
Pippig senhelpe flustris:
„Kion nun fari pri la infaneto! Se ili kaptas ĝin, ili batmortigos ĝin."
Höfel ekgenuis kaj esplore rigardis en la vizaĝon de la infano.
„Ĝi ne paroli", malespere diris Kropinski.
La fremda viro ŝajnis maltrankviligi la infanon, ĝi tiris je sia ĉifonita jako, kaj ĝia vizaĝo restis strange rigida. Ŝajne ĝi ne sciis, kio estas ploro.
Höfel firmtenis la nervozan maneton.
„Kiu do vi estas, vi etulo?"




Sceno el la filmo „Nuda inter lupoj" (GDR)
Foto: Zentralbild

La infano movis la lipojn kaj glutis. „Malsata ĝi estas", Pippig inspirite ekdiris. „Mi alportas ion al ĝi."
Höfel rektiĝis kaj profunde spiris. La tri senhelpe rigardis unu la alian. Höfel maltrankvile ŝovis la ĉapon el sia frunto.
„Jes ... jes ja –... kompreneble ..." Pippig opiniis tion konfirmo de sia intenco kaj volis forrapidi. Sed per la sensencaj vortoj Höfel nur provis esprimi sin kaj ordigi la vagantajn pensojn. Kion fari pri la infano? Kien ĝi? Provizore ĝi supozeble devis resti ĉi tie. Höfel retenis Pippig kaj pripensis.
„Preparu por ĝi kuŝejon", li instrukciis Kropinski.
„Prenu kelkajn el la malnovaj manteloj, metu ilin tie en la angulon kaj ..." Li ĉesis.
Pippig demandante rigardis lin.
En la vizaĝo de Höfel subita ektimo esprimiĝis. „Sed se la infano krias ...?"
Höfel premis la manon al la frunto. „Malgrandaj infanoj timas, kaj tiam ili krias ... Malbenite do ...!" Li fikse rigardis la infanon. Longe. „Eble ... eble ĝi tute ne kapablas krii ...?" Li prenis la infanon je ambaŭ ŝultroj kaj tenere skuis ĝin. „Vi ne devas krii, ĉu vi aŭdas? Alie venas SS." Subite la vizaĝo de la infano terure ŝanĝiĝis. La knabo deŝiris sin, rejetis sin en la kofron kaj tute kurbiĝis. Kaŝante la vizaĝon en la manoj.
„Ĝi estas informita", elpuŝis Pippig.
Por kontroli sian supozon, li klapfermis la kovrilon. Ili aŭskultis. En la kofro restis silente.
„Nu klare", Pippig ripetis. „Ĝi estas informita."
Li denove malfermis la kofron, la infano intertempe ne moviĝis. Kropinski levis ĝin, kaj ĝi pendis inter liaj manoj kvazaŭ kurbiĝinta insekto. Konsternite la tri rigardis la strangan estaĵon. Höfel deprenis la infanon de Kropinski kaj ekzamenante turnis ĝin tien kaj reen. Altirinte krurojn kaj kapon kaj preminte la manetojn antaŭ la vizaĝo, la infano ŝajnis kvazaŭ tuj eltirita el la patrina ventro aŭ kvazaŭ skarabo ŝajniganta mortinta. Emociita Höfel redonis la estaĵon al Kropinski. Tiu premis ĝin al si flustrante al ĝi trankviligajn vortojn polajn. ...

– CR –

I. S. TURGENJEV (1818–1888)

„Pendigu Lin"



– „Tio okazis en la jaro mil okcent kvina" – komencis mia malnova konato" – ne longe antaŭ la Aŭsterlitz-batalo. La regimento, en kiu mi militservis kiel oficiro, staciis en Moravio.
Al ni estis severe malpermesite maltrankviligi kaj ĝeni la loĝantojn, eĉ sen tio, ili rigardis al ni malfide, kvankam ni estis aliancanoj.
Mi havis servsoldaton, eksservutulon de mia patrino, laŭ baptnomo Egor. Li estis homo honesta kaj humila; mi konis lin ekde infanaĝo kaj rilatis kun li kiel kun amiko.
Foje, en la domo kie mi loĝis, ekaŭdiĝis insultaj krioj, ĝemoj, oni ŝtelis du kokinojn de la dommastrino, kaj ŝi kulpigis pri tiu ŝtelo mian servsoldaton. Li penis pravigi sin, alvokis min esti atestanto ...
„Ne povas esti ke li ŝtelis, li Egor Avtanomo!" Mi certigis la dommastrinon pri la honesteco de Egor. Sed ŝi nenion volis aŭskulti.
Subite, laŭlonge de la strato aŭdiĝis ritma ĉevala hufofrapado; la ĉefkomandanto rajdis kun sia stabo.
Li rajdis paŝe, dika ŝvelgrasa, kun mallevita kapo kaj malleviĝintaj sur la bruston epoletoj.
La dommastrino ekvidis lin kaj sin jetis antaŭ lian ĉevalon, ŝi surgenuis kaj tute terurita, nudkapa, ŝi komencis laŭte plendi kontraŭ la servsoldato, montrante al li per la mano.
– Sinjoro generalo! – ŝi kriis – via generala moŝto! Prijuĝu! Helpu! Savu! Tiu ĉi soldato priŝtelis min!
Egor staris ĉe la sojlo de la domo kvazaŭ streĉita kordo kun la kapo en la mano eĉ la bruston li antaŭenigis kaj la piedojn kuntiris kiel gardostaranto – kaj ne unu vorton! Ĉu konsternis lin la haltinta meze de la strato generalaro, ĉu li ŝtoniĝis antaŭ venanta malfeliĉo! Nu, staras mia Egor kaj palpebrumas kaj li mem estas blanka kiel argilo!
La ĉefkomandanto ekrigardis lin per malatenta, malgaja vizaĝo kaj muĝis kolertone! – Nu?
Staras Egor kiel statuo kaj la dentojn elŝovis. Se observi lin objektive – montriĝas ke li ridas. Tiam la ĉefkomandanto elparolis abrupte:
– Pendigu lin! – Li spronis la flankojn de la ĉevalo kaj ekrajdis pluen dekomence paŝe, poste per rapida troto. La tuta stabo rajde sekvis lin nur unu adjutanto turninte sin en la solo ekrigardis dum momento al Egor.
Malobei ne estis eble ... Egor-on sammomente oni kaptis kaj oni kondukis por ekzekuto.
Tiam li tute malviviĝis kaj nur dufoje malfacile ekkriis:
„Patroj niaj! Patroj niaj!" – kaj poste duonvoĉe:
„Dio vidas, ke mi ne kulpas."
Maldolĉe, maldolĉe li ekploris, adiaŭante al mi. Mi estis malesperigita.
„– Egor, Egor" kriis mi – „kial do vi nenion diris al la generalo!" ...
„– Dio vidas, ke ne mi" – ripetis Egor plorĝemante, povrulo. La Dommastrino mem teruriĝis. Ŝi komencis petegi ĉiun kaj ĉiun pri la indulgo, asertante, ke ŝiaj kokinoj jam estas trovitaj, ke ŝi mem estas preta ĉion klarigi.
Memkompreneble ĉio ĉi nenio servis. Militistaj ordoj. Estra Disciplino. La dommastrino ploregis ĉiam pli laŭte kaj pli laŭte.
Egor, kiun la pastro jam konfesigis kaj komuniis, sin turnis al mi:
Diru al ŝi, via oficira moŝto, por ke ŝi ne ĉargreniĝu ... Ja mi pardonis ŝin.
Mia konato ripetis tiujn ĉi lastajn vortojn de la servisto kaj ekmurmuris: „Egorĉjo, karulo, justulo!" kaj larmoj ekfluis sur liaj maljunaj vangoj.

(El la rusa tradukis A. Sidorov – CR –)

VOLFORTO FARAS MIRAKLOJN

Proksime al densa arbaro, sur bordo de rivereto Pedece situas pitoreska grupo da vilaĝaj dometoj.
Multjaraj kverkoj ĉirkaŭas la domon de arbara gardisto. Dum printempaj varmaj tagoj la rivereto disvastigas siajn bordojn. Ĝi estiĝas tiam vasta. La gardisto treege ŝatis la naturon kaj ofte diris:
– Rigardu, infanoj! Admiru ĝin kaj lernu estimi ĝin! Antaŭ vi estas kvazaŭ malgranda maro! –
– Kio estas maro? – demandas la etularo.
– Maro estas senlima akvo, kie vivas multaj fiŝoj. Tiuj maraj estaĵoj estas bona nutraĵo por popoloj. La loĝantoj de marbordoj estas fiŝistoj. Ili dediĉas sian vivon por tiu profesio kaj vivtenas per ĝi siajn familianojn.
Ofte dum vesperaj horoj, kiam la tuta familio kolektiĝis en intiman grupeton ĉe la fajrujo, la sperta patro rakontis multajn interesaĵojn pri marfiŝoj kaj ĝenerale pri mirindaĵoj de naturo. Tiuj rakontoj sugestis al ĉiuj familianoj la amon al ĉiuj belecoj de la ĉirkaŭaĵo. Ili ĝuis la riveron, la arbaron, florojn, papiliojn kaj aliajn fenomenojn de la naturo.
En la familio de arbargardisto regis amikeca, bonkora medio en komuna laboro kaj en amuziĝo.
Por gajni bonan nutradon kaj bonan vivnivelon, la familio estis devigita energie laboradi sur la kampo, kies grundo estis ne sufiĉe fekunda. La konstanta kuna laborado kaj fervoreco faris la neriĉan mastrumon de arbargardisto preskaŭ kontentiga. Samtempe kreskis la amikeco kaj reciproka helpo kaj atmosfero de amo inter la samfamilianoj.
Ili ĉiuj ĝuis la naĝadon en la rivereto. Ofte ili vagadis en la arbaro kaj kolektis la bongustajn fungojn. Plezure ili kolektis florojn en la kampo. Ili nutris birdetojn, kiuj amasiĝis ĉe ilia dometo. La tuta familio ĝuadis gajan, interesan, komunan familiecan vivon.
La plej aĝa filino de la gardisto, Ruta estis scivolema kaj sentema knabino.
La elementan lernejon Ruta vizitadis en la najbara vilaĝo en distanco de kelkaj kilometroj.
Fininte tiun lernejon, ŝi estis veturigita al Riga por daŭrigi la klerigadon en gimnazio. La lernado en Riga bone iris kaj bone sukcesis.
Dum la ferioj Ruta ĉiam revenis al gepatra hejmo por helpi en komuna mastruma laborado.
Feliĉan vojon pasis la junaj jaroj de knabino. Bonkora Ruta amis ĉiujn kaj estis amata de ĉiuj. Ŝia kapeto estis plenplena je diversaj revoj.
Jen ŝi estos kuracistino savanta la vivon kaj sanon de multaj pacientoj. Jen ŝi faciligas la turmentojn de multaj diversaj suferantoj. Jen ŝi esploras la ŝatatajn drogojn. Ŝi trovos kaj inventos novajn kuracilojn por forigi dolorojn de malsanuloj.
La estonteco estis por ŝi firme alloga, hela kaj esperiga.
Tamen tiutempe poiomete super la patrolando amasiĝis nigraj minacantaj nuboj. Ili densiĝis super la kapoj de samlandanoj, samurbanoj kaj samvilaĝanoj.
Malheliĝis la suno por la patrujo. Anstataŭ varmo, feliĉo kaj ĝojo en la korojn penetris ĉagreno, angoro kaj malfeliĉo.
La invadantoj alportis detruon, suferadojn kaj morton.
La Soveta popolo finfine forpelis de sia tero tiujn kanibalojn. Denove revenis por Ruta ŝia antaŭmilita feliĉa, ĝoja, esperiga vivo.
La 18-jara ruĝvanga Ruta kantante gajajn kantojn de juneco, gloris la feliĉon de libereco. Ŝiaj kantoj benadis la amikecon kaj la Pacon. Ŝi ravis pri riĉehava vivo, kiu ĉirkaŭis ŝin ka esperplenigis ŝian estontecon.
Samtempe la grundo, kie trairis la piedoj de kruelaj homoj-bestoj kaŝis en sia profundo danĝerajn spurojn de rabistoj.
En la kampo penadis la tuta laborema familio. Ruta falĉis per maŝino partoprenante la penigan aŭtunan laboron.
Io misokazis en la detala funkciado de maŝino. Ruta haltigis ĝin kaj iom deflankiĝis por prepari la necesan riparadon.
La paro de ĉevaloj komence pacience atendis la revenon de kantanta mastrinogvidantino. Evidente iom poste la pacienco de dombestoj proksimiĝis al sia limo kaj ili komencis voki la junulinon.
Ruta aŭdis iliajn komprenatajn sonojn de henado kaj respondis al ili per rideto kaj karesaj vortoj.
Subite unu el la ĉevaloj ekfrapis per sia hufo feran aĵon en la grundo. Tio estis unu el enfositaj de faŝistoj minoj, per kiuj ili daŭrigis sian sovaĝan krimon kontraŭ la laborema kaj pacema popolo.
La „heredaĵo" eksplodis kaj kaŭzis neripareblan malfeliĉon. La ĉevaloj kaj la falĉmaŝino aliformiĝis pecetojn, kiuj disflugis ĉiujn flankojn.
La junulino svenis de aerfrapego dum la eksplodo. Ŝia korpo estis vundita per multegaj obuseroj.
De tiu momento la sorto de nia Ruta akre ŝanĝiĝis. Anstataŭ eniri lernejon kaj prepariĝi por utila socia agado, ŝi trafis hospitalon.
Tie ŝi pasigis tri longajn jarojn. La fervoraj medicinistoj dediĉis al ŝi sian bonkoran noblan agadon por savi ŝian vivon. Ili penadis ĉiutage diversspece apliki siajn konojn por resanigi la korpon kaj spiriton de la simpatia junulino.
Per teneraj lertaj manoj kaj tremantaj koroj ili serĉis la erojn de frakasita ela obuso la zorgantaj manoj de kuracistoj transportis el ŝia juna korpo al vitritaj ŝrankoj de hospitala muzeo.
Bedaŭrinde kelkaj obuseroj tro enprofundiĝis en la korpo kaj trafis intimajn lokojn apud gravaj por la vivo sangovazaj, ke la kuracistoj ne kuraĝis tuŝi ilin kaj estis devigitaj lasi ilin al Ruta kiel ĉagrenigaj „rememorajoj" pri la malfeliĉa evento.
Savita estis la juna vivo, sed en la komenca periodo la manoj kaj la piedoj ne kapablis funkcii kiel antaŭ la eksplodo.
Nur iom post iom oni resanigis ilian funkciadon. Paŝon post paŝo restariĝis ŝia frakasita sanstato. Certagrade, ne

VOLFORTO FARAS MIRAKLOJN

plenforme revenis la paŝado kaj manlaborkapablo.
Ho, ve! restis, neriparebla por eterne, la plej granda malfeliĉo – Ruta perdis la vidkapablon!
Tiurilate la penoj kaj klopodoj de kuracistoj restis, bedaŭrinde, senrezultaj.
Granda estis la profunda ĉagreno de ĉiuj familianoj pro la neriparebla suferado de amata Ruta. Ŝi mem ankaŭ dolore komprenis la jam neatingebla por ŝi plena ĝuado pri ĝojoj de ĉirkaŭanta vivo. La vidinda mondo kun ĝiaj belecoj malaperis por la juna animo.
Ĉio, kion ŝi tiom amis kaj ĝuante observis per siaj propraj okuloj, nun malproksimiĝis for de ŝi por ĉiam!... Kion fari?!...
Tamen neelĉerpeblaj estas la homaj atingaĵoj, kiam ilia volo celas restarigi kaj revigligi siajn rezervajn fortojn de korpo kaj de spirito.
Ĉiutage, ĉiumomente nia junulino ekzercadis kun penado por restarigi siajn foririntajn fiziologiajn funkciojn. Ŝi perfektigis la iradon kaj ĝojis pro tio. Poste sekvis la perfekta obeigo de brakoj.
Malgraŭ la menciitaj atingoj, kiuj jam plifaciligis ŝian vivon, la cerbon de junulino obsedis la revo pri ekposedo de legado kaj de skribado.
Do kiumaniere povus nia Ruta esperi ekvidi la literojn? Ja ŝiaj okuloj estas difektitaj per senkompataj cikatroj!
Tamen... tamen la espero pri savo estis trovita. Tio estas la spita kaj mirakloplena sistemo de Brajle por legado de blinduloj. Post ioma periodo dank'al tiu sistemo Ruta ekposedis la legadon kaj skribadon.
Tiu venko helpis al ŝi sukcese fini la kurson de mezlernejo. Denun ŝi fariĝis laborvalora homo kaj enoficiĝis en kartonan fabrikon. Ŝi kapablis prilabori jam tre delikatajn laboraĵojn.
La ĉirkaŭanta vivo progresas kaj Ruta ne estas plene kontentigita pro siaj atingoj. Ŝi aspiras pligrandigi siajn sciojn.
Ŝia persista energia scivolemo alkondukis ŝin al la Internacia Lingvo Esperanto.
Ekposedinte tiun ĉarman ilon por interrilato kun diversnaciuloj en la tuta mondo, ŝi komencis korespondadi kun eksterlandaj blinduloj.
Ŝi abunde partoprenis la agadon en diversaj Esperanto-rondetoj de amatoraj artoj en la klubo de blinduloj.
Kantado, deklamado kaj teatraj ludoj estiĝis por Ruta ĉiutaga pasio. Ŝi ĝuis Esperanton kaj ĝuigis la aŭskultantojn-esperantistojn.
La sorto feliĉigis min aŭdi ŝin kaj spekti ŝiajn partoprenojn en multaj eroj de Tendara arta programo. Ŝi plezurigis la ĉeestantojn dum la IX BET en Vilniuso.
Oni povas imagi la penadon kaj streĉiĝon, kiujn ŝi estis devigita fordoni por atingi ĉirilate perfektan mirindan nivelon.
Dum persona kontakto Ruta estas vigla kunparolantino kaj senlaca inventistino. Ŝercoj, gajaj rakontoj kaj afablaj ridetoj senlime riĉigas la amikajn konversaciojn.
La ĝojo deveninta de konatiĝo kun tiu afabla agantulino kaj ravaj impresoj aperantaj dum eĉ nelonga periodo de kontakto, restas en la memoro kaj koro de kunparolanto por longaj jaroj.
Do, ni deziru al ŝi feliĉan vivon, grandajn sukcesojn en ĉiuj ŝiaj intencoj kaj neelĉerpeblan utilan agadon.
Estu ĉiam sana, estimata Ruta! Estu Via vivo plengaja. Estu Via vivo konstanta fonto de granda amikeco por Viaj ĉirkaŭantoj!
Ni estas feliĉaj vidi Vin gaja kaj multagema en nia esperantista medio!

Ĉion bonan, neforgesebla Ruta!

P.S. Pasis ankoraŭ du jaroj kaj mi denove renkontis mian „neforgeseblan" heroinon. Tio estis dum la XI^a BET.
Mi konstatis la viglan, plenan sanon de Ruta. Dum la koncerto la geblinduloj el Riga plenigis la programon per siaj kantoj, deklamaĵoj kaj multaj aliaj distraĵoj.
Inter la artistoj mi spektis kun ĝojo la sveltan staturon de Ruta kaj aŭskultis ŝian belsonantan voĉon.
Mi sendas mian gratulon kaj bondezirojn al la viktimo de abomenaj faŝistoj, kiuj semas dum sia vojo nur morton kaj malfeliĉon por homoj!

D-ro Faljkov A. I., USSR, urbo Zaporojje – CR –

Aleksander Logvin

Antaŭ 130 jaroj, junie, mortis la granda rusa poeto Miĥail Lermontov (1814–1941)

Kie Lermontov duelis:

Kvar ŝtonaj agloj. Kvar abioj.
Kaj ronde – nur montar' kaj vento.
Min ĉirkaŭprenas emocioj
de multsignifa korsilento.

Pardonu min, poet' amata, –
ke mi piede tretis teron,
sur kiu la duelo fata
mortpafis vin kaj la liberon!

Ĉi tie pensas mi malĝoje
pri via sune-brila gloro,
kaj ruse kisas mi – trifoje –
la teron kun helruĝa floro...

Forkuris la murdinto trema
sub tondrobruo fulmobata.
Poeto, kuŝis, ribelema,
silente, pluve priplorata...

Kvar ŝtonaj agloj. Kvar abioj.
Kaj ronde – nur montar' kaj vento
Kaŭkazo brilas en radioj
de'l suna or' kaj neĝarĝento.

Mi same revas, kiel pluraj
retrovi lokon inter montoj,
de kie fluas ĉarme puraj
de l'via poezio fontoj.

Vi – protestanto liberama,
vi – gentopatro de la tristo,
por ver' eterna torĉo flama,
flagranta fajro de'l rezisto.

Atingis vi la alpnivelon
kaj kun la suno kaj glacio
vi ŝutis florojn, semis belon
de nia rusa poezio!

Kvar ŝtonaj agloj. Kvar abioj.
Kaj ronde – nur montar' kaj vento.
Ĉe la sunondaj varmradioj
gigantas gloro dum jarcento.

– CR –

Poemoj de Heinrich Heine en Esperanto



Heinrich Heine (1797–1856)

Jen grandegan entreprenon realigis la konata duopo Kálmán Kalocsay kaj Gaston Waringhien. Ne germano sed hungaro kaj franco tradukis en pli ol dudekjara laboro grandan elekton el la riĉa poemaro de Heinrich Heine (Hajnriĥ Hajne), la plej grava germana poeto kaj publicisto de la 19-a jarcento. Unue ligita kun la romantika germana literaturo li trovis la vojon al popoleska parolo de l'verso, kreis ampoemojn de granda profundo kaj simpla beleco. Ĉiuj poetoj, ankaŭ el Esperantio, legu Heine, por kompreni, ke ne la nekomprenebla, supermodernisma verso peras profundajn emociojn sed la artisme forĝita, bela, simpla. Jen du specimenojn:

„Mi demandas frumatene:
venos la trezor'?
Mi lamentas vespervene:
aĥ, ŝi restis for.

Nokte mi baraktas lite,
trista sendormul';
tage vagas mi sonĝvide,
kiel somnambul'."

✶

Danĝer', danĝer'! – sonoriloj alarmas.
Ho ve, mi la kapon perdis for.
Printempo kaj du okuloj belaj
konspiris kontraŭ mia kor!

Printempo kaj du okuloj belaj
relogis la koron al amdelir'.
Mi kredas, ke l'rozoj kaj najtingaloj
implikis sin grave en ĉi konspir'.

Ĉe Heinrich Heine ni trovas la pluevoluon de ĉiuj progresivaj literaturaj kaj ideaj tendencoj de sia tempo al revolucia demokratia armilo.
Lia verkaro same kiel tiu de Büchner efikis prepare al la unua germana burĝa revolucio 1848. Li sin sentis tamburisto de la revolucio kiel li esprimis en „Himno" (1830):

„Mi estas la glav', mi estas la flamo.
Mi al vi lumigis en la tenebroj, kaj kiam komenciĝis la batalo, mi skermis antaŭe en la unua vico.
Ĉirkaŭ mi kuŝas la kadavroj de miaj amikoj, sed ni venkis. Ni venkis, sed ĉirkaŭ mi kuŝas la kadavroj de miaj amikoj. En la jubilajn triumfkantojn miksiĝas la ĥoraloj de l'festo funebra. Sed ni ne havas tempon por ĝojo, nek por funebro. Denove ekbruas la tamburoj, temas pri nova batalo. –
Mi estas la glav', mi estas la flamo."

Granda estis lia amo al Germanio, lia patrio, kiun li devis forlasi, sub la premo de la reakciularo prusa, en 1831. Pli kaj pli akriĝis lia plumo skurĝante la spirite sterilan feŭdalismon germanan.
Tre konata estas la versverko „Germanio – vintra fabelo", kiun li verkis post vizito de sia patrino 1844.
Klarvida analizo de la socio kaj la ironiigo de ties malperfektaĵoj en brulе brila lingvo distingas Heinrich Heine en ĉi versverko. Ĝian formiĝon grave influis la amikeco kun Karl Marx. Jen kiel li priskribas siajn sentojn aŭdante ĉe la landlimo harpistinon kanti sentimentale kaj falsvoĉe pri pli bona mondo postmorta:

El „Germanio-Vintra fabelo"

Ŝi kantis pri la am' kaj amdoloro
kaj sinofero kaj renkonto
revida supre, kie ĉesas ĉiuj
doloroj, en pli bona mondo.

Ŝi kantis pri l'mizera valo tera,
pri l'ĝojoj, kiuj tuj disfluas,
pri l'transa mondo, kie la animoj
eternan ĝojekzalton ĝuas.

Ŝi kantis oldan kanton de rezigno,
ejapopejon[1]) ĉiellandan,
per kiu oni enlulas, se ĝi grumblas,
popolon, la bubaĉon grandan.

Mi konas tiun kanton kaj la tekston
kaj la aŭtorojn, kaj mi scias,
ke en sekreto ili trinkas vinon,
kaj en predikoj akvon krias.

Nun novan kanton kaj pli bonan kanton
amikoj, volas mi poeti:
ni volas jam ĉie tie sur la tero
la landon de l'ĉielo meti.

Ni volas esti sur la ter' feliĉaj,
ne volas de mizer' perei!
Ne fordiboĉu pigra ventro, kion
fervoraj manoj penis krei!

Da bona pano ja sufiĉe kreskas
por ĉiu hominfan'ĉi tie
kaj rozoj, mirtoj, belo kaj plezuro,
kaj sukerpizoj ne malplie!

Jes, sukerpizojn jam al ĉiu homo,
tuj kiam krevas ŝel' de l'beroj,
kaj la ĉielajn altojn ni translasu
al la anĝeloj kaj paseroj!

Se post la mort' flugiloj al ni kreskos,
vi estos de ni vizitataj
en la ĉielo, kaj ni manĝos tie
el tortoj, kukoj plej beataj.

Plua grava verko, kiu aperis kiel frukto de la amikeco kun Karl Marx, estis „La sileziaj teksistoj". En ĉi-tiu poemo – influita de la ribelo de l'sileziaj teksistoj, 1844 – li pentras la proletaron sen iu

falsa sentimentalo, kiel reala potenco pereigonta la feŭdalisman reakcian reĝimon.

La sileziaj teksistoj

L'okuloj mornaj sen larm' rigidas,
dentgrince ĉe sia teksil- ili sidas:
Tombtolon ni teksas por vi, Germani',
trioblan malbenon enteksu ni!
Ni teksas, ni teksas.

Malben' al idolo, al kiu ni preĝis,
dum nin la malsato kaj frosto sieĝis.
Ni vane esperis, atendis helpvoke,
li nur mistifikis nin trompe kaj moke.
Ni teksas, ni teksas.

Malben' al la falsa patruj', kie nura
malindo kreskas kaj hont' malpura,
kaj frue tretataj la floroj, la ĝermoj,
en putro kaj ŝimo plezuras la vermoj.
Ni teksas, ni teksas.

Navedo flugas, teksilo knaras,
ni tage kaj nokte la tekson faras.
Tombtolon ni teksas por Old-germani',
trioblan malbenon enteksu ni.
Ni teksas, ni teksas.

La persona tragiko de Heine, frua nekuracebla malsano, kiu grade paralizis kaj katenis lin ĉe la „matraca tombo" tamen ne malhelpis, ke li kreis, kreegis kun brila spirito.
Multon oni devas diri ankoraŭ pri la verko de Heine, mencii la majstrajn baladojn „Belzacar", „La sklavoŝipo", la poemojn, kiuj iĝis popolkantoj („Lorelej") kaj pluon.
Sed propre ne eblas recenze prezenti tiun batalaman giganton de la parnaso. Legi oni devas la verkon, laŭ la esprimo de Lessing „Ni pli ĝojus esti legata ol priparolata".
Pri la kvalito de la traduko? Nu, kiel germano mi estis iom skeptika, ke negermanoj povus bone trafi en la traduko. Malgranda, nevola eksperimento min impresis: Leginte la „teksistoj" mi povis laŭ la esperanta traduko rediri parkere la tutan poemon en la germana originalo, kiun mi lernis antaŭ longa tempo. La komparo de diversaj aliaj poemoj, ekzemple „La sklavoŝipo", „Belzacar" kaj kelkaj ampoemoj kun la germana teksto same montris grandan fidelecon al la originalo. Tamen ni konsciu, ke ĉiu traduko estas rekreo, kaj la Heine-aj versoj ne ĉiam estas facile tradukeblaj pro ilia mallongeco kaj simpleco, kiel la tradukintoj prave rimarkas enkonduke. Tial mi ne volas marĉandi pri metrikaj detaloj. Kompara analizo de kelkaj tradukoj de diversaj aŭtoroj (ekzemple „Lorelej", „Belzacar", „Pinarbo staras norde") eble donas interesan rezulton. La aranĝo de la verko mem estas tre interesa. Krom la saĝaj eldonistaj notoj sur la faldkovrilo impresas la fakto, ke oni provis kompreni Heine el lia tempo mem, indikante paralelajojn al la donita bibliografio.
Tamen oni Heine nur tute komprenas, se oni lin vidas kiel poeton de la revoluciema germana progresularo en la 19-a jarcento. Tial mi iom bedaŭras, ke mankas en la „vintra fabelo" ĝuste tiuj famaj partoj, kie li tre spritironie argumentas kun la spiritkaduka imperiestro Barbarossa, marŝante tra la kavernaro.
Resume, la poemoj de Heine ofte estas tre aktualaj kaj kun valoro por la nuno. Ilia legado estas ĝuo. La traduko de tiu giganto de la germana literaturo estas grava fenomeno, pro kiu meritas gratulon kaj la realigintoj kaj ni mem.
(Heinrich Heine „Kantoj kaj Romancoj", Stafeto, la Laguna Tenerife, 1969, 382 paĝoj, el la germana tradukis Kálmán Kalocsay kaj Gaston Waringhien, Prezo 4,80 dolaroj)

[1]) ajapopejo „lulkanto"

D. Blanke – CR –

Flugas kanto tra la mondo

jen nova kantaro, eldonita de la bulgara ŝtata eldonejo „Nauka i Izkustvo".
Formato 16 × 22, prezo 1,41 leva, riĉevebla de Bulgara Esperantista Kooperativo, str. Vitoŝa n-ro 40, Sofia.
La libreto ampleksas 62 kantojn, ĉiuj kun muziknotoj. El ili al mi estis konataj nur malmultaj: „Revo", konata en nia respubliko kiel: „Das Korn steht wie ein hoher Wald . . .", „ Estu ĉiam la suno", „La Espero", „La Internacio", „Himno de la Demokratia Junularo".
La „Funebra Marŝo" aperis kun nova traduko de K. Gusev (n-ro 38), same kiel n-ro 30, „Paŝu kuraĝe ni, Fratoj", laŭ kies melodio jam internacie dum jardekoj laboristaj esperantistoj kantis la ‚Himnon' – „Fratoj al sun', libereco". Al mi ĉiam plaĉis la etoso, se ĉe internaciaj renkontiĝoj gekamaradoj el diversaj landoj kune kantis komune konatajn kantojn. Mi ne povas rekomendi novtradukojn de tiel jam komunaj kantoj, eĉ se eble la malnovaj ne estus perfektaj. (Kritiko, kiu same koncernas al „Kantoj de niaj patroj", Moskvo.)
Preskaŭ ĉiuj ceteraj kantoj bonege respegulas la bulgaran folkloron. Ili konatigas nin kun la heroaj luktoj de la bulgara popolo kontraŭ la subpremo de turkaj kaj poste de naziaj okupantoj. Tiel per kantoj niaj impresoj de „Sub la jugo" kaj multaj aliaj bulgaraj prozajoj profundiĝas kaj pliperfektiĝas niaj scioj pri tiu nobla popolo, kiun ni jam longe lernis ami.
Strangaj por ni – sed des pli interesaj – estas la ritmoj de la lastaj popolkantoj en 7/16, 9/8, 7/8, 11/16 . . . taktaj mezuroj.
La antaŭparolo atentigas, ke la libreto ne celas reprezenti la nuntempan bulgaran muzikan kreadon. Ĝi deziras disponigi al la bulgaraj esperantistoj la plej popularajn bulgarajn kantojn – revoluciajn, hajdukajn, partizanajn, popolajn, lernejajn k.a. por povi vigligi per ili la kunvenojn, la konversaciajn vesperojn kaj ekskursojn. Krom tio, ili deziras faciligi la lernadon de Esperanto. La kantado helpos la korektan prononcadon kaj akcentadon de la sonoj, silaboj kaj vortoj, faciligante la ekposedon kaj praktikadon de la lingvo.
Gratulon al la redakcia kolegaro, kies membro Asen Grigorov kiel literatura redaktoro ja garantias plej bonan kvaliton!

L. Schödl

Detlev Blanke

Kelkaj konsideroj pri argumentado kaj argumentoj

1. Enkonduke

Jam ne plu sufiĉas prediko pri eventuala mondharmoniiga efiko de benoriĉa internacia lingvo, por serioze interesigi modernajn homojn pri la problemo de planlingvo ĝenerale kaj Esperanto speciale. Necesas sobraj konsideroj sur scienca nivelo, klara argumentado, kiu baziĝu sur kontroleblaj faktoj montrantaj la unikecon de problemo, kiu en sia komplikeco kaj graveco, mi kuraĝas aserti tion, ne nur de neesperantistoj sed ankaŭ de esperantistoj oftege estas subaŭ mistaksata. Anstataŭ propagando ni bezonas informadon, anstataŭ persvatado modestan sed efikan kaj sciencan argumentadon, anstataŭ supraĵa informiteco ni postulu pli profundajn konojn.

Konscia pri eventualaj kontraŭaj opinioj kaj la neplugiteco de tiu tereno skizota mi volas tuŝi kelkajn principojn de argumentado kaj diversajn argumentojn mem, neniel pretendante pri kompleteco.

2. Principoj

Por ke diskuto pri IL estu efika kaj sukcesa miaopinie estu konsiderataj jenaj faktoroj:

- La baza koncepto de la argumentanto pri funkcio, kapabloj kaj limoj de IL, ties historia rolo,
- la persono „argumentanto"
- la persono „argumentato"
- la situacio diskuta.

2.1. Baza koncepto

Sen realisma koncepto pri la rolo, avantaĝoj kaj limoj de IL ĝenerale kaj Esperanto speciale oni ne kapablos serioze argumenti. Ĉi-tie jam komencas la dilemo. Mankas moderna ellaborita marksisma teorio pri IL. E. Drezen provis fari tion.[1]) Ŝajnas necese konsideri ĉi-rilate jenajn tezojn:

- La evoluo de la socio estas leĝeca. Tirante la konkludojn el la historio kaj observante la aktualajn evolutendencojn de la socio eblas starigi pli mal pli detalajn prognozojn pri la estonta evoluo sur ĉiuj kampoj.
  Se la homo konas la evoluleĝojn de la socio, li povas konscie eluzi ilin kaj helpi al ties pli granda efiko. Li do rajtas kaj devas aktive transformi sian materian kaj socian ĉirkaŭon.
- La epoko de scienca-teknika revolucio nin devigas sobre kaj detale ekzameni ĉiujn rimedojn kaj vojojn, se ankaŭ ili estas konsiderataj nekutimaj, utopiaj kaj diversloke pro subjektivaj kaŭzoj eĉ akre kontestataj. Tio ankaŭ validas pri la problemaro de raciigo de la internacia lingva komunikado.
- Oni finfine konsciu pri tio, ke tiu raciigo estas esence socia kaj nur duagrade lingva problemo. (Tio havas sekvojn por la difino de „interlingvistiko[2])).
- La lingvo kiel socia fenomeno, kies disvastiĝo nacia kaj internacia do same estas determinita socie (kaj ne lingvokvalite) devas ĉiam esti rigardata en la politika, ekonomia kaj kultura konekso.
  Tio ekzemple signifas, ke la tezoj pri „lingva diskriminacio", „lingvocido", „lingva imperiismo", kiuj aktuale ludas certan rolon en la internacia esperanto-movado, estas tute erarigaj, se oni ne samtempe montras, de historimaterialisma vidpunkto, la historie evoluintajn kaŭzojn de tiu situacio kaj la vojojn kaj kondiĉojn de ties ŝanĝo.
  Certe „bojkotado" de iuj grandaj lingvoj fare de la esperantistoj tutsimple estas ridinda kaj malseriozigas la problemon Esperanto.
- La leĝeca evoluo de la socio kreas la kondiĉojn por la objetiva neceso de la raciigo de internacia lingva komunikado (informeksplodo en daŭre multiĝantaj – laŭ gravo – lingvoj kresko de internacia kunlaboro rezultigas kreskon de internaciaj lingvaj kontaktoj, kiuj – pruveble – pli kaj pli komplikiĝas kaj iĝas malsufiĉaj kvante kaj kvalite).[3]) Ĉirilate oni konsciu, ke planlingvo nur estas *unu* ebleco teoria kaj praktika de tiu raciigo. (alia ebleco estus enkonduko de unu aŭ du naciaj lingvoj). Necesas do havi kuraĝon kaj konsenti, ke temas *precipe pri IL*. La konkreta solvo estas grava demando, sed duaranga.
- Realisma sinteno al la historia pozicio de IL nin instruas, ke ĝi ne solvas sociajn problemojn (eraro de Zamenhof), kaj ekzemple ne malebligas militojn. La kaŭzoj de milito kuŝas en la klasbatalo, fundamenta leĝo, objektive efikanta en la homa socio. Nur la klasbatalo, la brido de la imperiismaj fortoj forigos la militdanĝerojn. Krome oni devas havi klaran imagon pri la rangvico de solvendaj mondaj problemoj. La ĉefproblemo nuntempa, antaŭ kiu staras la homaro inkluzive la esperantistoj, ne estas internacia lingvo sed la demando „esti aŭ ne esti", forigi por ĉiam la kaŭzojn de milito aŭ perei en atoma apokalipso. Post atombomba mondkatastrofo aŭ sistema genocido, kiel USONO ĝin praktikas en Suda Azio, ankaŭ IL ne plu havas iun sencon. Substrekindas la vortoj de H. Tonkin[4]): „Nia lingvo servas la homaron en paco, ne la homaron en milito. Sekve ni havas devon

krei la kondiĉojn, en kiuj nia lingvo prosperos".

- La avantaĝo de planlingvo kuŝas en tio, ke per ĝi disponeblas malferma sistemo, kiu pli facile estas adaptebla al la bezonoj de moderna ĉiuebena internacia lingva komunikado (tezo diklibre pruvenda!) Krome gravas la fakto, ke planlingvo laŭ la funkcia pozicio estas neŭtrala (ne la parolantoj mem, kiel kredas multaj esperantistoj erare kaj blinde).
- Estas objektiva fakto, la internacia lingvo Esperanto, ĉu kun aŭ sen mankoj, estas pli ol 80-jara tre sukcesa eksperimento. Amasiĝis tiom da interesega materialo, ofte puninde ignorata, kiun oni devas vaste kaj serioze esplori kaj konsideri. Estas permesite al ĉiu, havi tute negativan opinion pri planlingvo ĝenerale kaj Esperanto speciale. Sed oni devas energie postuli, ke seriozaj sciencaj rondoj, en nacia kaj internacia skalo, minimume konatiĝu kun la realaj faktoj, kun la multa detala teoria kaj praktika materialoj, amasigitaj (bedaŭrinde tre dise, kaj malfacile haveblaj) dum jardekoj.

Por detale konstati la faktojn kaj ellabori diversajn variantojn, inkluzive tiun de planlingvoj la tempo nun aktualas.

Konklude: praktika laboro por la disvastigo de Esperanto nur tiam estas senchava kaj efika se samtempe en konsiderinda skalo estas ellaborata taŭga interlingvistika kaj esperantologia teorioj, kiuj atentas la realajn leĝojn de la socio. Estas utopie kredi, ke iu ŝtato aŭ mondorganizo kiel UNO serioze interesiĝas pri la praktika solvo de IL, se mankas detalega kaj multflanka materialo. Ĉu 1 aŭ 70 milionoj da homoj postulos la agnoskon de Esperanto aŭ ne, ĉilume estas relative sensignife.

2.2. La „argumentanto"

Parolante pri la porinternacilingva argumentanto ne eblas skizi prototipon. En la realeco ja preskaŭ ĉiu esperantisto sin kredas taŭga, prijuĝi la diversajn aspektojn de IL ĝenerale kaj de Esperanto. Tio estas bedaŭrinda eraro. La problemo estas multe pli diversflanka kaj komplika ol ofte estas kredate en samideanaj rondoj. Tiel „malvenko" en serioza diskuto, ridindigo de la tuta afero estas ofte la sekvo, certe ne dezirita. Jam la fakto, ke nur malmultaj esperantistoj pli profunde okupiĝas pri interlingvistikaj kaj esperantologiaj problemoj aŭ aliremas la specialan literaturon, parolas por si mem kaj indikas bedaŭrindan staton de la scienca ekipo de multaj argumentantoj.

Ankaŭ la praktikaj spertoj ofte same, aŭ pli bone, efikas ol teoria argumento, pri kiu ne ĉiu ĉiam disponas.

Oni devas postuli de la argumentanto kelkajn kondiĉojn, plenumendajn de li:

- Li estu serioza kaj ne fanatika troigemulo. Nepre li malhavu ĉiun trajton aŭ signon de sektemulo.
- Indikataj faktoj estu ĝustaj (estas ridinde, kion oni ofte aŭdas kaj legas ekzemple pri la nombro de la esperantistoj, pri la disvastiĝo de la lingvo).
- Oni informu modeste, sed laŭ kerna problemo, ne altrudante al la argumentato nepre sian propran starpunkton, provante varbi lin disĉiplon de Esperanto.
- La argumentanto devas esti kapabla ĝuste taksi kaj prijuĝi la personon, kun kiu li parolas (laŭ profesio, klero, fakscio, mentaleco) kaj la situacion, dum kiu oni opiniinterŝanĝas. De tiuj faktoroj multe dependas la sukceso de la interparolo.

2.3. La „argumentato"

Certe evidentas, ke ne eblas samargumenti kun lingvisto kiel kun natursciencisto aŭ homo, kiu limigus sian intereson je kolektado de poŝtmarkoj, vojaĝoj eksterlanden aŭ malofta korespondado. Certe estus superflue al li ekspliki la cibernetikajn aspektojn de planlingvo aŭ la taŭgecon de Esperanto kiel lingvo de scienco. Literaturamanto preferus eble iom pli sciiĝi pri la literaturperiga valoro de Esperanto. Lingviston krom tio interesos la lingvaj kvalitoj (strukturo, evoluo) de la internacia lingvo. Por socia aganto, kiu aktivas en la politika vivo certe estas plej interese sciiĝi pri la internacia informa funkcio de Esperanto ktp.

Tio ne signifas, ke oni ĉiam nur traktu unu aspekton, unu flankon de la tuto. Male, ĉiam necesas la kompleksa prezento de la problemo, sed gravas, adaptiĝi al la klereco kaj speciala intereso de la kundiskutanto elektante la por li speciale interesajn ĉefproblemojn kaj -flankojn de la afero.

Ekzemple oni devas konsideri, ke lingvistoj ofte emas mistikigi la lingvon kiel „netuŝebla organismo", iu sanktaĵo. (komp. punktoj 3.1., 3.2.) Ĉe teknikistoj ofte regas la mito pri la ĉionkapabla maŝino.

2.4. La diskuta situacio.

Ofte ĝi estas subtaksita, la konkreta situacio. La fama elefanto en la porcelana vendejo ne maloftes, se esperantistoj tamburas por la lingvo. Nenion kontraŭ saĝa tamburado. Sed ĉiam ĝustaloke kaj ĝustatempe.

Okazis, ke trofervoruloj en diskutoj pri la lingvoproblemo en Hindio aŭ en afrikaj ŝtatoj ekstariĝas ofertante Esperanton kiel solvo. Tio estas krude malĝusta pritakso de elementaj evoluprocezoj, kiujn Hindio aŭ la afrikaj ŝtatoj devas mem solvi, sen Esperanto.

Eble same dubinda estus la sukceso pledi sur tradukista kongreso por la enkonduko de Esperanto. Trafa sceno troviĝas en la komedio „sinjorino Flinz" de H. Baierl, en kiu temas pri sindikata kunveno post la milito. Sur tagordo estas gravaj aktualaj taskoj. Fantaziulo ekstariĝas kaj pledas por la lerno kaj propagando de la internacia lingvo „Ido – Esperanto". Kompreneble ridego (sur scenejo kaj en la teatro) estis la sekvo.[5]) La fakto, ke la aŭtoro aludis Esperanton (kaj Idon) certe estas dolora. Sed verŝajne en lia konscienco enradikiĝis imagoj pri esperantistaj aŭ idistaj fantaziuloj. Ke ni havas sufiĉe da ili, certe ne estas kontesteble.

3. Kelkaj tipaj argumentoj.

Necesus ellabori pli detalan sciencan studon pri la plej gravaj argumentoj kaj ties rifuto. Mi nur volas karakterizi kelkajn ŝajne plej gravajn.

3.1. La „artefarita lingvo"

Jam multajn miskomprenojn kaŭzis tiu ankaŭ de Zamenhof uzita nocio „artefarita". Kvankam planlingvo sendube estas certasence „arte farita" (do ne spontanee evoluinta, sed konscie planita), tamen sub ĉi nocio kaŝiĝas tuta aro da misimagoj pri la ekesto, la funkcio kaj kapablo de IL, speciale Esperanto.

Ĉe multaj homoj, tio signifas: senkolora, morta, pala, neevolukapabla, senviva lingvo, kontraste al viva, bunta evolua.

Tuj videbliĝas, ke ĉiuj atributoj venas el la materia, organisma mondo. La konstraŭstaro kontraŭ „artefarita lingvo" havas diversajn kaŭzojn:

a) la tradicia lingvistiko prefere priskribis la lingvon kia ĝi estas, konsiderante ĝin kiel miraklo ne tuŝebla. Laŭ Alexander de Humboldt kaj diversaj lingvistoj[6]) oni vidis en la lingvo la respeguliĝon de la specifikeco de la koncerna nacio. Kiel do eblas konservi traduke tiun specifikecon per „artefarita lingvo"?
b) Tiu unuflanka mistikisma kaj idealisma okupiĝo pri la lingvo ne havis lokon por okupiĝi pli profunde kun

ĝia funkcio en la homa komunikado. Nur en la lastaj jardekoj, ne laste sub la influo de la Esperanto-eksperimento, pli kaj pli disvastiĝas la konscio pri la instrumenta karaktero de lingvo. Fundamentaj verkoj (inter alie de Wüster, Drezen)[7]) kaj la sorto de relative junaj naciaj lingvoj kiel la novhebrea, la malaja aŭ Rigsmol (norvega) montris, ke por la homa progreso eĉ estas necese konscie prilabori la lingvon, speciale tiam, se pro historiaj kaŭzoj iu lingvo ne kuntaktis kun la homa progreso. Same instrua estas la fenomeno de la „pidgin-" aŭ kontaktlingvoj.
Fakte, ĉiu nacia lingvo estis grave kaj konscie influita de grandaj verkistoj, filozofoj aŭ sciencistoj. (Komp. ekzemple la rolon de Martin Luther por la germana kaj de Dante por la itala.) Ke la evoluintaj grandaj naciaj lingvoj tute ne estas „naturaj" akcentas Karl Marx kaj Friedrich Engels en „Germana Ideologio". Mi citas germane:
„Die Naturwüchsigkeit der Sprache ist übrigens in jeder anderen ausgebildeten Sprache, teils durch die Geschichte der Sprachentwicklung aus vorgefundenem Material, wie bei den romanischen und germanischen Sprachen, teils durch die Kreuzung und Mischung von Nationen wie im Englischen, teils durch auf ökonomischer und politischer Konzentration beruhender Konzentration der Dialekte innerhalb einer Nation zur Nationalsprache aufgehoben.
Daß die Individuen ihrerseits auch dies Produkt ihrer Gattung vollständig unter ihre Kontrolle nehmen werden, versteht sich von selbst."[8])
Ankaŭ la fama lingvisto Max Müller esprimiĝis pri tiu problemo: „Tion, kion ni kutime nomas lingvo, nome la literaturidiomoj de Greklando, Romo, Hindio, Francio, Hispanio ktp. pli vere estas rigardeblaj kiel artefaritaj lingvoj ol naturaj formoj de l'parolo. La natura vivo de lingvo efikas en siaj dialektoj.[9]) Do negativigo de Esperanto pro „artefariteco" estas tuta sensenca.

3.2. „Mortaj" kaj „vivaj" lingvoj

Konekse kun 3.1. oni ofte parolas pri Esperanto kiel „morta" lingvo, kontraste al la „vivaj" naciaj lingvoj.
Nu, ĉi tie postefikas la darvinisma lingvoteorio de August Schleicher[10]) aŭ la materialisma filozofio la leĝoj regantaj en la natursfero havas aliajn specifikaĵojn el la leĝoj de la socio. Ne eblas transpreni mekanike nociojn el la organa sfero en la socian. Ne ekzistas „mortaj" aŭ „vivaj" lingvoj, ĉar lingvo ne estas organismo, kiu vivas kaj mortas. La lingvo estas tre subtila instrumento de la homo kaj ĝia evoluo kaj funkcio dependas unuavice de la homo. Ĝi estas socia fenomeno.
La „morta" latino povas bone „vivi", se du latinistoj ĝin uzas pri difinita temo, kiun kapablas esprimi la latino (spite la manko de neologismoj). Decidas ĉiam la „viveco" de la spirito de l'parolanto, lia klero, lia lingvoscio. Plej rafina lingvo restos „morta" en la buŝo de spirita aŭ parola balbutanto. La literaturkapableco de Esperanto estas taŭga pruvo pri la riĉeco de tiu lingvo kaj la spirita „vivanteco" de ĝiaj uzantoj.

3.3. „Belaj", „malbelaj" lingvoj

Jen tre malserioza argumento, kiu tamen ofte ripetiĝas eĉ en kleraj lingvistaj rondoj. La nocioj „bela, malbela" estas tre subjektivaj kaj dependas de la propra gusto. Ŝajnas al mi, ke en lingvoscienco la atributoj „bela", „malbela" ne rajtas ludi iun rolon. Estas konataj la anekdotoj pri Grabowski, kiu estis petite deklami ion en Esperanto. Post deklamo la aŭskultantoj diris „Sed ĝi ja estas neimageble malbelsona, vera lingvaĉo". Nun Grabowski senkulpigis sin klarigante, ke vere ne kulpas Esperanto, ĉar li citis el la itala lingvo... Mi ankaŭ menciu, ke la prusa feŭdalistaro en la 18-a jarcento konsideris la germanan „lingvo de la ĉevalservistoj", kiun ne valoras flegi kaj kulturi. La franca rangis kiel bela kaj aristokrata lingvo. La prusa reĝo Frederiko II-a fieris pri tio, ke li ne bone scipovis la germanan. Li preskaŭ nur parolis france.

3.4. Disfalo en dialektoj

Tiu ĉi argumento ludis gravan rolon komence de la 20-a jarcento en Germanio precipe pro la misfama atesto de la profesoroj Brugmann kaj Leskin pri Esperanto al la prusa akademio de sciencoj[11]). Tie ili deklaris i.a., ke Esperanto sendube disfalos laŭ la fonetikaj leĝoj en dialektojn diversajn kaj ke tial la tuta afero estas sensenca.
Nu, la praktiko pruvis la kontraŭon. Kial:
- Laŭ la funkcio Esperanto servas al internacia uzo. La volo al klara komunikado inter la parolantoj estas forte evoluita. Tial relative granda paroldisciplino observeblas.
- La fonetika modelo en radio, sur diskoj, en kursoj kaj en multaj internaciaj aranĝoj efikas unuecige.
- La fonetika konsisto de Esperanto mem malhelpas disdialektiĝon, ĉar ekzemple nur ekzistas la 5 bazaj vokaloj kaj miskompreneblecoj malmultas[12]).

3.5. Kunfandiĝo de naciaj lingvoj al internacia

En multaj landoj la stalina[13]) teorio pri la „natura" kunfandiĝo de la naciaj lingvoj al zonaj lingvoj kaj poste al internacia ludis gravan rolon, kvankam Stalin mem ne parolas pri Esperanto. Tiu teorio eĉ hodiaŭ, se ankaŭ nur subkonscie, influas ofte la psikan sintenon al planlingvo. Kvankam multaj pri tio fakto ne konscias. Tiu teorio jam longe ne plu ludas rolon en lingvistaj rondoj. Simila kunfandiĝo, se eĉ teorie imagebla, por la sekvontaj centaj jaroj certe ne realiĝos. Sed la problemo de IL devas esti solvata en la proksimaj jardekoj.
Krom tio nia epoko estas karakterizata inter alie per vekiĝo de nacia konscio precipe inter la junaj ŝtatoj, kiuj sin liberigis el sub la kolonia jugo. La teorio pri kunfandiĝo de la lingvoj do estas ĉiel spekulacia kaj neserioza.

3.6. Kosmopolitismo kaj Esperanto

Ofte oni asertas, ke la esperantistoj estas kosmopolitaj. Depende de la starpunkto tio povas esti laŭdo aŭ mallaŭdo. Certe ne ĉiu scias, ke la kosmospolitismo ekzemple de la germana burĝa intelektularo en la tempo de J. W. Goethe estis progresiva. Hodiaŭ sub la ideologio de kosmopolitismo ofte sin kaŝas tuta serio da utopiaj mondsavaj teorioj (internacia registaro ktp.). Unu version predikas SAT. Per tiuj teorioj oni kaŝas la fakton, ke unue necesas ordigi la rilatojn inter la ekzistantaj popoloj kaj ŝtatoj je plena samrajteco, firma amikeco kaj sincera kunlaboro. Tio ne eblas per agresoj kaj subjugoj. Do necesas krei tiujn kondiĉojn. Pri la ebleco, de laŭgrada integriĝo decidos la fora estonto. Pri tio ankaŭ Lenin skribis. Sed la vera kerno de la problemo kuŝas alie. La menciita aserto baziĝas sur la malĝusta opinio, ke lingvo estas ideologio. Kiel menciite oni ĉiam denove devas substreki, ke ĉiu lingvo estas ne ideologio sed instrumento. Tio ankaŭ validas por Esperanto. La homoj decidas, por kiuj celoj ĝin uzi. Kompreneble jam la funkcio „internacia" kaj ankaŭ la humanismaj konceptoj de Zamenhof kontribuis al certa pacifismo en la internacia esperanto-movado. Sed ni scias, ke ekzistas multaj teorioj kaj ideologioj en la esperanto-

movado sed ne unu „esperantisma". Ni scias, ke eblas uzi Esperanton por la disvastigo de antihumanismaj ideoj. La komuna deziro de la plej multaj esperantosciantoj, ke tiu lingvo ludu oficiale la rolon de la internacia, tamen ne estas iu ideologio. Estas do absolute sencence kulpigi la instrumenton pri la ideo de la uzanto.

3.7. Esperanto ne decide akceptiĝis

Jes, kaj ne. Oni povas kontraŭi la aserton en tiu rilato, ke malgraŭ pli ol 800 diversaj projektoj kaj kelkaj konkurantoj (Ido, Interlingue, Interlingua) en praktiko kaj en teorio nur Esperanto sukcesis. Pri detalaj demandoj oni povus disputi. Sed la ĝeneralaj trajtoj de la lingvo plene respondas al la internaciaj bezonoj (kio pruvendas denove per dika libro).
Ĉiuokaze, oni devas konsideri la elprovitecon, tradicion, literaturon kaj evolukapablon kiel tre gravaj faktoroj, pli gravaj certe ol malgrandaj mankoj, kiuj sendube ankaŭ ekzistas en la sistemo de Esperanto. Esperanto certe ĝis nun ne akceptiĝis tutmonde. Tamen tio ne estas pruvo kontraŭ la lingvo. Tiu simpla „akcepto" aŭ „venko" tamen estas komplikega paŝo de revolucia signifo. Ke ĝis nun la historiaj, la sociaj kondiĉoj ne estis maturaj por tiu paŝo evidentas. Jarcento kun du mondmilitoj, la elformiĝo de nova, la socialisma mondsistemo, nacia liberigo, jarcento kun kreskanta ŝanco pri forigeblo de la milito unuflanke sed daŭraj agresoj imperialismaj aliflanke, ĉu eblas en tiu jarcento solvi tian komplikan problemon? Ĉis nun certe ne. Temas pri la rangvico de la problemoj. Se tiaj gravaj problemoj estas solvitaj kiel kompleta malarmado, plena ĉiesa agnosko de la principoj de paca kunekzistado, tiam oni ankaŭ povas solvi tiajn problemojn kiel alfabetigo de la senskribuloj, provizo de sufiĉa nutraĵo por ankoraŭ malsatantaj homoj, la certigo de la plej elementaj medicinaj servoj k.s. En ĉi vico la problemo de enkonduko de IL ludos unuarangan rolon.
Sed ĉio-ĉi neniel malhelpas, ke oni jam nun serioze esploru la problemon, (precipe la sukceson de Esperanto) ke oni uzu Esperanton en la intereso de la humanismo kunlaborante por mondo sen milito.

3.8. La elektronaj tradukmaŝinoj

En la lasta jardeko trafuroras la mondon de tempo al tempo la „miraklo" de la elektrona tradukmaŝino. Se oni ne kredas al la ĵurnalistaj asertoj sed al la juĝo de la fakuloj[14]) oni devas agnoski la grandiozecon de ĉi entrepreno, sed ankaŭ, ke la rezultoj entute ne alportis tion, kion oni esperis. La problemo havas du flankojn: a) Oni supertaksis la kapablojn de maŝino, subtaksas la ĉefan rolon de la pensokapabla homo. Pensi nur povas la homo, ne la maŝino. Sed lingvo kaj penso estas intime ligitaj. Malvaste difinitajn programojn, donitaj de la homo, la maŝino prilaboros. Sed memstare, kreive pensi, memstare orientiĝi en la sovaĝe kreskita ĝangalo de nacia lingvo, tion ĝi ne kapablas.
La homa persona komunikado en kelkaj sferoj ne estas plene anstataŭigebla de maŝino. Unu el tiuj sferoj estas tiu de la lingva komunikado.
b) Se tamen la maŝino tiel perfektiĝos, ke bona adekvata traduko eblos, mi ne vidas esencan konkurencon inter ĝi kaj internacia planlingvo. Eĉ planlingvo kiel de- aŭ altraduka lingvo (de ĉiuj naciaj lingvoj en planlingvon, kaj el planlingvo en ĉiujn naciajn lingvojn) estus gravega raciigo, ĉar oni ŝparas la tradukon de ĉiu lingvo en ĉiun lingvon.
La ĉefa misimago, pli kaj pli ofte renkontebla estas, ke oni trovas IL superflua, asertante, ke ĉion-ĉi solvos la tekniko.
La specialistoj pri matematika lingvistiko kaj elektrona tradukado ne estas tiel optimismaj.

4. Finvorte

Oni povus daŭrigi la citon kaj komenton de pluaj argumentoj. Ekzemple ekzistas inter sciencistoj kelkfoje ankaŭ la elitoteoria opinio, ke la multlingveco estas karakteriza por la homaro kaj tial ĝi restu[12]).
Aliaj fabelas pri kreenda lingvo, kiu havu por ĉiu nocio apartan vorton kaj enhavu ĉiujn „avantaĝojn" de ĉiuj lingvoj[13]).
Ĉu internacia planlingvo estas utopia aŭ ne decidas la objektivaj leĝecoj kaj ne subjektivaj imagoj. Necesas tamen, ke la esperantistoj konsciiĝu pri sistema, laŭplana kaj profunda esploro por klarigi tion, kio jam grandparte funkcias en la praktiko. Nuntempa sukcesa uzo de Esperanto tamen ne nepre signifas, ke sub ŝanĝiĝintaj kondiĉoj (ekzemple pli larĝa uzo, enkonduko en la sciencon) ĉio same kaj simile funkcios.
Elmontro de la realisma kerno de problemo kaj praktiko de internacia lingvo Esperanto, konscio pri gravaj sukcesoj sed ankaŭ pri la ekzistantaj demandosignoj, sciencaj argumentoj, psikologie saĝe prezentitaj, ĉio ĉi alportos fruktojn.

5. Notoj

1) — Drezen, E.: „La vojoj de formiĝo kaj disvastiĝo de la lingvo internacia", SAT, Leipzig, 1929 (64 pĝ.)
— Drezen, E.: „Historio de la mondolingvo", EKRELO, Leipzig 1931 (241 pĝ.) atentu speciale pĝ. 15–25, 218–230
2) — Bormann, Artur: „Grundzüge der Interlinguistik", en revuo „Sprachforum", Zeitschrift für praktische Sprachwissenschaft, Graz, 1/3, 1958
Bormann, A.: en „Interlingvistika Informa Servo", Flensburg, nro 2/1957
3) — „Scientific and Technical Translation", UNESCO, Genf, 1958
— Bernal, J.: „Die Wissenschaft in der Geschichte", Berlin 1961
— Berg, A./Armand, D./Bokarev, E.: „64 lingvoj kaj ankoraŭ unu" (en rusa lingvo) „Literaturnaja gazeta", Moskvo, Nro 35 (28. 8. 1968)
— Dobrov, G. M.: „Wissenschaftswissenschaft", Akademie-Verlag Berlin 1970, pĝ. 30–62, 154–156
— Michajlov, A. J./Černyj, A. J./Giljarevskij, R. S.: „Informatik" 1, Staatsverlag der DDR, Berlin, 1970, pĝ. 21–27
— Svadost, E.: „Kak vozniknet vseobŝĉij jazyk?", Moskau, Nauka, 1968 (285 pĝ.), speciale pĝ. 6–75
— Makking, G. F.: „Das Sprachenproblem und die WFW", en „Wissenschaftliche Welt", Berlin, 1961, Nro 2
4) Heroldo de Esperanto, Bruselo, 16. 12. 1969
5) Baierl, H.: „Frau Flinz", Komödie, Berlin, Hentschel-Verlag, 1966, pĝ. 63
6) ekzemple Leo Weisgerber: „Vom Weltbild der deutschen Sprache", vol. 1 + 2, Düsseldorf 1953–1954
7) — Wüster, Eugen: „Internationale Sprachnormung in der Technik", dua pliampl. eld., H. Bouvier u. Co., Bonn 1966
— Drezen, E.: „Pri la problemo de internaciigo de science-teknika terminaro", Moskvo, 1935 (80 pĝ.)
8) K. Marx/F. Engels: „Die deutsche Ideologie", Bücherei des Marxismus/Leninismus, Bd. 29, Dietz-Verlag, Berlin 1960, pĝ. 448
„La natura kreskiteco de lingvo cetere estas nuligita en ĉiu alia plenevoluinta lingvo, parte pro la historio de la lingva evoluo el ekzistinta materialo kiel ĉe la romanaj kaj ĝermanaj lingvoj, parte pro la interkruciĝo kaj intermiksiĝo de nacioj kiel ĉe la angla, parte pro koncentriĝo de dialektoj en nacio, baziĝanta je ekonomia kaj politika koncentriĝo.
Ke la individuoj siavice prenos ankaŭ tiun produkton de sia speco sub sia kontrolo, kompreniĝas per si mem"
9) Müller, Max: „Lekcioj pri la lingvistiko", en itala eldono, Milano 1864, pĝ. 49
10) fama lingvisto, vivis de 1821–1868
11) Brugmann, Karl/Leskin, August: „Zur Kritik der künstlichen Weltsprachen", Straßburg 1907, Trübner Pres., (38 pĝ.)
12) Bokarev, E. A.: „Fonemo kaj sono en Esperanto", en Nuntempa Bulgario, Sofio, 1966/11
13) Stalin, J. W.: „Der Marxismus und die Fragen der Sprachwissenschaft", Dietz-Verlag, Berlin 1951, pĝ. 64
14) — Wilß, W.: „Automatische Sprachübersetzung". Eine Zwischenbilanz, en „Lebende Sprachen" (fakgazeto), Berlin-Schöneberg, 1966, 4–5–, pĝ. 97–100
— Ammer, K.: „Übersetzungsmaschinen", en „Fremdsprachen" (fakgazeto) Halle, 1958/3, pĝ. 7–19
— Meier, G. F.: „Kybernetik und Sprachwissenschaft", en „Beiträge zu Fragen der Kybernetik", Berlin 1963, pĝ. 144–145
— Schlüter, K.: „Aŭtomata tradukado", „Esperanto", Rotterdam, 1967/1
— CED-informoj en „Esperanto" 1962/3, pĝ. 53
15) Rónai, Paulo: „Der Kampf gegen Babel oder Das Wunder der Universalsprachen", Ehrenwirth-Verlag München, 1969, pĝ. 175
16) Svadost (komp. poz. 3) lasta ĉapitro

– CR –

Pri ideologiaj konceptoj de L. L. Zamenhof

El prelego de Rudi Graetz

Malnova LEA-ano skribis al mi antaŭ nelonge, ke ankaŭ nun ni bezonus ideon antaŭen pelantan, kiel iam estis la „interna ideo" aŭ kiel ĉe la laboristaj esperantistoj la devizo „Per Esperanto por socialismo", ĉar sen sana idealismo Esperanto ankoraŭ ne povas sukcesi. Ni devas tion iom prilumi.

Sendube dum la unua periodo por la disvastigo de Esperanto la „interna ideo" nepre necesis. Sen la idealismo kaj entuziasmo de dekmiloj da „gesamideanoj" nuntempe Esperanto estus mortinta. Kaj ankaŭ la laboristaj esperantistoj havis bonegajn sukcesojn antaŭ 1933 agante per Esperanto por siaj klasaj celoj. Kaj certe ankaŭ hodiaŭ ni bezonas apud sciencaj kaj raciaj metodoj certan idealismon ĉe la realigo de niaj ofte ne facilaj taskoj. Sed ĝi devas baziĝi sur ĝusta pritakso de la realaĵoj, de la objektive ekzistantaj sociaj cirkonstancoj.

La sola verko, ellaborita sur marksisma-leninisma bazo, kritike esplorante la ideologion de d-ro Zamenhof, estas broŝuro de Ernest Drezen. Ĝi aperis en la jaro 1929 en Leipzig ĉe la eldonejo EKRELO. Mi volas klopodi, skizi kelkajn trajtojn en la ideologio de Dro Zamenhof, ne celante kompletecon kaj baziĝante ofte sur la ideoj de E. Drezen.

D-ro L. L. Zamenhof estas la iniciatinto de la internacia lingvo Esperanto kaj plenumis grandan historian laboron. Dank' al lia persistemo kaj lia ĝisfunda pensmaniero ĉe lia lingvoprojekto li sukcesis konsideri ĉiujn necesajn faktorojn, kiuj por la reala ekzisto de internacia lingvo estas gravaj. Tio estas jenaj faktoroj:

1. *simpligita kaj racia gramatiko*
2. *la internacieco de la lingvo-elementoj*
3. *la libera evoluo kaj la sistema kresko de la lingva materialo, sendepende de iu persono.*
4. *la praktika apliko kaj la uzado de la lingvo.*

Zamenhof estas la unuura de ĉiuj projektantoj de artefaritaj lingvoj, kiu realigis ĉiujn kvar postulojn. Por tiu ĉi granda laboro ni devas esti dankemaj al li.

Sed ekzistas ankaŭ observebla fenomeno en la internacia Esperantomovado, laŭ kiu d-ro Zamenhof estas kvazaŭ liberigulo de la homaro. Tio kondukis al trograndigita Zamenhof-kulto. Ofte ĝi estas bazo por skeptiko de neesperantistoj, kiuj rigardas la laboron de la esperantistoj, ricevante la opinion, ke la esperantistoj estas stranguloj kaj sektanoj.

Necesas tial, ke ni korekte vidu la historian rolon de d-ro Zamenhof, ke ni rekonu lian grandan laboron, samtempe ankaŭ ekkonante liajn limojn. Per tio ni neniel volas malaltigi la verkon de Zamenhof, sed diference prijuĝi lian lingvistikan laboron kaj lian ideologion.

Fakte d-ro Zamenhof provis doni al lingvo ideologion. Tamen lingvo ne estas ideologio, sed instrumento. Tragike por la vere humaniste konceptita idearo de d-ro Zamenhof estas, ke laŭ ĝia karaktero ĝi objektive estas utopia. Tragike por d-ro Zamenhof same estis, ke li ne ekkonis la verajn kaŭzojn de la unua mondmilito kaj ĝin tial komprenis kiel personan fiaskon, kiel fiaskon de sia internacia lingvo, per kiu li intencis malebligi militon.

La persona evoluo de d-ro Zamenhof nur estas komprenebla, se ni konsideras la sociajn cirkonstancojn, sub kiuj li kreskiĝis.

Drezen skribis pri tio inter alie:

„La karaktero, la pensmaniero kaj la tuta personeco de Ludoviko Zamenhof – estonta aŭtoro de la lingvo esperanto – formiĝis dum lia junaĝo sub influo de tiu socio kaj tiuj politike-ekonomiaj kondiĉoj, kiuj estis karakterizaj por rusa imperio kaj okcidentaj ĝiaj regionoj dum la dua duono de la deknaŭa jarcento."

Plue

„La ĝenerala politiko de la cara registaro en la okcidenta lando kaj speciale en la tiel nomata Pola-Reĝlando konsistis en instigado malamika de unu nacio kontraŭ alia. Subpremataj en libera disvolvo de sia nacia vivo kaj kulturo, poloj kaj hebreoj helpis al tiu subpremado per reciprokaj malamikaĵoj. Pleje suferis nature la hebreoj."[1])

La patro de Zamenhof estis instruisto, kiu posedis la plenan fidon de la carisma oficistaro. Ĝenerale la aŭtoritatuloj montris plej grandan malkonfidemon al ĉiuj judoj.

„Konfido, kiun ĝuis Marko Zamenhof ĉe la ŝtataj aŭtoritatoj, plue montriĝis en la fakto, ke li fariĝis cenzuristo por eksterlanda gazetaro."[2])

Zamenhof estis edukita humanisme. Sed ĉiutage li estis konfrontita kun la kontraŭdiroj inter la diversaj nacioj, kiuj montriĝis pro la carisma nacieca politiko „partigu kaj regu", nur pro lingvaj kaŭzoj, kiel li kredis. Pro la fakto, ke la patro estis lingvo-instruisto, li verŝajne venis al supertaksado de la lingvo super la socia evoluo. Jam en la junaĝo ekevoluis ĉe Zamenhof la „interna ideo", kiun li poste ellaboris. Ĝi ekzistas en la koncepto, ke la internacia lingvo fratigas la homojn farante ĉiujn pacemaj. Ĉe kelkaj esperantistoj el tio ankaŭ rezultas la imago, ke ĉiu esperantisto jam pro la lingvo estas aŭtomate pacbatalanto.

La ebleco, facile kompreniĝi per ĉiu eksterlanda amiko, kondukas al la imago, ke jam pro tio okazas interfratiĝo. Tio facile kondukas al supertaksado de internacia lingvo, kiu laŭ tiu koncepto povos malebligi militojn. Ĉe la komenco de la estiĝo la Esperanto-movado vivis de fortoj, kiuj venis el burĝaj pacifistaj rondoj. Al ili ankaŭ apartenis Leo Tolstoj, kiun nepre allogis humanismaj celoj de la Esperanto-movado. De tiu ĉi tempo devenas la supertaksado de Esperanto kiel rimedo de la humanisma klereco, de la pacifismo por la mondfratiĝo.

Ĉar la burĝa movado estis la unua, kiu utiligis Esperanton, ĝi kompreneble ankaŭ formis la ideologion de la Esperan-

to-movado. Interna Ideo, kosmopolitikaj konceptoj, mondinterfratiĝo, malebligo de militoj, ĉio kondukis al tio, ke la iniciatoro de tiu ĉi lingvo estis rigardata kiel „signaldonanto por la homaro". El ĉio ĉi ankaŭ evoluis la Zamenhof-kulto.

Jam dum la Zamenhofa tempo la cionismo, kiel ideologio ludis certan rolon. Li okupiĝis dum sia junaĝo pri ĝi, sed malakceptis ĝin pli poste.

Oni povas citi kvar elementojn, kiuj ĉe Zamenhof miksiĝis al idealisma ideologio, nome burĝa humanismo, cionismo, religiemeco kaj la supertaksado de la lingvo en al socio.

Okazis al Zamenhof la sama, kiel okazas al ĉiuj homoj, kiuj sin turnas per novaj idealoj al la publiko. Tial ankaŭ li estis atakita kaj mokita kaj li skribis:

„La pioniroj de novaj ideoj renkontas nenion krom mokoj kaj atakoj, la unue renkontita, tre malmulte lerninta bubo rigardas ilin de alte kaj diras al ili, ke ili okupas sin je malsaĝaĵoj . . ."

kaj

„La homoj miras, kiamaniere en nia praktika tempo povas aperi tiaj malsaĝaj fantaziuloj . . ."[3])

Ni scias, ke pli kaj pli oni ekkonas la historie gravan laboron, kiun plenumis sendube D-ro Zamenhof.

Konata estas la granda modesteco de d-ro Zamenhof. Kvankam li estis la iniciatoro de Esperanto, li jam tre fue rezignis ĉiujn rajtojn. Oni ofte titolis lin, „Majstro", kvankam tiu ĉi modesta, senpretenda homo eĉ rifuzis esti honorigata, vidante antaŭ si la gravecon de verko kreita por ĉiuj. Kaj ĉefe pro tio li tuj ĉe la komenco rezignis je ĉiuj aŭtoraj rajtoj pri la lingvo; li deziris resti nura iniciatinto. La lingvo devas esti nenies privata posedaĵo kaj ĝia materiala mastro estu konsiderata la tuta mondo, kiu povas fari ĝin komuna instrumento por ĉiuj. Kaj sekve dum la V-a Kongreso Esperantista en Barcelono (1909) Zamenhof jam diris:

„La mondo vidas en mi ĉiam la naturan reprezentanton de la anaro esperantista . . . Forte mi dezirus forrifuzi mian por mi tro turmentan rolon."[4])

Kaj ĉe la 25-jara jubileo de Esperanto dum la 8-a Kongreso Esperantista en Krakov li fine deklaris:

„Permesu al mi, ke mi fine formetu de mi mian rolon. La nuna kongreso estas la lasta, en kiu vi vidas min antaŭ vi; poste, se mi povos veni al vi, vi ĉiam vidos min nur inter vi."[5])

Zamenhof ĝuste taksis la rolon de la popolo, ties de la amaso ĉe la lingvo-evoluo. Sed li ne ekkonis la rolon de la amasoj ĉe la transformigo de la socio. La ideo, krei internacian lingvon, ekestiĝis ĉe Zamenhof jam en lia plej juna aĝo. Tiu ideo havis siajn ĉefajn kaŭzojn en la kontraŭdiroj inter la nacioj, kiuj vivis en Bialystok. 80 % de la loĝantoj de tiu ĉi loko estis judoj. La aliaj 20 % estis rusoj, poloj kaj germanoj.

Kvankam la poloj kiel ankaŭ la judoj estis subpremitaj de la carismo, ili mem subtenis tiun ĉi subpremon per reciprokaj malamikecoj, kiuj estis instigataj de la carismo por konservi la potencon.

Zamenhof pensis, ke la kaŭzoj de la malamikecoj estas la lingvaj malfaciloj, ĉar la loĝantoj havis diversajn gepatrajn lingvojn, kaj tial ne povus kompreni unu la alian. Rekta lingva interkompreniĝo inter poloj kaj judoj ja ne povis okazi.

En sia fama letero pri la deveno de esperanto al N. Borovko. Li skribis:

„La ideo, al kies efektivigo mi dediĉis mian tutan vivon, aperis ĉe mi en plej juna infaneco kaj de tiu ĉi tempo neniam min forlasadis: mi vivis kun ĝi kaj eĉ ne povas imagi min sen ĝi."[6])

Li eraris, en la jaro 1913 asertante, ke „lingva ŝovinismo estas unu el la ĉefaj kaŭzoj de malamo inter homoj."[7])

Li ne povis ekkoni la ekonomiajn movofortojn de la klassocio kaj tial ankaŭ ne eksciis, ke la potencpolitiko de la tiamaj regantoj estis la veraj kaŭzoj de la ŝovinismo.

Zamenhof sincere klopodis konvinki la ŝovinistojn, ke amo al sia popolo kaj al la tuta homaro troviĝas en sama rilato kiel amo al sia familio kaj al sia nacio.[8])

Dum la III-a Universala Kongreso de Esperanto en Cambridge 1907 li forte akcentis:

„Ni deziras krei neŭtralan fundamenton, sur kiu la diversaj homaj gentoj povus pace kaj frate interkomunikiĝadi, ne altrudante al si reciproke siajn gentajn apartaĵojn."[9])

En sia memuaro prezentita al la Internacia Kongreso de Rasoj en London (26.–29. julio 1911), li asertas, ke la kaŭzo de malamo intergenta ne estas ekonomia sed senta:

„Ni malamas fremdajn gentojn ne ĉar ni timas, ke ili nin ekonomie englutos sed ni krias pri englutado tial, ke ni ilin malamas."[10])

Pri kaŭzoj de tiu „malamo" li kulpigis denove la lingvan diversecon.

En sia parolado dum la VI-a Internacia Kongreso de Esperanto en Washington (1910) li salutis Usonon per la vortoj:

„Lando de libereco, lando de estonteco . . ."[11])

Li estis tiel ĉarmita per la penso, „ke tiu lando apartenas ne al tiu aŭ alia gento aŭ eklezio"[12]), ke li forgesis pri milionoj nigruloj persekutataj kaj ekspluatataj. Li forgesis, ke la ŝovinismo lingva kaj religia en Usono disfloris same riĉe, kiel en landoj Eŭropaj (eble nur sub iom aliaj formoj), ĉar la sistemo de socia ordo en Usono kaj Eŭropo enhavis ja nenion esence diferencan. Kaj hodiaŭ? . . .

Vere, post unu jaro en adreso al la „Kongreso de Rasoj", Zamenhof jam faris kelkajn rezervojn por aliaj kaŭzoj de sociaj malpacoj. Li skribis:

„La intergenta diseco kaj malamo plene malaperos nur tiam, kiam la tuta homaro havos unu lingvon kaj unu religion . . ."[13])

Laŭ li daŭros en la homaro la diversaj malpacoj, kiuj regas interne de ĉiu lando kaj gento, kiel ekzemple malpacoj politikaj, partiaj, ekonomiaj, klasaj k.t.pl., sen tiuj kondiĉoj. Plej kruela el ĉiuj, li nomis la „malamo intergenta", kiu devus tute malaperi.

Estis eraro de Zamenhof kredi, ke la malamo inter la popoloj povas esti forigota per „unu lingvo" kaj „unu religio". Li ne ekkonis, ke la kaŭzo de tiu ĉi malamo nur ekzistas en klasa socio kaj ke per transformiĝo de tia socio al senklasa socio ankaŭ foriĝas la radikoj de la malamo inter la popoloj.

Interesa pruvo por tiu tezo estas Nigerio, multlingva lando. La klopodoj, fondi separatan ŝtaton Biafra, ne havis lingvajn kaŭzojn, sed estis organizita de imperiismaj fortoj, kiuj tiamaniere volis sekurigi al si ekspluaton de riĉaj krudmaterialoj. Tiu ĉi profitavida provo kostis la vivon de multegaj afrikaj homoj, speciale de infanoj. Malgraŭ la multlingveco, nun ĉiuj nigerianoj pace vivas, inkluzive de la Ibo-anoj.

La provo krei unu religion por la homaro esprimiĝas ĉefe en lia Homaranismo. En la „Deklaracio pri Homaranismo" 1913 Zamenhof konstatis, ke „esperantisma ideo prezentas nur nedifinitan fratecan senton kaj esperon . . . kiujn naskas la renkontiĝado sur la neŭtrala lingva fundamento . . ."[14])

La puran fratecon li kredis estis trovinta dum la unua Universala Kongreso de esperanto, kiu sugestis al li la penson:

„Nun en Bulonjo sur Maro fakte komenĉigas en pli granda mezuro la reciproka kompreniĝado kaj fratiĝado de la diverspopolaj membroj de la homaro . . ."[15])

Memorante la tagojn de Bulonja Kongreso Zamenhof post unu jaro skribis:

„La mirinda sukceso de la Bolonja Kongreso konvinkis la iniciatorojn de la homaranismo, ke absoluta justeco, egaleco kaj frateco inter la popoloj estas plene ebla."[16])

Samloke (p. 6) Zamenhof klarigas la ĉefan celon kaj konvinkon de homaranoj:

„La homaranoj estas konvinkitaj, ke ĉiu nacia aŭ religia ŝovinismo kaj ĉiu celado de unu gento regi super aliaj gentoj, kiel ĉiu malvero kaj rajto de pugno, pli aŭ malpli frue devas malaperi."

Tio estas tre humanisma postulo, kiun ni povas plenkore akcepti. La funda-

menta esenco de la homaranismo estas esprimita en la I-a kaj II-a punktoj de la „Deklaracio pri Homaranismo" de la jaro 1913.

„*Mi rigardas la tutan homaron kiel unu familion, la dividitecon de la homaro en diversaj reciproke malamikaj gentoj kaj sent-religiaj komunumojn mi rigardas kiel unu el la plej grandaj malfeliĉoj*".[17])

kaj:

„*Ĉian ofendadon aŭ premadon de homo pro tio, ke li apartenas al alia gento, alia lingvo, alia religio aŭ alia socia klaso ol mi, mi rigardas kiel barbarecon.*"[18])

Jen en lia konscio aperas la fakto, ke ekzistas klasoj, kvankam ties rolon li ankoraŭ ne povas kompreni.

Tre karakteriza por Zamenhof estas, ke en la unua redakta formo de la „Deklaracio"[19]) mankis tiuj vortoj „aŭ alia socia klaso".

Ni trovas atestojn, ke la lingvon internacian li komence volis krei unue kaj ĉefe por sia malfeliĉa popolo, dividita inter multaj landoj kaj lingvoj, popolo, kiu povos ree esti unuigita dank' al la lingvo.[20])

Zamenhof volis konservi pura kaj senmakula sian „neŭtralan supernacian homaranismon". Tial ĉe li forestis paroloj pri aktiva batalo kontraŭ la kaŭzoj de nacia subpremiteco. Restis nur vortoj konsolaj en la punkto VIII de la Deklaracio pri Homaranismo:

„*Se en mia hejma lando ĉiuj laboroj estas ekspluatataj por la oportuneco aŭ la gloro de unu speciala gento kaj tio paralizas mian entuziasmon por socio laborado, aŭ eĉ devigas min revi pri alia hejmlando, mi ne devas malesperi, sed mi devas min konsoli per la kredo, ke la nenormala stato en mia hejma lando pli aŭ malpli frue pasos.*"[21])

Sed tio ja estis plena pasivismo. Ĉiam denove en la diverseco de la gentoj li vidis la malfeliĉon de la homaro, ne komprenante la verajn kaŭzojn. Tial 1914 Zamenhof rifuzis partopreni eĉ fondon de Hebrea Ligo, al kies iniciatintoj li skribis jenon:

„*Laŭ miaj konvinkoj mi ne povas ligi min kun la celado kaj idealoj de speciala gento aŭ religio.*
Mi estas profunde konvinkita, ke ĉiu nacionalismo prezentas por la homaro nur plej grandan malfeliĉon, kaj ke la celado de ĉiuj homoj devus esti krei harmonian homaron. Estas vero, ke la nacionalismo de gentoj premataj – kiel nature sindefenda reago – estas multe pli pardoninda ol la nacionalismo de gentoj premantaj, sed se la nacionalismo de fortuloj estas nenobla, la nacionalismo de malfortuloj estas neprudenta ... mi volas labori nur por interhoma justeco absoluta."[22])

Elirvojon li ne povis montri.

Kiam la unuaj laboristaj Esperanto-grupoj komencis labori, la „interna ideo" kaj la „homaranismo" de d-ro Zamenhof jam estis skizita. Li ne havis la eblecon renkontiĝi kun marksistoj. Li salutis saĝe la fondon de laboristaj Esperanto-grupoj. Konata estas, ke Zamenhof ĉiam havis koron por la malriĉuloj kaj mizeruloj. Li provis helpi kuracante ilin senkoste, kvankam ankaŭ li kun sia familio longtempe vivis sub malfacilaj ekonomiaj kondiĉoj. Ofte li tuŝis kaj sentis mem la limojn de sia „neŭtraleco". Dum la dua Internacia Kongreso Esperantista en Genéve 1906 li esprimis sin ekzemple:

„*Senkolora oficiala parolo estus granda peko de mia flanko. Mi venas al vi el lando, kie nun multaj milionoj da homoj malfacile batalas por libereco, por la plej elementa homa libereco, por la rajtoj de homoj.*
Krom la batalado pure politika, kiun ni esperantistoj ne povas tuŝi, ni vidas en tiu lando bataladon inter la gentoj."[23])

Fakte li parolis pri politika batalo ĝin nomante nepolitika. Zamenhof parolis pri „aro da abomindaj krimuloj, kiuj per diversaj plej ruzaj kaj plej malnoblaj rimedoj, per amase dissemataj mensogoj kaj kalumnioj arte kreas teruran malamon inter unuj gentoj kaj aliaj."[24])

Kaj alialoke li mem limigas la influon de internacia lingvo:

„*Ni ne kredas, ke neŭtrala fundamento faros el homoj anĝelojn*"[25])

kaj tamen finas per esprimo de espero, ke tiu fundamento

„*forigos almenaŭ la grandan amason de tiuj bestaĵoj kaj krimoj.*"[25])

Jen kiel kontraŭdire li serĉis solvon.

Ni klopodu resumi:

D-ro Zamenhof estas la iniciatinto de la internacia lingvo Esperanto. La fundamentigo de tiu ĉi ege interesa fenomeno estas sendube grava historia ellaboraĵo. Per la kreo de la internacia lingvo Zamenhof evidente strebis al humanismaj celoj. Tamen, kaŭzita de sia medio etburĝa, li ne povis vidi kaj kompreni la evoluon de la socio kaj la verajn kaŭzojn de ĝiaj konfliktoj. Tial li ankaŭ devis veni al nekorekta filozofia konkludo pri la sociaj movfortoj, venante al utopiaj kaj pacifistaj opinioj kaj erare transdonis al Esperanto socio-ŝanĝantan funkcion. Per tio li kreis la fundamenton por la pacifista, neŭtralisma ideologia sinteno de larĝaj rondoj de la internacia Esperanto-movado. Sed tio ne malgrandigas liajn meritojn.

Ni povis pruvi, ke d-ro Zamenhof estis gvidata de profunda humanista strebado kaj ke li provis ligi sin al la homa progreso. Okaze de la Unua Mondmilito 1915 li skribis sian faman leteron al la diplomatoj, kiu nur havis unusolan postulon, ke post la milito „ĉiu lando morale kaj materie apartenu plenrajtigita al ĉiuj siaj filoj".

D-ro Zamenhof decide kondamnis la unuan mondmiliton, li apelaciis al la diplomatoj, certigi konstantan pacon kaj ke nepre la regado de unu gento super aliaj estu forigata.

Nur en Soveta Unio kaj aliaj socialismaj landoj la samrajteco de la nacioj kaj lingvoj poste realiĝis. Por la diplomatoj de la okcidentaj landoj tiu ĉi propono de d-ro Zamenhof estis kaj restas nerealigebla.

Konante la historiajn leĝojn kaj la historion de la Esperanto movado, ni povas konstati, la internacia kaj nacia Esperanto-movado, en la estinteco kiel ankaŭ en la estanteco, respegulas la realajn sociajn fortojn kaj la politikajn fundamentajn ideojn de la koncerna historia epoko. Esperanto kiel lingvo mem ne estas ideologio. Sed ĝi servas la koncernajn ideologiajn celojn de la parolanto. Pro tio ĉiu esperantisto reprezentas konkretan ideologion. La diversaj sociaj fortoj, ĉu tio estas konscia al la esperantistoj aŭ ne, utiligis kaj utiligas Esperanton por siaj klasceloj.

Per konstanta humanisma agado ni esperantistoj omaĝu la progreseman strebadon de D-ro L. L. Zamenhof kaj lian pacamon.

Fontoj kaj notoj:

1) E. Drezen: „Zamenhof", Ofsetpresajo (laŭ EKRELO, Leipzig, 1926) p. 5
2) E. Privat „Vivo de Zamenhof", London, 1920, p. 28
3) „Fundamenta Krestomatio", p. 269
4) vd. Drezen, p. 29/30
5) Paroladoj de L. L. Zamenhof, p. 89
6) „Lingvo Internacia", Uppsala, 1896, NN 6–7
7) D-ro L. L. Zamenhof „Deklaracio pri Homaranismo", Madrid, 1913, p. 11
8) „Fundamenta Krestomatio", p. 274–276
9) Edmond Privat „Vivo de Zamenhof", Richmansworth, 1957, p. 86
10) L. Zamenhof „Gentoj kaj Lingvo Internacia", Leipzig, 1912, p. 4
11) Paroladoj de L. L. Zamenhof, p. 63
12) La sama, p. 64
13) Laŭ fonto 10, p.p. 11–12
14) Drezen, p. 14
15) Drezen, p. 15
16) „Homaranismo (Hilelismo)", Peterburgo, 1906, p. 5
17) Drezen, p. 16
18) Drezen, p. 16
19) „Dogmoj de Hilelismo", Peterburgo, 1906, p. 13–14
20) vidu O. D. Ribault „Rememorajoj pri la unua tempo des esperanto" en la „Progreso", Praha, 1927, N.S., p. 18
21) Drezen, p. 19
22) E. Privat, „Vivo de Zamenhof", London, 1920, p.p. 185–186
23) Drezen, p. 26
24) Drezen, p. 27
25) Maria Ziólkowska „Doktoro Esperanto", Varsovio, 1959, p. 318

– CR –

Kie aboni al „Paco"?

Aŭstrio:
S-rino A. Sindl, A-3100-St-Pölten-Wagram, Traisengasse 26: 40 š.

Belgio:
Jean Coen, 9, rue Arthur Rolland, BRUXELLES-3 100 f

Britio:
P. Heurtl, 3 Elmdale, Madefine Rd. PETERSFIELD-Hants. 50 nov. penc.

Ĉeĥoslovakio:
Ĉeĥa Esperanto-Asocio-MEM-sekcio Francouská str. 22, PRAHA-2-Vinohrady: 20 k.

Danlando:
Egon Starup, Vingetoften 34, 2730 HERLEV 10 k.

Finlando:
Erkki Järvinen, Ukonkivenpolku 2, C. 19 HELSINKI-44: 5 m.

Francio:
Fédération espérantiste du Travail 179, rue Oxdener, PARIS-18 (p.ĉ.k. Paris No 902-52): 15 f.

Germana Demokratia Respubliko:
Centra Laborrondo Esperanto de GDR en Germana Kulturligo, 108 Berlin, Charlottenstr. 60 5 m.

Federacia Respubliko Germanio:
Albrecht Metzkes, D-405 MÖNCHEN-GLADBACH, Burggrafenstr. 52 8 m

Hungario:
Hungara MEM-komitato, BUDAPEST-VIII, Kenyérmezö utca 6: 36 f.

Italio:
Dante Cattaneo, Via Val di Ledro N. 23, 20162-MILANO: 850 l.

Japanio:
Humaki Hideo, PO Box 17, Edogawa-TOKIO (Japana pacdefenda esperantista asocio): 1 000 e.

Kubo:
Raul Juarez-Sendeño, Apartado 570, CAMAGUEY:

Nederlando:
Cor de Waart, Plancinsstr. 71, AMSTERDAM-C: 4,5 g.

Nepalo:
Keshab Ran Joshi, Esperanto-societo 10/319 Bhosiko Tole, KATHMANDU –

Norvegio:
Henning Nielsen, TÖRVIKBYGD 10 k.

Peruo:
Ildefonso Nuñez, Calle 2 de Mayo 796 CAJAMARCA: –

Pollando:
Pola Esperanto-Asocio, ul. Jasna 6 WARSZAWA: 35 z.

Popola Respubliko de Koreo:
Korea Esperanto-Asocio (S-ro Sin Gosong), postkesto 16, PJENJANG: –

Rumanio:
S-rino Irma Fülop, str. Calan 12, etj I, SIBJU: –

Sovetunio:
Unuiĝo de sovetaj societoj de amikeco kaj kulturaj rilatoj kun aliaj landoj (S-ro A. Makovskij), Kalinina 14, MOSKVO K-9: 2 r.

Svedio:
K. Kvist, Rinmansgatan 13, S-660.92 DEJE (p.ĉ.k. No 442478): 10 k.

Usono:
Jim Deer, 12946, NE NANCOCK, Portland Oregon 97230: 3 d.

Vietnama Demokratia Respubliko:
Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, 68, Ly Thuong Kiet, HANOI: –

Aliaj landoj:
S-rino G. Roux, 47-MONFLANQUIN (Francio) 20 int. respondkuponoj aŭ 3 dol.

Adresoj de la gvidaj funkciuloj de M.E.M.

Prezidanto: Nikola Aleksiev, Nezabravka I, blok I, vhod. II SOFIO-13 (Bulgario)
Ĝenerala Sekretario: Tomàs Balda, Revnice 416/23, PRAHA zàpad (Ĉeĥoslovakio)
Centra administranto: Ivan Canev, Bulgara MEM-komitato, Bulv. Ĥristo Botev 97, SOFIO (Bulgario)
Kasistino: (S-rino) Germaine Roux, 47-MONFLANQUIN (Francio)
Centra redaktoro de „Paco": William Gilbert, 30, Rue Croix-Montoire 37-TOURS-02 (Francio)
Prezidanto de la eldonkomisiono: Helmut Fuchs, Hohe Str. 33, 83 PIRNA (GDR)

Grava!: Nepre skribu al la koncernata adreso laŭ la temo pritraktita, t.e., *al la prezidanto* pri fundamentaj politikaj problemoj, *al la ĝenerala sekretario* pri organizaj problemoj, *al la centra administranto* pri administraj kaj financaj aferoj, *al la kasistino* por pago de kotizoj (koncernas la landajn perantojn), *al la centra redaktoro* de „Paco" pri redaktaj aferoj, *al la prez. de la eldonkomisiono* pri eldonproblemoj (notinde eldonplanoj de „Paco").

Ni ne povas garantii sekvon al leteroj kaj dokumentoj ne senditaj al la taŭga adreso aŭ pritraktantaj diversajn problemojn!

Al niaj legantoj!

Abonprezo por unu jaro *garantias 96 paĝojn entute.* Principe aperos ĉi-jare nur 6 N-roj de „Paco" *po 16 paĝoj minimume* po N°. La abonantoj bonvolu pardoni al ni gravajn mankojn, notinde malfruojn. Ili estas parte la komplika flanko de sistemo, kiu ebligis ekde 1953 liveri nian revuon el diversaj landoj kaj kontinentoj kaj same de fortaj kaj malpli fortaj sekcioj, kontraŭ relative malalta prezo. Krome, nia revuo fariĝis pli kaj pli luksa kaj ampleksa, kaj ni ĉiam liveras multe pli ol la 96 paĝojn garantiitajn por ĉiu jaro.

Konklude: ABONU, ABONIGU, REABONU ... al „PACO"!

La centra redaktoro de „Paco" ...

... serĉas kunlaborantojn kapablajn traduki bonstile artikolojn el naciaj lingvoj esperanten, aŭ verki regulajn rubrikojn pri difinita temo (junularo, virinoj, arto, sporto, Esperanto, k.s. ...)

Al ĉiuj skribintoj, kiuj esprimis al ni interesajn opiniojn pri la GDR-libro, ni diras ĉivoje nian tre koran dankon petante komprenon pro tio, ke ni ne povas respondi al ĉiuj.

Centra Laborrondo Esperanto de GDR

Distra anguleto

Tio-ĉi jam estas pasinto ... Kandidato al parlamento estis vojaĝanta tra marbordaj vilaĝoj por renkonti la balotontojn.
Iu interrompis lian paroladon:
– „Nun ni volas havi legoscian deputiton!"
Alia voĉo kontraŭdiris:
– „Ĉu vi estas freneza? Li, nia deputito, jam estas profesoro. Li ankaŭ estis ministro!"
– „Povas esti, sed mi scias, ke ni al li skribis almenaŭ 500 leterojn. Se li estus legoscia, li jam estus respondinta almenaŭ unufoje!"

Sendita de K. Istomin (USSR) – C. R. –

Pri la malnovaj anekdotoj

Kial ve levas vian ĉapelon, kiam mi rakontas anekdoton al vi? Ĉi estas mia maniero saluti malvovajn konatulojn.

(El „Bulgara Esperantisto" 3–4/1969)

Pacemo

Antaŭ publika telefonejo estis okazinta grava interbatado inter sinjoro Arbo kaj junulo Planto.
Sinjoro Arbo vundiĝis ĉe okulo kaj nazo.
Antaŭ juĝisto sin devis pravigi junulo Planto.
– Rakontu do, kial vi batis sinjoron Arbo – diris la juĝisto.
– Nu, mi staris en la telefonejo kaj parolis kun mia amikino. Alvenis tiu sinjoro kaj volis telefoni. Li forte frapis al la pordo de la ejo. Kaj, ĉar mi daŭrigis la interparoladon, li malfermis la pordon kaj perforte min trenis el la telefonejo. Tiam mi riproĉis al li, sed mi restis tute pacema ...
– Kaj kiel do komenciĝis la interbatado?
– Nu, mi forte ekkoleris nur tiam, kiam li elpelis ankaŭ mian amikinon.

Eldoninto de tiŭ ĉi numero:
Germana Kulturligo / asocia sekretariejo (Centra Laborrondo Esperanto de GDR). Redakcio: 108 Berlin, Charlottenstrato 60, Telefono: 22 59 91. Respondeca redaktoro: Detlev Blanke, Redakcia komisiono: Otto Bäßler, Dr. Hans Eichhorn, Rudi Graetz, Rudolf Hahlbohm, Rainer Knapp, Willi Vildebrand, Redakcia fino: 20a Februaro 1971. Aperas ĝenerale 6 foje dum jaro, ĉiu- foje kiel eldono de alia MEM-landa sekcio. Presejo: III/9/1 Grafischer Grossbetrieb Völkerfreundschaft Dresden, Betriebsteil Meissen.

1700 - 36



Bulgario

Anoj de Esperanto-grupo „aŭto" dez. korespondi tutmonde kaj ricevi leterojn por letervesperoj. Skribu al E-o-grupo „aŭto", *Sofio*, p.k. 1054

18-jara bulgarino dez. korespondi kun junuloj pri kulturo, vivmaniero, etnografio, interŝanĝas pentrajojn pri naciaj kostumoj, kol. naciajn pupojn, bk, Askra Georgieva, *Sofia 63*, str. „Car Samuil", Nro 13

Dez. korespondi Violeta Veneva Momĉilova (19jara), kv. Bajkuŝeva 239 // Lidija J. Hristova (20jara) ul. Hr. Botev 10 // Jordanka Hr. Ĉakarova (16jara) ul. Mogiliĉe 19 // Petar Rangelov Velev (22jara) ul. Hr. Smirnenski 12/20 // Pavel Kirilov Pavlov, ul. Minjor 15 // Georgo Vasev (12jara) ul. Alen mak 24. Ĉiuj en *Pernik*

Korespondi deziras kursanoj el *Vraca*, skribu al Enjo Daskalov, Tekstila Teknikumo, Vraca

CSSR

Deziras korespondi membroj de Esperanto-rondeto ĉe Goethe-muzeo *Marianske Lazne*, CSSR

Kolektas monerojn, ĉu novajn aŭ malnovajn, Paulo Bartulec *Stonova 100*

Francio

Dez. korespondi kun GDR-esperantisto, Maurice Bordessoulle, à Fromessent, *62-ETAPLES*/s.mer

Germana Demokratika Respubliko

Ministo, 22-jara, dez. korespondi kun esperantistoj el la tuta mondo. Dez. interŝanĝi pm kaj bk, kolektas mineralojn. Manfred Kirsch, *DDR - 6506 Ronneburg*, August-Bebel-Straße 9

Komencantino, 17 jara, dez. korespondi, Beate Meyer, *8053 Dresden*, Käthe-Kollwitz-Ufer 91

Studentino de pedagogio (17 jara) dez. korespondi tutmonde. Kerstin Senftleben, *DDR - 50 Erfurt*, Marktstraße 5

Instruisto de politekniko (dua direktoro), 40 jara, deziras korespondi pri pedagogiaj temoj, kol. bk, pm, Johannes Senftleben, *DDR - 50 Erfurt*, Marktstraße 5

Lena Erler, 19 jara, abiturientino, *95 Zwickau*, Windbergstraße 38

Maria Tschöke, 16 jara, *9502 Zwickau 10*, Ernst-Thälmann-Straße 24

Rosemarie Falkenberg, 17 jara, lernantino, *9532 Wildenfels*, Wiesenstraße 22

Petra Elsner, 19 jara, *9276 Rödlitz*, Obere Dorfstraße 84

Kerstin-Maria Kühle, 17 jara, *95 Zwickau*, Franz-Mehring-Straße 31a

Anna-Maria Bergmann, 16 jara, *9502 Zwickau 10*, Helmholtzstraße 18

Kristina Rudnik, 18 jara, tajlorista lernantino, *95 Zwickau*, Franz-Mehring-Straße 90

Liane Fuchs, 34 jara, apotekistino, *95 Zwickau*, Platanenweg

Dieter Hofmann, 26 jara, *9801 Irfersgrün*, No. 976, teks-inĝeniero, ĉiuj deziras korespondi tutmonde.

Hungario

Dez. korespondi, interŝanĝas pm, pk, Fülöp Ferenc, *Budapest XIX*, Kerület Thököly – n. 9 (kispest)

Komencanto dez. koresp. kun esperantistinoj, interesiĝas pri ekskursoj, filozofio, literaturo, kol. folklorajojn, mapojn, bk. J. Ferenc kaj Borza Zoltan, *Budapest XVI*, Arpadföld, Fürge u. 31

15 jaraj knabinoj deziras korespondi kun germanaj knaboj aŭ knabinoj, Maria Kali, Maria Toth, Margit Veha, Katalin, Kiss, *Bekescsaba*, Szabadsag ter 10.

Adjunkto de Ekonomika Katedro de Agrikultura Faklernejo/breda fako/ dez. korespondi kun fakuloj pri bredado-scienco kaj agrara ekonomio, Otto Kotsis, *Kaposvar*, Pf. 16.

Japanio

Junulo japana dez. koresp. pri E-o-movado en GDR, pri socialismo, interŝanĝas pm, bk, librojn esperantaĵojn. Akceptas volonte materialon por aŭtuna ekspozicio. Sawaya Yûiti, Yukizirusi Ikueiryô, 811-4 Miyanomori, Kotoni,/63 *SAPPORO*

Studento, 19 jara, pri ĉiuj temoj kun esperantistino, Kenji, Sekiguchi 2-9-9, *Harigaya*, Urawa Saitama 338

Junulino, 23 jara, pri ĉiuj temoj, Naojuki Uno Aratome 14, *Mototate Sakata*, Tamagata-ken

Pollando

Gejunuloj, 16–19 jaraj dez. korespondi tutmonde, laŭ jena adreso: Junulara Palaco, Esperanto-Rondo (Palac Mlodziezy), *Szczecin*

Lernanto, 18 jara, dez korespondi, Marian Pieniek, *Kamien-Pom*, ul. Lenina 1/8, woj. Szczecin

Fizikisto, 32 jara, interesiĝanta pri klasikaj lingvoj, sporto, scienco, junaj belaj knabinoj (!), Kazimierz Deklacki, *Warszawa 1*, ul. Solec 28 m. 25

20-jarulino, kol. pm, bk. Vanda Nowak *Skierniecice*, ul. Vspolna 5/7

Rumanio

Juna studento dez. korespondi esperante kaj germane kun fraŭlinoj el GDR, interesiĝas pri fremdaj lingvoj, literaturo, muziko, kol. bk, pm, skribu al Elemer Kelemen, *SF. GHEORGHE*, Str. Florilor Nr. 9 Jud. Covasna

Soveta Unio

Instruisto de fremdlingvoj, dez. korespondi esperante, germane, kol. materialojn pri sistemo de konatiĝo kun profesioj (Berufsorientierung) en germanaj mezgradaj lernejoj, Andreo Rogov, *v. Ivankovci*, Ĥmekicka rajono kaj. obl.

Instruistino, deziras korespondi esperante, angle, france, germane, ruse, ukraine, Anja Vojnarovic, *Ardejerka-3*, d. 9 kv. 37, Doneckaja obl., Ukrainio

200 gelernantinoj (9–18 jaraj) deziras korespondi en Esperanto, skribu al Anja Vojnaroviĉ, *Arcejerka-3*, d. 9 kv. 37, Doneckaja obl.

Gejunuloj, 15–18 jaraj dez. korespondi, skribu al Odesa Palaco de Junpioniroj, Esperanto-rondeto, Primorskij bulvar I, *Odessa*

Dez. korespondi diversteme, kol. pm, pk, 24 jara, studento de medicino, Aleksandr N. Ponomarjov, *Ivanovo(obl)*-13, ul. Ŝubiniĥ 16 a, kv. 30

Studentinoj de kemio ĉe Ŝtata Universitato, 20 jaraj, dez. koresp. ĉiulande, diversteme, kol. bk. insignojn, esperanto-revuojn, sondiskojn. Graĵina Grabeĵite, *Vilnius*, Basanaviĉus str. 26–2 // Maria Urbanariĉiute, *Vilnius*, Algirdo str. 2/22–65

Dez. koresp. G. J. Arĥangelskij *Voroŝilorgrad-16*, str. Kocjutinskho 2–53

Dez. koresp. tutmonde studentoj kaj lernantoj el Siberio. Resp. garantiata: Esperanto-klubo, p. K. 11, *Barnaul-99*.

Du 15 jaraj lernantinoj deziras korespondi kun gelernantoj el diversaj landoj, interŝanĝi bildkartojn kaj pm. Rita Blaẑyte, Gerosios Vilties 4–35, *Vilnius 15*
G. Vaitilaviĉiute, Architektu 88–48, *Vilnius 43*, Litova CSSR

Anoj de Dagestana Esperanto-klubo serĉas amikojn en la t. m., studentoj 18–23 j. de Dagestana Ŝtata Universitato, pri div. temoj kolektas pm, pk, *Maĥaĉkala-25*, poŝto, abonem jaŝĉik 074, esperantajojn, diskojn ktp. Skribu al Esperanto-klubo, Junusov Abduraĥman, DASSR,

Kaj skribu al: 368300, *Kaspijsk-centro*, abonem. jaŝĉik 29, Esperanto-klubo, Vladimir Zibenkes

Dez. koresp. Antonina Baltruŝiene, *Kaunas*, Viduno al. 1–15, Litova SSR.

Lernantino de oka klaso (15 jara) dez. koresp. ruse, pole, germane, esperante, Svetlana Labik, *Hmelnickij-14*, str. Ulrickij, 1227 kv.

Elektristo-inĝeniero, *Ĉeljabinsk-3*, Sverdlovskij prospekt 62-3, Parĥomenko Olga

Kuracisto-toksikologo dez. koresp. laŭ profesio: Aleksandr Nikolskij, *Ĉeljabinsk-81*, str. U. Gromovoj 12–8

Konstruktoro-inĝeniero Ludmila Djakova, *Ĉeljabinsk-122*, str. Prostornaja 23–19

Fraŭlino (21 jara) Tamara Dedik, *Ĉeljabinsk-112*, Komsomolskij prospekt 25–19

Kemiistino-inĝeniero, Galina Kondakova, *Ĉeljabinsk-3*, str. Volpdarskogo 15–33

Inĝ.-elektristo, 29 jara, *Ĉeljabinsk*, poŝtamt, ab k. 98, Andreev Vladislav

Estas serĉata foto de la UEA-kongreso 1923 in Nürnberg. La foto prezentas la E-kongresejon, apud kiu staras kongresanoj, al ili iras blindulo kun dorssaketo – la blindulo estas *V. Eroŝenko*. Sendu fotokopion al: Aleksandro Pankov, Pobeda Av., 102, *Kislovodsk – 48*, Sovetunio.

Gelernantoj dez. korespondi *ruse* kaj *germane*, skribu al: D. K. Kozlova, Donbas, Debalcevo, *Soŝru N 2*

Junulinoj el Jalta dez. koresp. tutmonde: Reduĉiliŝĉe „Esperanto", *Jalta/Krim*
Gelernantoj (13–16 jaraj), membroj de klubo „Globus" deziras korespondi pri literaturo, kulturo, muziko ktpl. kun gelernantoj el GDR. Adreso: USSR, Krasnodarskij kraj, *Primorsko-Aĥtarsk*, Bratskaja 101, ŝkola 2, s-ino Ĉinaeva Svetlana.

Filatelisto deziras korespondi kun GDR-esperantistoj. Adreso: UdSSR, Litovio SSR, distrikto 'sakiai p/O. *Griŝkasudis*, s-ro Alberto Daleida.

Svedio

54 jara sveda laboristo deziras korespondi kaj interŝanĝi fotojn kaj bildkartojn kun germaninoj. Korespondas esperante kaj angle. K-do Runo Mur, Poste restante, *Göteborg 5*, (Södra vägen)

USONO

29 jara bibliotekisto dez. korespondi kun bibliotekistoj en ĉ. landoj. Intersiĝas ankaŭ pri genealogio (aparte en Francio kaj Pollando), surglacia hokeo kaj kurtonda radio (nur aŭdas, ne elsendas).
Adreso: Paul J. Lareau, 1032 Orchard Street, *TOLEDO*, Ohio 43609

– CR –

